

EL POPOLA ĈINIO

中國報道


5 1982



La nomada vivo de kazahoj

Fotoj de REN SHIYIN kaj ZHU XIANMIN

La kazaĥa nacieco de Ĉinio havas pli ol 800,000 membrojn, kiuj vivas ĉefe en la norda parto de Xinjiang kaj etparte en la najbaraj provincoj Qinghai kaj Gansu. La kazaĥoj pliparte okupiĝas pri brutobredado escepte de tiuj, kiuj okupiĝas pri agrokulturo en fikse loĝataj lokoj. Ili nomadas de unu paŝtejo al alia laŭ malsama sezono. En printempo, somero kaj aŭtuno ili loĝas en moveblaj rondaj feltaj domoj. Ili manĝas ĉefe bovaĵon kaj ŝafaĵon kuiritajn en akvo kaj diversspecajn laktaĵojn. En la printempa fino, kiam la brutoj grasiĝas, la paŝtistoj verŝas ĉevalinan lakton en ĉevalledajn ujojn kaj kirlas ĝin senĉese. Post fermentado la lakto fariĝis diafana kaj iom acida ĉeval-lakta vino — trinkajo ŝatata de paŝtistoj. La vestoj de kazaĥoj plejparte estas faritaj el felo kaj ĝenerale estas larĝaj por rajdado. La viroj portas ledan zonan kun metalaj ornamaĵoj kaj tranĉilon. La virinoj portas robon kun arĝentaj ornamaĵoj. La knabinoj ŝatas starigi plumojn sur la ĉapo, tia aranĝo donas apartan ĉarmon, kiam ili rajdas sur galopantaj ĉevaloj.




Preparado de laktaĵoj



Somera paŝtejo de kazaĥaj paŝtistoj




En manĝado




Al nova paŝtejo



Vestofarado



Maljuna paštisto ludas muzikilon.



Transloĝado

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Eminenta instruistino Huang Lili

Huang Lili estas instruistino de la Chongming-a Elementa Lernejo de Ŝanhajo. Ŝi sin okupas pri edukado jam 24 jarojn kaj per figuraj kaj vivaj metodoj edukis lernantojn ami la patrolandon, sciencon kaj fiziklaboron. En 1981 ŝi estis elektita kiel eminenta instruisto de Ŝanhajo.

de LAO BAI

SUR LA DORSKOVRILO:

Lijiang-rivero (Ĉinstila pentraĵo)

Lijiang-rivero troviĝas en la fame konata pitoreskejo Guilin de Ĉinio. Ambaŭborde de ĝi la montoj rekte leviĝas. La rivera akvo estas klara kaj la montoj verdaj. Al ĝi senĉese alvenas turistoj.

de WU HUALUN

KOLORAJ SERIOJ:

La nomada vivo de kazaĥoj
Okcidenta Qiaoshan-monto de
Guangdong

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj
de E-istoj:

Frostiĝa akvofalo en la mon-
taro Jatra de Ĉeĥoslovakio

Fungoj kun enigita viando

La pekin-opero "Ĉe Vojkruĉiĝo"
Vojaĝo tra la meza baseno de la
Flava Rivero (2): Sanmenxia

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Kampanoj en la Printempa Fes-
to

La Liaoyang-a Kemifibra Urbo
Teatra reĝisoro Wu Jian

Enhavo

Gratuloj al la "Amikoj de Esperanto" de Ĉinio 2

NIA KULTIVEJO:

Esperanto kaj la tria mondo 5

Ĉinaj pentristoj kaj kaligrafoj simpatias nian lingvon 8

ESP-NOVAĴOJ 10

"Ni estas mastroj de la fabriko" 12

La Liaoyang-a Kemifibra Urbo 15

Vojaĝo tra la Meza Baseno de la Flava Rivero (2): Legendo
kaj Realo pri Sanmenxia 19

Jen pavo flugas al sudoriento 22

Proverboj de tibetanoj 49

Inter geedzoj 28

Magia pafistino Wu Lanying 31

MIA VIVO: Ni mastru nian vivon 33

VIDINDAJ LOKOJ: Okcidenta Qiaoshan-monto 26

5000 JAROJ DE ĈINIO: La Periodo de Printempo kaj
Aŭtuno 35

EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Nadmu-
foiro sur stepo 38

Edgar Snow kaj la Movado de la 9-a de Decembro 40

Marko Polo venis denove al Ĉinio 44

AMIKECO 18

Perspektivo por energio de la mondo en la okdekaj jaroj 48

TRA LA MONDO:

Ĉiela muziko el kolombofajfiloj 50

Svatisto-arbo en FR Germanio 51

KURANTAJ AFEROJ 47, 52

KORESPONDI DEZIRAS 17

JARABONTARIFO	FR Germanio	DM	10.80	Italio	Lit.	5280	Nov-Zelando	NZ\$	6.70		
Aŭstralio	SA	5.70	Britio	£	3.00	Japanio	Yen	1400	Svisio	SF	10.50
Aŭstrio	Sch	81.60	Finnlando	FMK	24.00	Jugoslavio	Din.	150	Usono	US\$	6.00
Belgio	BF	180.00	Francio	FF	26.40	Nederlando	Gld.	12.60	Kanado	Can.\$	7.20

Por aliaj landoj en Afriko, Azio kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

GRATULOJ AL LA "AMIKOJ DE ES

Universala Esperanto-Asocio

en konsultaj rilatoj kun Unesko



PREZIDANTO:
S-ro Grégoire Maertens
Pr. Leopoldstr. 51
B-8310 Brugge
Belgio
Telefono: (050) 35 49 35

Mesaĝo de la prezidanto de U.E.A.

La estraro de Universala Esperanto-asocio kun aparta intereso sekvas la agadon de Ĉina Esperanto-Ligo rilate al la informado pri la Internacia Lingvo. Ni gratulas vin pro la starigo de la organizaĵo "Amikoj de Esperanto": ĝi certe multe subtenos ĉel por ankoraŭ pli diskonigi la movadon.

La vortoj de Sinjoro CHU TUNAN impresis min pro la nerefuteblaj konstatoj kun tre realisma pritakso de la fakta situacio en la mondo.

Mi ne dubas ke la forta subteno de la Ĉina movado, konsistanta el Esperanto-parolantoj kaj simpatiantoj, konsiderinde helpas al niaj klopodoj por finfine persvadi la internaciajn instancojn tutmondajn pri la valoro de la praktika aplikado kaj uzado de la Internacia Lingvo.

09 02 1982

A handwritten signature in black ink, appearing to read 'Maertens', with a long horizontal flourish extending to the right.

PERANTO" DE ĈINIO

Universala Esperanto-Asocio

en konsultaj rilatoj kun Unesko



ĜENERALA SEKRETARIO:
D-rino Flóra Szabó-Felső
Zója u. 5/b VII.22
H-7624 Pécs
Hungario
Telefona: (72) 23-274

Pécs, la 28-an de februaro 1982

Al: S-ro Chu Tunan
membro de Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso
vicepres. de Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj
prezidanto de "Amikoj de Esperanto"

Altestimata S-ro Prezidanto,

Kun granda ĝojo mi legis la raporton pri la fondo de nova organizo "Amikoj de Esperanto". Bone kompreninte la signifon, la redakcio de nia centra organo aperigis la detalan artikolon pri la grava evento, por ke la monda esperantistaro nepre estu informita pri tio.

Mem la listo de iniciatintoj estas tre impona, ja ĝi konsistas el nomoj ne nur en Ĉinio bone konataj. Tiel mi certas, ke la internacia reputacio de tiuj personecoj ankaŭ en aliaj landoj favore influos la sintenon al Esperanto. La fondo de via organizo pravigas miajn surloke akiritajn impresojn, ke en Ĉinio nia movado renkontas vere bonajn kondiĉojn.

Estas aparta plezuro por mi, ke vi estis unuanime elektita kiel prezidanto de la organizo. Vi bv. akcepti miajn plej korajn gratulojn. Mi sentas min ege bonŝanca, havinte la okazon longe interparoli kun vi dum mia vizito en Pekino. Mi ĉiam memoros la varman akcepton kaj viajn kuragigajn vortojn rilate la laboron por nia idealo.

Nome de UEA mi dankas al ĉiuj membroj de "Amikoj de Esperanto" pro la apenaŭ mezurebla, tre valora apogo al nia movado, kaj mi deziras al la nova organizo multe da sukcesoj.

Kun estimplenaj salutoj:

Flóra Szabó-Felső
Ĝen. sek. de UEA

GRATULO AL LA "AMIKOJ DE ESPERANTO" DE ĈINIO

1982-02-19



SVERIGES RIKSDAG
TALMANNEN

Al
"Amikoj de esperanto"
Beijing Ĉinujo

Tre estimataj gesinjoroj!

Kun granda ĝojo mi informiĝis pri via novfondita organizaĵo. Homoj kiuj subtenas esperanton montras samtempe ke ili subtenas la principon de interhomaj kontaktoj sur bazo de egal-eco. Mi estas konvinkita ke la utiligo de esperanto plifaciligos ĉiajn internaciajn rilatojn.

Ĉinujo estas granda kaj potenca ŝtato kaj larĝa apogo por esperanto en Via lando certe havos grandan signifon kaj efikon por la antaŭenigo de la ideo pri neŭtrala internacia lingvo.

Esperanto estas taŭga por internacia uzo kaj meritas ĉian subtenon.

Kun koraj salutoj mi deziras al Vi progreson kaj sukceson.

Sincere Via


Ingemund Bengtsson

Prezidanto de la sveda parlamento.



La aŭtoro

ZHANG QICHENG:

NIA KULTIVEJO



Esperanto kaj la tria mondo

Ci-sube estas teksto de prelego farita de la verkinto dum la Dua Kongreso de Pekina Esperanto-Asocio. Espereble ĝi interesos niajn legantojn.

— La Red.

Unue lasu min demandi: Ĉu Esperanto bezonas la trian mondon?

Mia respondo estas pozitiva: jes kaj urĝe.

Por esti vera internacia komuna lingvo Esperanto nepre devas havi universalecon. Sed ĝis nun ankoraŭ mankas al ĝi tia eco. Ĝi estas disvastigata ĉefe en Eŭropo. En la vasta Azio la Esperanto-movado estas konsiderinde forta nur en Japanio, kiu tamen ne apartenas al la tria mondo. Kvankam nia movado disvolviĝas en Ĉinio, oni ne povas diri, ke solidan bazon ĝi jam havas tie. En Pakistano kaj Srilankao la movado sin trovas nur en ĝermo. Eĉ en la vasta Hindio estas nur malgranda nombro da esperantistoj. Pli bonan situacion ĝi havas en Latin-Ameriko, tamen

ĝi disvolviĝas tie nesimetrie. Escepte de Brazilo, Argentino, Ĉilio, Kolombio, Venezuelo, Meksikio kaj Kubo, multaj latin-amerikaj landoj havas nian aŭ nur vegetan Esperanto-movadon. En Afriko ĝi estas tute fremda. Esperanto havos universalecon, nur se ĝi estos vaste disvastigata ankaŭ en la tria mondo, alie ĝi ne meritosian nomon “monda lingvo” en la hana (ĉina) lingvo.

La ĉirkaŭ-cent-jara historio de Esperanto montras, ke unu el la gravaj faktoroj malhelpantaj ĝian progreson estas la superrego de pluraj potencaj lingvoj. Tio estas lingva diskriminacio kaj lingva hegemonio ne tolerebla kaj forigenda. Multaj landoj kaj popoloj de la tria mondo estas suferantoj de tiu diskriminacio kaj ili forte deziras elimini tiun neracian fenomenon

kaj ankaŭ havas grandan forton por batali kontraŭ ĝi. Esperanto tre bezonas la trian mondon por forigi la obstaklon sur sia vojo por marŝi antaŭen. Nun UEA klopodas por disvastigi Esperanton en la sfero de UNO kaj por atingi tiun celon ĝi nepre devas sin apogi sur la fortoj de la membro-ŝtatoj en la tria mondo, kiuj konsistigas tri kvaronojn de la UNO-membraro.

Esperanto estas kreita surbaze de kelkaj ĉefaj eŭropaj lingvoj, el kiuj ĝi daŭre ĉerpas novajn elementojn dum sia disvolviĝo. Ĉu Esperanto povas ĉerpi sian nutraĵon nur el okcidentaj lingvoj? Kompreneble ne! Ĝi devas ĉerpi bonajn elementojn ankaŭ el la lingvoj de Azio kaj Afriko por riĉigi kaj perfektigi sin. Kaj tiurilate nur personoj de la tria mondo estas la plej kompetentaj por fari kontribuon

al Esperanto. Tio signifas, ke Esperanto ankaŭ bezonas la trian mondon por sia evoluado.

La fama japana esperantistoverkisto Akita Ujaku klarvide antaŭdiris: "La estontecon de Esperanto decidis la Oriento." Mi pensas, ke ni povas diri hodiaŭ ke ĝin decidis la tria mondo.

Nu, ĉu la tria mondo bezonas Esperanton?

Mia respondo estas same pozitiva.

Antaŭ sia sendependiĝo la landoj de la tria mondo havis nenian rajton tiel en politiko kaj ekonomio kiel en kulturo. Kaj en la internacia komunikado tute mankis loko por iliaj naciaj lingvoj. Por ili la superrego de potencaj lingvoj estis preskaŭ nerezistebla leĝo. Nun ŝanĝiĝis la situacio, kaj ili gajnis pozicion egalan al tiu de la potencoj almenaŭ teorie aŭ jure. Sed pro ekzisto de la lingva hegemonio ili devas ankoraŭ uzi en internacia komunikado, precipe en diversaj internaciaj organizoj kaj kunvenoj la potencajn lingvojn altruditajn al ili. Sendube tio estas diskriminacio malkonforma al la principo de egaleco de ĉiuj landoj ĉu grandaj aŭ malgrandaj. Se oni uzus en internacia komunikado la neŭtralan Esperanton kiel komunan lingvon, sendube tio estus granda bono por la landoj de la tria mondo.

Pro longtempa ekspluatado kaj subpremado fare de imperiismo, la landoj de la tria mondo restas ankoraŭ en postrestinteco kaj ekonomie kaj kulture, kvankam ili akiris sendependecon en politiko. Ili bezonas disvolvi sian nacian ekonomion kaj nacian kulturon kaj levi sian sciencan

kaj kulturan nivelon, kaj pro tio ili urĝe bezonas havigi al si sciojn pri avangardaj sciencoj. Kaj por akiri tiujn sciojn iliaj gejunuloj devas unue elspezi multan energion kaj multan tempon por lerni la potencajn lingvojn por ilin uzi kiel ponton. Pri tio ni ĉinoj havas tre doloran sperton. La lingvoj de okcidentaj landoj estas tre malfacile lerneblaj por ĉinoj. Sed por lerni iliajn sciencojn kaj teknikojn niaj gejunuloj devas uzi dek, eĉ pli ol dek jarojn por mastri unu el iliaj lingvoj. Kiel granda pago! Se oni povus uzi Esperanton, lingvon relative facile lerneblan, por akiri sciencajn kaj kulturajn sciojn, tio certe alportus grandan oportunon al la popoloj de la tria mondo.

Laŭ la supre diritaj vidpunktoj, ni povas aserti, ke por gajni lingvan egalecon, por sin liberigi de la kateno de potencaj lingvoj kaj por disvolvi siajn proprajn kulturon kaj lingvon, la landoj de la tria mondo tre bezonas tian neŭtralan, facilan internacian lingvon kiel Esperanton.

Ĉar Esperanto bezonas la trian mondon, kaj ankaŭ la tria mondo same bezonas Esperanton, do ilia alianciĝo devas esti sen problemo. Sed efektive mankas nun kondiĉoj por tiu alianciĝo, ĉar la tria mondo ankoraŭ ne bone konas Esperanton, ankaŭ Esperanto ne sufiĉe konas la trian mondon. Krome, la forto de Esperanto restas ankoraŭ tre malgranda*. Multaj en la tria mondo ankoraŭ ne scias kio estas Esperanto. Eĉ en Ĉinio, kie Esperanto jam havas historion de dekoj da jaroj, ĝi restas nekonata por vastaj intelektaj gejunuloj, por ne paroli

pri aliaj landoj de la tria mondo, kie eĉ ne estas semo de nia lingvo. Tio montras, ke esperantistoj de diversaj landoj devas multe propagandi kaj disvastigi Esperanton en la landoj de la tria mondo. Kiamaniere ni povos atingi tiun celon? Laŭ mia opinio, ni devas propagandi unue al intelektuloj de la tria mondo, precipe al iliaj studentoj lernantaj en aliaj landoj, ĉar tiuj intelektuloj kaj studentoj ofte estas pioniroj por enkonduki en sian landon novan ideon kaj novan aferon. Ekzemple, Esperanto estis enkondukita en Ĉinion ĝuste de avangardaj intelektuloj.

Ĉar tiuj, kiuj bone konas Esperanton, ĉefe troviĝas en Eŭropo, ili malbone konas la trian mondon. Ili ne scias almenaŭ ne vere komprenas, kiel malfacile estas por azianoj kaj afrikanoj lerni Esperanton, kiu similas al lingvoj de okcidentaj landoj. Esperanto estas akceptebla por la popoloj de Azio kaj Afriko ĝuste pro tio, ke ĝi estas pli simpla kaj facila ol okcidentaj lingvoj, tamen bone posedi ĝin por ili estas multe pli malfacile ol por eŭropanoj. Tial Esperanto nepre devas teni sian avantaĝon de facileco kaj nur tiel ĝi havas allogocon por la popoloj de la tria mondo. Estas tre bedaŭrinde, ke Esperanto fariĝas ĉiam pli komplika kaj malfacile lernebla. Multaj neologismoj el okcidentaj lingvoj precipe el la angla lingvo estas nenecese enkondukitaj en Esperanton. Mi timas, ke Esperanto eventuale fariĝos en iu tago varianta de iu okcidenta lingvo, ekzemple de la angla. Se tio okazus, mi volus demandi, kia neceso estos por la popoloj de la tria mondo lerni Esperanton? Ĉu ne estus

pli bone por ili lerni lingvojn de okcidentaj landoj? Estas emfazinde ankaŭ, ke Esperanto fariĝos ĉiam pli oportuna por parolantoj de la okcidentaj lingvoj, sed ne por azianoj kaj afrikanoj, se ĝi enhavos ĉiam pli multajn elementojn de la okcidentaj lingvoj, kaj tio nepre reduktos la neŭtralecon de Esperanto kaj sekve alportos fatalan damaĝon al nia lingvo. Pri tio mi prezentos mian opinion en alia artikolo kaj ĉi tie mi ne iros en detalon.

Pro tio ke okcidentanoj povas akiri sciencajn kaj kulturajn sciojn per siaj propraj lingvoj, esperantistoj de la okcidentaj landoj ankaŭ ne bone scias, kion la popoloj de la tria mondo volas akiri pere de Esperanto. Estas ĝojinde, ke aŭdiĝis la forta voĉo de irananoj: Ni bezonas Esperanton por akiri sciojn pri scienco kaj tekniko! Tio ĝuste estas la urĝa postulo de la popoloj de la tria mondo al Esperanto. Nun tre malmultaj estas la Esperantaj eldonaĵoj pri scien-

co kaj tekniko, kiuj tute ne povas kontentigi la bezonon de la tria mondo. Se Esperanto povos plenumi ilian bezonon iom post iom tiuflanke, ĝi certe populariĝos en la tuta mondo. Mi povas senfanfarone aserti, ke milionoj da ĉinoj eklernos Esperanton, se la nombro de ĝiaj eldonaĵoj pri scienco kaj tekniko atingos dekonon de tiu de la anglalingvaj eldonaĵoj. Tial oni devas multe klopodi por servigi Esperanton sur tiu kampo. Pri tio jam komencis atenti UEA kaj la fondo de la Scienca Eldona Centro en Budapeŝto pruvis ĝian klopodon. Ja bona komenco, tamen nur komenco. UEA kaj aliaj internaciaj Esperantaj organizoj kaj personoj ankoraŭ devas multobligi sian penadon en tio.

Nun la forto de Esperanto estas ankoraŭ tre malgranda, ne reale estus, se oni postulus, ke Esperanto rapide disvastiĝu en la tria mondo, ĉar ne nur mankas necesaj objektivaj kondiĉoj sed ankaŭ Esperanto mem ne

posedas la necesajn subjektivajn kondiĉojn. Sed mi profunde kredas, ke nepre venos la tago, kiam Esperanto bone alianciĝos kun la tria mondo. Kun disvolviĝo de la batalo de la tria mondo por egalrajteco en internaciaj aferoj, Esperanto certe estos konata kaj akceptata de ĉiam pli multaj landoj de la tria mondo kiel lingvo egalrajta por ĉiuj. La tria mondo estas la plej fidinda aliancano de Esperanto. Ni tutmondaj esperantistoj devas bone kompreni, varme simpatii kaj aktive subteni la trian mondon en ilia batalo por gajni tiun egalrajtecon. Kaj krome ni devas energie pligrandigi la forton de Esperanto por krei la necesajn kondiĉojn por disvastigo kaj aplikiĝo de nia kara lingvo en la vasta regiono de la tria mondo.

** En tiu ĉi prelego, la koncepto "forto de Esperanto" signifas la vastecon de la cirkulado de Esperanto en diversaj lokoj kaj ĝian aplikadon en diversaj sferoj.*

*Ĉinaj kaj brazilaj
geesperantistoj en
Brazilio*



SHI SIWEI:

Ĉinaj pentristoj kaj kaligrafoj *simpatias nian lingvon*

MULTAJ ĉinaj eminentuloj estas simpatiaj al nia movado. Inter ili troviĝas fama pentristo kaj kaligrafo Zhang Xinjia, membro de la Jiangsu-a Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco; fama kaligrafo Fei Xinwo, reprezentanto de la Popola Kongreso de Jiangsu-provinco; kaj metiisto pri bildo-subaĵo Xie Genbao, membro de la Jiangsu-a Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

Je la 122-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, mi kaj veteranaĵ esperantistoj Zensto kaj Hang Li vizitis ilin.

Ni unue venis en la pentrejon de Zhang Xinjia. Li estas fama pentristo de Wumen-skolo de la ĉina stilo. Wumen estas antikva nomo de la urbo Suzhou, kaj Wumen-skolo estas fama en la ĉinaj belartaj rondoj pro sia pentraĵo kun poemo. Jam duonjarcenton Zhang Xinjia okupiĝis pri pikturo kaj kaligrafio. Iam li instruis en la Suzhou-a Belarta Kolegio, kaj belartistoj kulturitaj de li troviĝas ĉie en Ĉinio. Liaj pentraĵoj kaj kaligrafoj estis eksponataj en Japanio, Usono, Kanado kaj Aŭstrio kaj en Hongkong. Kvankam 73-jara, li laboras vikle kaj senlace.

Kiam ni eniris en lian pentrejon, li vidis verdan stelon sur nia brusto kaj salutis nin ride-tante: "Bonvenon al vi esperantistoj!" Li ja antaŭlonge konis

Esperanton kaj varme helpis Esperantan laboron. Por festi la naskiĝtagon de Zamenhof, ni petis lin verki poemon kaj fari pentraĵon. Li kapjesis kaj laŭdis, ke Zamenhof postlasis al la homaro valoran lingvan riĉaĵon.

Li prenis ekzempleron de EPC kaj komencis voĉlegi. Li diris, ke en sia juneco li tre amis fremdajn lingvojn, kaj la radikoj de multaj bazaj vortoj de Esperanto similas al tiuj de la angla lingvo kaj ĉiu litero estas facile prononcebla. Montrante Zenston kaj Hang Li, li diris al mi: "Ili estas miaj malnovaj esperantistoj-amikoj kaj laboris per Esperanto jam 40-50 jarojn. Ili ofte konigas al mi la lingvon. Kvankam mi

maljuniĝis, tamen mi devas daŭre subteni la Esperantan laboron." Kaj li tuj improvizis la jenajn versojn: "Intima amiko trans maro ja estas proksima najbaro; senbaras jen interparolo, kaj l' pacon prikantas libraro." Li donis al mi la skribaĵojn kaj diris, ke mi transdonu liajn bondezirojn al la monda esperantistaro.

La ĝoja interparolado vekis lian fortan deziron fari pentraĵon. Li diris humure: "Nun regas la frosta vintro kaj vi ĉiuj estas esperantistoj, mi faru do la pentraĵon 'Tri Amikoj en Frosta Vintro!'" La tri amikoj estas pino, bambuo kaj umearbo. La pino kaj bambuo ne velkas en vintro kaj la umearbo donas florojn en frosto. La maljunulo diris: "La tri plantoj ne timas malvarmon, kaj ili estas elprovitaj. Ankaŭ Esperanto spertis ĉiajn provojn kaj finfine fariĝis tre utila lingvo." Ĉifoje li pentris umeflorojn ne ruĝaj sed verdaj. Li diris: "La verda koloro estas bela simbolo de Esperan-

Zensto (meze) prezentas al Fei Xinwo la ĉinan Esperantan movadon. Maldekstre estas la aŭtoro Shi Siwei.



to kaj mi donacas tiun ĉi pentraĵon speciale al esperantistoj.” Ni tre dankis lin pro lia afableco kaj simpatio.


Elirinte el lia pentrejo, ni vizitis la 80-jaran kaligrafon Fei Xinwo. Ankaŭ li estis pentristo antaŭe, sed poste pro sufero de artika tuberkulozo li ne povas teni penikon per la dekstra mano, do li kun firma volo ekzercadis la maldekstran manon por ĝin servigi al skribado. Fine li fariĝis fama kaligrafo de nia lando. Nun li estas konsilanto de la Ĉina Kaligrafia Asocio kaj vicprezidanto de la Kaligrafia Ligo de Jiangsu-provinco. Kiam ni venis al li, li streĉe laboris en sia ĉambro por ekspozicio de siaj kaligrafiaĵoj en Tokio kaj Osaka de Japanio. Li tre ĝojis ekvidinte nin kun verda stelo sur la brusto. Por festi la naskiĝtagon de Zamenhof, laŭ nia peto la maljunulo skribis jenajn vortojn per la maldekstra mano: “Ĉiuj landoj en solidareco, paco kaj amikeco”. Li diris: “Jen mia bondeziro al la esperantistoj.”

Adiaŭinte la du maljunulojn, ni venis al la hejmo de Xie Genbao, fama metiisto de Suzhou pri bildo-subaĵo.

Jam 55 jarojn li sin okupis pri bildo-subaĵoj. Li estas tre lerta en sia metio. Pentraĵo kiel ajn difektita povas reakiri sian originalan aspekton dank’ al lia zorga rebonigado. Nova pentraĵo post lia aranĝo fariĝas ankoraŭ pli eleganta kaj plaĉa.

El liaj kvin gefiloj kvar estas tiaj metiistoj. Ni petis lian filinon Xie Xiaojuan fari subaĵon al la pentraĵo kaj skribaĵoj, donacitaj de Zhang Xinjia kaj Fei Xinwo al ni. Sub la gvido de sia patro ŝi bone plenumis la taskon. Xie Genbao diris: “Tiuj ĉi verkoj estas dediĉitaj al esperantistoj. Antaŭe miaj gefiloj Xie Guanghan kaj Xie Xiaojuan lernis Esperanton. Foje Xie Guanghan akceptis en Suzhou eksterlandajn esperantistojn. Li havas japanajn leteramikojn. Kaj nia tuta familio havas profundajn sentojn por Esperanto.”

Zhang Xinjia pentras por esperantistoj.



“Ĉiuj landoj en solidareco, paco kaj amikeco”, la vortoj skribitaj de Fei Xinwo por la 122-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.



“Tri Amikoj en Frosta Vintro” pentrita de Zhang Xinjia

ESPERANTO-KURSOJ FUNKCIIS EN YUNNAN-PROVINCO

En la vintraj lernejoj ferioj en la lasta januaro, kunage kun Yunnan-universitato kaj la Zhonghua-a Postlabora Lernejo de Kunming, la Yunnan-a Esperanto-Asocio funkciigis rapidan kurson kaj konversacian kurson de Esperanto, en kiuj lernis 160 homoj el diversaj lokoj de la provinco.

Por perfektigi la lernantojn de ambaŭ kursoj la asocio invitis Li Weilun, docenton de la Pekina Lingvo-Instituto, kiel kursgvidanton. La rapidkurso konsiderinde progresis, ĉar plejparto de la kursanoj estas profesoroj, docentoj, tradukistoj kaj inĝenieroj, kiuj konas tiun aŭ alian eŭropan lingvon. Nemalmultaj el la kursanoj aliĝis al la asocio post sia lernado.

ESPERANTO PROPAGANDATA EN LIUZHĤI

Post sia fondiĝo en la lasta junio, la Esperanto-Asocio de Liuzhi-a Speciala Distrikto, Guizhou-provinco, funkciigis unu post la alia du Esperanto-kursojn kun ĉ. cent lernantoj, aranĝis ses montrofenestrojn pri Esperanto, kompilis la instrumaterialon "Aboco de Esperanto", redaktis la malgrandan gazeton "Verda Stelo" kaj distribuis pli ol 300 ekzemplerojn de Esperantaj libroj.

ESPERANTA AGADO DE LA ŜANHAJA MARTRANSPORTA INSTITUTO

Dum la lastaj jaroj la Ŝanhaja Martransporta Instituto tre viglis en disvastigo de nia lingvo. Post sia fondiĝo en majo 1981, la studrondo de la instituto okazigis la unuan Esperanto-kurson kaj aranĝis la duan en februaro ĉi-jare, en kiu lernis 40

homoj. Krome ĝi okazigis ankaŭ Esperanto-ekspozicion, kiun vizitis 1,200 interesitoj.

"MODERNA EKSTERLANDA LITERATURO" DISKONIGAS LA ESPERANTAN LITERATURON

En la unua numero de 1982 de la gazeto "Moderna Eksterlanda Literaturo" aperis la artikolo "La Esperanta Literaturo" verkita de s-ro Ye Junjian. Li sisteme prezentis en la artikolo la historion kaj nunan staton de la Esperanta literaturo kaj koncize traktis verkojn de iuj famaj verkistoj en diversaj periodoj kaj karakterizaĵojn de tiuj verkoj.

PLIAJ ESPERANTO-KURSOJ EN ĈINIO

La Scienc-teknika Komitato de Baoqing-gubernio, Heilongjiang-provinco, okazigis en decembro pasintjare sian unuan Esperanto-kurson vizitatan de sciencistoj samrangaj kiel aŭ pli altrangaj ol asista inĝeniero. La kurson gvidis elektronika inĝeniero Song Jiwu. La kursanoj konas unu aŭ du aliajn fremdajn lingvojn. Post sia 30-taga lernado ili jam posedis rudimentajn sciojn de Esperanto.

La Esperanto-Instituto de Anhui-provinco funkciigis en sia ĉefurbo Hefei rapidan kurson de Esperanto,

en kiu lernis pli ol 120 instruistoj kaj teknikistoj.

La Laborista Kulturdomo de la urbo Wuxi havas nun kvar Esperanto-kursojn kun ĉ. 200 homoj. Ilin gvidas esperantistoj el la urba Esperanto-grupo.


Por doni elementajn sciojn de Esperanto, la Ŝanhaja Esperanto-kurso akceptis 150 interesitojn.

La laborsindikato de la Oka Mezlernejo de la urbo Zhenjiang, Jiangsu-provinco, aranĝis Esperanto-kurson kun veterana esperantisto Wang Chongfang kiel ĝia gvidanto.

Kaj tiaj kursoj okazis ankaŭ en Xi'an, Kantono, Hangzhou kaj aliaj ĉinaj urboj.

ESPERANTO-INSTRUADO EN LERNEJO DE LOCARNO, SVISLANDO

En Locarno nun okazas la plej grava Esperanto-agado en la kantono Tiĉino. La nelacigebla emerita lerneja inspektoro Dante Bertolini, 71-jara, instruas en kvar kursoj. Dante Bertolini estas fame konata tra la tuta kantono ĉefe per siaj verkistaj aktivadoj. Tio, kio meritas elstaran mencion, estas la praktika porinstruista lernejo en Locarno. Tie li okupiĝas pri instruado de Esperanto en la kvara elementa klaso. Oni eksperimentas novajn metodojn aŭ novajn materialojn. La



Membroj de la Esperanta studrondo de la Ŝanhaja Martransporta Instituto preparas Esperantan ekspozicion.

kurso, kiu komenciĝis lastan septembron, daŭros du jarojn, po du lecionoj semajne. La Esperanto-instruado okazas kun konsento kaj sub kontrolo de la edukdepartemento, kiu fine de la eksperimento faros komparajn testojn por kontroli la influon de la Esperanto-lernado sur lingvistudado.

NOVA PROGRESO EN SVEDIO

Por la unua fojo en Svedio Esperanto eniros la ordinaran lernejan programon de unu lernejo ekde aŭtuno de 1982, kie ĝi havos la saman statuson kiel la franca kaj germana lingvoj. Tion decidis en kunsido la komunuma lerneja estraro en Nyköping, Svedio, kaj jen estas grava paŝo antaŭen por la Esperanto-movado en tiu lando.

Ĉiuj samideanoj sendu gratulojn letere aŭ poŝtkarte al Skolstyrelsen 1, Nyköpings kommun, Fack, S-611 83 NYKÖPING, Svedio.

SOCIETO ANDREO CSEH FONDIĜIS

S-ano E. Borsboom, Sanderuslaan 20, NL-3732 ET De Bilt, Nederlando, fondis la 1-an de januaro 1982 "Societo Andreo Cseh". Ĝi celas enarkivigi la Cseh-ajojn kaj stimuli la Cseh-ologojn kaj interesi-tojn.

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO DE TANEF EN CAVIGLIANO

Ankaŭ en 1982 TANEF (la Turista Asocio "La Naturamikoj" Esperanto-Fako) organizos Internacian Ferio-Semajnon, de la 4-a ĝis la 11-a de septembro en la plej suda parto de Svislando, en la kantono Tiĉino. Pli precize, en la ĉarma vilaĝeto Cavigliano, kiu situas en Pedemonte.

Matene eblos lerni Esperanton aŭ profundigi sian lingvo-scion en tri diversgradaj kursoj, dum posttagmeze oni ekskursos kaj migrados kaj vespere ĝuos distrajn programojn. Por aliĝo skribu al E. Doring, poŝtfako 225, CH-4003 Basel, Svislando.

LA 16-A INTERNACIA KONFERENCO DE ILEI

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigos sian 16-an Internacian Konferencon de la 15-a ĝis la 24-a de julio 1982 en Seiano di Vico Equense, proksime al Napolo, Italio. Aliĝilo kaj provizora programo estas haveblaj de s-ro Rolando Incoronato Pia, via Panoramica 63, I-80056 Ercolano, Italio.

ESPERANTO EN ITALA LERNEJO

En la lernojaro 1980-81, ĉe la elementa lernejo "CEP" en Cagliari, Italio, 154 geknaboj 8- kaj 11-jaraj studis la Internacian Lingvon dum kvar horoj ĉiusemajne. La plej interesaj spertoj pri la kursoj aperis en raporto presita en Esperanto kaj la itala lingvo. Inf.: Scuola Elementare Statale "CEP", Settore Esperanto, via Flavio Gioia, I-09100 Cagliari.

AMIKA KUNLABORO INTER ESPERANTISTOJ DE DU AMIK-URBOJ EN ĈINIO KAJ JAPANIO

En 1981 la geesperantistoj de Hukuoka, Japanio, sukcesis starigi novan amikan rilaton kun gesam-

ideanoj de Kantono, Ĉinio, kiu estas amikurbo de Hukuoka.

Trovinte en la n-ro 4 de EPC 1981 la artikolon pri la ekfunkciigo de prepara grupo por la fondo de Esp. asocio en Kantono, s-ano Mori Singo de Hukuoka tuj sendis mesaĝon al tiu grupo esprimante gratulan saluton kaj proponon pri kunlaboro. Li ricevis jesan respondon de la grupo, kaj poste okazis kelkfoja interŝanĝo de leteroj inter li kaj ĉinaj geesperantistoj. Ili promesis reciprokan klopodon por la disvastigo de Esperanto en ambaŭ hejmurboj.

Pli poste, antaŭ la tago de la Zamenhofa Festo en 1981, junaj membroj de Hukuoka Esperanto Societo ricevis 12 amikecplenajn leterojn de komencantoj en Kantono, kiuj ĵus finis elementan kurson. Pri tiu ĉi nova kunlaboro inter la du amikurboj s-ano Mori Singo faris raporton al la ĉeestantoj de la kunsido de Zamenhofa Festo. Regis ĝoja atmosfero, kaj tiu festo fariĝis tiel serioza kaj signifoplena, kian ili neniam antaŭe spertis.

Nun grupo da Kanton-Hukuokaj plumamikoj aliĝis al la amikaj aktivecoj de la esperantistoj de la du amikurboj, kaj estiĝas la espero, ke ankoraŭ pli multaj plumamikoj naskiĝos.

Kunsido de Zamenhofa Festo en Hukuoka de Japanio





Laborista reprezentanto Wang Ronggen prezidas la kongreson.

GUO LIHUA:

“NI ESTAS MASTROJ

enketadon kaj skribis raporton. En la komenco de 1980, la reprezentantoj plene diskutis la aferon kaj faris decidon, ke la jara produktokvanto de koakso reduktiĝu ĝis 132,000 tunoj. Dank’ al tio altiĝis la kvalito kaj la sintezaj normoj de koakso atingis 99.25%.

La kongreso ludis gravan rolon ankaŭ en pliproduktado de benzolo, kiu estas ĉefa fonto de profito de la fabriko. En 1979 ĝi produktis pli ol 7,000 tunojn da benzolo. En la lastaj du jaroj ĝi havas debiton en- kaj eksterlande. La fabrikestro prezentis al la partia komitato de la fabriko jarproduktan planon de 10,000 tunoj da benzolo por 1980. Tamen la partia komitato, post diskutado, iom hezitis pri la plano kaj prezentis ĝin al la reprezentantoj. Post diskutado la lastaj unuanime aprobis la planon kaj samtempe elmetis tri konkretajn metodojn, tiel ke la jarprodukta plano fariĝis rezolucio de la kongreso kaj la tasko de la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko. Ĉar ili estis fervoraj en laboro kaj la tri metodoj efektive aplikitaj, la fabrikestro firme kredis ke la plano sukcesos. En la jarfino la produktokvanto de benzolo atingis 12,000 tunojn, el kies eksportita parto oni ricevis 2.03 milionojn da usonaj dolaroj. Dank’ al tio ankaŭ laboristoj kaj oficistoj ricevis pli da monpremio. La

LASTATEMPE mi vizitis la kongreson de la reprezentantoj de la laboristoj kaj oficistoj de la gasfabriko Wusong en Ŝanhajo kaj intervjuis Gong Dexin, prezidanton de ĝia sindikato. Antaŭ ĉio li diris: “Ni regule okazigas la kongreson de la laboristoj kaj oficistoj. Tio estas bona sistemo, ĉar ĝi havigas al la laboristoj kaj oficistoj kvin rajtojn por administri la entreprenon, nome rajtojn de ekzameno, decido, inspekto, elekto kaj proponado. Tiamaniere ni plene elvolvas aktivecon de la laboristoj kiel mastroj de la entrepreno.”

La fabriko situas en la norda antaŭurbo de Ŝanhajo kaj havas pli ol 1,700 laboristojn kaj oficistojn. Ekde 1979, la fabriko restarigis la kongresan sistemon sub la gvido de la partia komitato de la fabriko kaj prenis ĝin kiel gravan rimedon por plibonigi administradon. En la pasintaj pli ol du jaroj, la kongreso kun pli ol 190 reprezentantoj diskutis kaj ellaboris la jarproduktan kaj administran planojn de la fabriko, ekzamenis pli ol 770 proponojn elmetitajn de reprezentantoj kaj faris 56 bonajn

aferojn por la laboristoj kaj oficistoj.

DECIDI GRAVAJN AFEROJN DE LA ENTREPRENO

Koakso kaj benzolo estas du ĉefaj kromproduktaĵoj de la fabriko. En la pasintaj kelkaj jaroj, la gvidantoj de la fabriko emfazis nur produktokvanton. Por pliprodukti koakson oni trouzis la malnovajn maŝinojn kaj ekipaĵojn. Sekve de tio la koaksa forno funkciis ĉiam pli malbone jaron post jaro. Kvankam la produktokvanto de koakso altiĝis, tamen ĝia kvalito malaltiĝis kaj akcidentoj okazis senĉese. Laboristoj diris malkontente: “Homo maljuna devas emeritiĝi, kaj neniu povas resti ĉiam en juneco!” Post la restariĝo de la kongresa sistemo la reprezentantoj prezentis nemalplimultajn proponojn rilate la jarproduktan taskon de koakso por 1979. Fine laŭ ilia unanima aprobo, la produktokvanto de koakso por 1979 estis reduktita de 142,000 tunoj en 1978 ĝis 136,000 tunoj. Post la kunveno, la teknikistoj kaj laboristoj de la koaksoprodukta laborejo pluapaŝe faris detalan

DE LA FABRIKO”

fabrikestro ĝoje diris: “Nur kiam la kongreso de la laboristoj kaj oficistoj rajtas decidi la produktan planon, la gvidantoj kaj laboristoj povas havi komunan lingvon kaj la produkto povas senĉese disvolviĝi.”

La kongreso de la fabriko ankoraŭ diskutis kaj ellaboris la premiodonan metodon kaj la administran regularon de la fabriko. En januaro 1980, iuj reprezentantoj proponis ellabori disciplinan regularon de la fabriko, la fabrikestro organizis koncernajn kadrojn fari projekton kaj prezentis ĝin al la kongreso por ekzamenado. La reprezentantoj faris esploradon kaj opiniis ke iuj difinoj en ĝi estas tro severaj en monpunado, kio damaĝos fervoron de la laboristoj, la ĉefa rimedo devas esti edukado. Akceptinte la proponojn de la reprezentantoj, la fabrikestro faris revizion al la projekta regularo. Sur la bazo de tio ĝi aprobis praktikeblan regularon. La disciplina regularo de la fabriko estis oficiale publikigita kaj observata de la laboristoj kaj oficistoj.

SOLVI PROBLEMOJN INTERESAJN POR LA LABORISTOJ KAJ OFICISTOJ

Solvo de konkretaj problemoj interesaj por la laboristoj kaj oficistoj estas ŝlosilo sukcesigi la kongreson de la reprezentantoj kaj altigi ĝian prestiĝon inter ili.



La Tria Sesio de la Oka Kongreso de Laboristoj kaj Oficistoj de la gasfabriko

La kongreso diskutis kaj solvis la problemojn ne nur pri produktado, sed ankaŭ pri bonstatego de la laboristoj kaj oficistoj. Ĉiufoja kongreso de la fabriko klopodis solvi kelkajn tiufan-kajn problemojn laŭ konkretaj kondiĉoj.

Pli ol 200 laboristoj de la koaksoprodukta laborejo faris penigan kaj malpuran laboron, tial iliaj laborvestoj estas ofte malpurigitaj de karbopolvo. Ili forte esperas, ke la fabriko aĉetos lavmaŝinon por lavi la laborvestojn. Tiaj bagatelaj aferoj neniam estis metitaj en la tagordon de la partia komitato kaj fabrikestro. Pro tio, la problemo estis longe ne solvita. En 1979, post la restariĝo de la kongresa sistemo la reprezentantoj unue diskutis la problemon aĉeti lavmaŝinon kaj konsentis starigon de vestolavejo, kaj proponis, ke la administrejo rapide solvu la problemon. Nun, ĉiu ajn laboristo povas porti siajn vestojn al la lavejo kaj repreni ilin en la sekvinta tago.

La olegaso estas venena. Por malmultigi kontakton de la laboristoj de la olegasa laborejo



Reprezentanto parolas en la kongreso.

kun la gaso, la kongreso kaj la gvidantaro de la fabriko decidis, ke la laboristoj de la laborejo povas ripozi du tagojn post laborado de ses tagoj. Ili iniciate petis la superan instancon konsenti, ke la fabriko efektivigu novan difinon: tiuj laboristoj kaj oficistoj, kiuj rekte kontaktas la venenan gason, ĉiujare povas alterne ripozi dek kvin tagojn en sanatorioj en la pitoreskejoj la Okcidenta Lago aŭ Taihu-lago.

En la pasintaj pli ol du jaroj, la kongreso solvis nemalmultajn malfacilojn por la laboristoj kaj oficistoj, ekzemple: paŝon

post paŝo plibonigi ilian loĝadon kaj manĝaĵojn de laborista kaj oficista manĝejo kaj plivastigi infanĝardenon k.a. Dank' al la prizorgo de la fabriko en la vivo multe altiĝis la entuziasmo de la laboristoj kaj oficistoj.

SUBTENO DE LA FABRIKA GVIDANTARO

Antaŭ ĉiuj kongreso la gvidantoj de la fabriko venas al la laborejoj por aŭskulti opiniojn kaj postulojn de laboristoj kaj oficistoj. En la kongreso gvidantoj de la fabriko faras al reprezentantoj raporton pri administra laboro kaj plenumo de la rezolucioj de la antaŭa kongreso, por ke la reprezentantoj konu la tutan staton de la fabriko. Ili prezentis gravajn problemojn de la fabriko unu


post alia por konsiliĝi kun la reprezentantoj. Ili klopodis pli rapide kaj bone trakti la proponojn de la reprezentantoj.

Pasintjare la fabriko faris reguligon kaj intencis pliiĝi la produktokvanton de gaso je kvarono. La supera instanco sankciis la totalan investon de 22,000,000 juanoj por la plikonstruado. Tio estis la plej multe-elspeza konstruo de la gasfabriko. La gvidantaro de la fabriko emfazis, ke oni nepre devas sin apogi al amasoj en ellaboro de la projekto. La fabrikestro proponis okazigon de la kongreso por tion diskuti. Por ke ili plene donu siajn opiniojn pri la projekto, la gvidantaro de la fabriko mimeografis la projekton kaj ĝin disdonis al la reprezentantoj. Krome, la projektistoj venis al la

grupoj kaj detale konigis al la reprezentantoj, kiel formiĝis la projekto kaj kiajn bonojn kaj mankojn ĝi havas. La diskutado iris tre vigle. En diskutado pri konstruado de la gasrezervujo aperis du malsamaj opinioj: Iuj opiniis, ke la gasrezervujo konstruiĝu poste, kio ne influos la normalan produktadon nek reduktos la investon. Aliaj opiniis, ke oni devas unue konstrui la rezervujon, kio utilos al sekura produktado kaj garantios la kvaliton de gaso. Post diskutado, esplorado kaj komparado, fine oni koncentris la bonojn de la du opinioj kaj faris la projekton pli reala kaj racia.

Kiam mi finis mian intervjuon, Gong Dexin fiere diris al mi: "Nun ni vere estas mastroj de la fabriko!"

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Ŝanhajo
2. Liaoyang
3. Sanmenxia
4. Okcidenta Qiaoshan-monto
5. Wuxi
6. Chengde
7. Interna Mongolio

La Liaoyang-a kemifibra urbo

ANTAŬ nelonge mi ekveturis de Pekino per trajno nord-orienten kaj post dek kvar horoj atingis la antikvan urbon Liaoyang norde de la Granda Muro. Tie troviĝas la Ĝenerala Petrol-kemifibra Kompanio de Liaoyang — la plej granda kemifibra entrepreno de Ĉinio. La kompanio fondiĝis en 1980 kaj oficiale ekproduktis en 1981. Ĝia produktokvanto de sintezaj fibroj en tiu jaro konsistigis kvinonon de la totala produktokvanto de kemiaj fibroj de la tuta Ĉinio.

La urbo situas inter la industria urbo Shenyang kaj la ŝtala urbo Anshan. En ĝia sud-orienta parto estas la valo Baihuatun kun areo de 780 hektaroj, kiu estas ĉirkaŭata de montoj en tri flankoj alfrontas riveron en la alia. Ĝin trapasas granda dukto kondukanta petrolon de Daqing al Dalian. Ĉar tie abundas akvofontoj kaj energio, oportuna fervoja trafiko kaj funkcias pluraj olerafinejoj kaj tekstilaj fabrikoj, la ĉina registaro decidis investi tri miliardojn da juanoj por konstrui tie grandan kemifibran entreprenon, kies konstruado komenciĝis en la fino de 1974.

Akompanate de kamarado Liu de la kompanio, mi vizitis tiun novan “kemifibran urbon”. Strio da salikoj kaj gazonoj dividas ĝin en du partojn: norde de la strio estas produkta distrikto,


kie staras dek du fabrikoj, kaj sude de la strio estas loĝkvartalo, kie viciĝas 208 loĝdomoj kun kvindek mil loĝantoj, ili estas laboristoj kaj oficistoj de la kompanio kaj iliaj familianoj. En la “kemifibra urbo” estas movoplena komerca kaj kultura centro, kompleta sistemo de scienca esplorado kaj edukado kaj bone ekipita malsanulejo.

Dum rigardado de la fabriko Liu diris al mi, ke krom tri kompletoj da ekipaĵoj kaj aliaj ekipaĵoj por komunikado kaj transportado fabrikitaj de Ĉinio mem, la kompanio havas ankaŭ 25 kompletojn da avangardaj ekipaĵoj importitajn el Francio, FR Germanio, Italio kaj Japanio.

Tie la plej okulfrapaj estas la centralizite regataj ekipaĵoj por kemia reakciado. En fabrikdomoj laboras tri specialaj produktaj linioj por plasto, poliestero kaj nilono. La granda dukto kondukas petrolon en globan kaj cilindran cisternojn, kie ĝi fariĝas materialoj por plasto aŭ grajnaj materialoj por sintezaj fibroj. Ĉiutage oni produktas ĉ. cent tunojn da blankaj poliesteraj fibroj mallongaj kaj dudek tunojn da nilonaj fibroj longaj.

La tiea provizado de elektro kaj akvo multe interesis min. Ĉiutage la akvoprovizejo de la kompanio bezonas ducent kvindek mil tunojn da akvo enkondukitajn el rivero kaj poste ellasas la akvon en basenon por biologia traktado. Tie oni ĉiuhore povas trakti mil sescent tunojn da malpura akvo. En la traktita akvo oni bredas fiŝojn por observi, ĉu la kvalito de la akvo atingis la normon aŭ ne. Proksime de la akvoprovizejo estas termoelektrajo, kiu ĉiuhore provizas la urbon per centmil kilo-

Parto de la kompanio





Laborista loĝkvartalo

vattoj da elektro kaj 2,200,000 tunoj da vaporo. Montrante la grandan dukton apud la vojo, Liu diris: “Per ĝi nia fabriko kondukas la eluzitan vaporon al la loĝantaro por hejtado kaj tio multe ŝparas energion.”

En la kompanio mi intervjuis ĝian vicĉefingenieron Ren Daoyuan. Li estis diplomito de la kemiindustria fakultato de la Universitato de Zhejiang en la kvardekaj jaroj. Li diris, ke kun la disvolviĝo de la petrolo industrio de Ĉinio fondiĝis en la pasintaj jaroj en Ŝanhajo kaj Tianjin fabrikoj por produkti poliesteron kaj orlonon. Krom poliestero kaj mallongaj poliesteraĵoj la kompanio produktas grandkvante ankaŭ nilonon, longajn nilonajn fibrojn, polivinilon kaj polipropirenon, kiujn Ĉinio en la pasinteco importis.

“La kemiaj fibroj produktitaj de la kompanio en unu jaro sufiĉas por produkti 1.3 miliardojn da metroj da ŝtofo kaj se oni uzas ĝian plaston produktitan en unu jaro por fari diversajn objektojn, oni povas ŝpari per tio 20,000 tunojn da ŝtalo.”

Koncerne al mia demando, ĉu estas malfacile por laboristoj

lerni avangardajn teknikojn, Ren Daoyuan diris: “Ni havas sume pli ol trimil inĝenierojn kaj teknikistojn, kiuj konsistigas seponon de la totala nombro de la laboristoj kaj oficistoj de la kompanio. Plejparto de ili estis diplomitoj de altlernejoj en la sesdekaj jaroj. Komence ni iom maltrankviliĝis, ĉu ili povos bone manipuli tiujn modernajn ekipaĵojn. Tamen la fakto pruvis, ke dank’ al tio, ke ili diligente absorbiĝis en studado de novaj teknikoj kaj modeste lernis de eksterlandaj fakuloj, ili tre rapide posedis la novajn teknikojn kaj iuj el ili eĉ renovigis ilin.”

La kompanio ne nur atentis produktadon, sed ankaŭ bone zorgas pri la vivo de siaj laboristoj kaj oficistoj.

En la kompania loĝkvartalo mi vidis televidajn antenojn sur tegmentoj de multe da domoj, kies apartamentoj konsistas el unu kaj duona, du, tri aŭ kvar ĉambroj kaj estas ekipitaj per aparatoj por hejtado, gasprovizo kaj banado. Nun tie en nova kvartalo enloĝiĝis pli ol dekmil familioj de laboristoj kaj oficistoj, kiuj plejparte eniris en la kompanion antaŭ 1975. Kaj no-

vaj loĝdomoj konstruiĝas kaj konstruiĝos, por ke ĉiuj laboristoj kaj oficistoj loĝantaj relative malproksime de la kompanio havu lokon tie.

Mi vizitis laboristan familion. La 54-jara mastro Xue Changhou estas maŝinriparisto de la kemifibra fabriko sub la kompanio.

En la periodo de la Kontraŭ-japana Rezistmilito (1937-1945) li laboris kiel kulio en tekstila fabriko funkciigata de japanoj en Dalian. Tri familianoj loĝis en malgranda ĉambro kun plankareo de tri kvadrataj metroj. Nun lia familio havas dek membrojn, kiuj okupas du apartamentojn kun plankareo de sepdek kvadrataj metroj. Lia edzino baldaŭ emeritiĝos. Liaj tri filoj laboras respektive kiel ŝoforo, ŝarĝisto kaj manipulisto; lia unua filino estas analizisto, liaj dua kaj tria filinoj kaj bofilino estas lertaj bobenistinoj. Karesante la nepeton en sia sino Xue diris: “Venontjare la etulo vizitos infanĝardenon, kaj poste li povos eniri elementan kaj mezgradan lernejojn kaj eĉ la kemifibran instituton, kiuj ĉiuj estas funkciigataj de la kompanio. Ili estas infanoj de la feliĉa tempo.”

Dum nia interparolo revenis liaj du filinoj. Mi demandis ilin pri ilia trafikilo por iri al la laboro. La plijuna fratino diris, ke la kompanio disponigas 80 busojn por veturigi siajn anojn al la laboro kaj krome ankaŭ specialajn aŭtobusojn por veturigi infanojn al siaj infanĝardenoj.

Je mencio pri la familia vivo de Xue, li diris al mi, ke ĉiumonate la familio enspezas sume sepcent kvindek juanojn, el kiuj trionon oni elspezas por manĝa-

ĵoj, lupago de la loĝejo kaj konsumita elektro kaj akvo, dum la aliaj du trionoj estas uzataj por aĉeti vestaĵojn kaj simile. En la hejmo de Xue mi vidis multajn novajn meblojn preparitajn de la gepatroj por edziĝo de iliaj gefiloj.

Adiaŭinte la familion de Xue mi venis al la Orienta Strato — centro de la loĝkvartalo. Norde

de ĝi estas prilaborejoj de grenoj, manĝaĵoj kaj viando kaj vinfarejoj. Sudoriente de ĝi staras integra hospitalo, kiu havas kvarcent malsanulajn litojn. Ĝi havas tra la tuta urbo tri ambulatoriojn kaj naŭ klinikajn serpunktojn.

La tieaj manĝaĵbutikoj havas rilaton kun 22 produktaj taĉmentoj en la ĉirkaŭurbo, kiuj regule

liveras al ĝi freŝajn legomojn kaj fruktojn. La kompanio ankaŭ mem funkciigas laktejon kaj fruktoĝardenon, kiuj speciale liveras fruktojn kaj lakton al la infanĝardenoj kaj hospitalo. Iuj laboristoj ĝoje diris al mi, ke ili povas aĉeti tie vintran bambuidon kaj florbrasikon malfacile akireblajn en aliaj lokoj de norda Ĉinio. Ilia vivo estas facila kaj komforta.



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 interna respondokuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 respon. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Esperantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPĈ povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

La Red.

* La "Weltbundzum Schutze des Lebens" (Tutmonda Unio por Vivprotektado), poŝtkesto 6, A-5033 Salzburg, Aŭstrio, deziras kontaktiĝi kun esperantistoj medinatur- kaj vivprotektantoj el la tuta mondo.

* Ges-roj Jean Costes, Rieucourt Terssac, 81150 Marssac Sur Tarn, Francio, komencantoj, 44-47

jaraj, deziras korespondi kun ĉiuj landoj en ĉiuj temoj.

* S-ro Didier Cazottes, La Gorsse, Les Balitrans, 81600 Gaillac, Francio, komencanto, 20 jara, deziras korespondi kun samagul(in)oj de ĉiuj landoj.

* S-ro Claude Taillole, 34 chemin du Gô, 81000 Albi-Francio, komencanto, 40 jara, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, ekster Okcidenta Eŭropo.

* S-ino Isabelle Bru, 18 avenue Marechal Foch, 81000 Albi, Francio, komencantino, 45 jara, deziras korespondi kun ĉiuj landoj precipe kun Sovetunio.

* 27-jara instruistino, Magdaleme Maria Lukowska, ul. Tagore 1m 14, 93-503 Lodź, Pollando, vol. kor. k. interŝ. p.k.

* Beata Novak, 18-jara lernanto, volas interŝanĝi b.k. kaj p.m., 50-221 Wroclaw, ul. B. Tomasza 16/20, Pollando.

* S-ro ANTONIO RIETTI, Estrato/Mas Ramonet 16, Canet de Maro, Barcelona — Hispanio, deziras ko-

respondi tutmonde pri diversaj temoj.

* Gelernantoj el Jugoslavio deziras korespondi tutmonde pri sporto, turismo, kanto kaj bildkarto. Iliaj adresoj estas:

Hasiĉ Asija, 15-j., Briznik 105, 72000 Zenica;

Musliĉ Mersija, 12-j., Briznik 64, JU-72000, Zenica;

Hasiĉ Sadzida, 12-j., Briznik 110, 72000 Zenica;

Armaut Sifet, 14-j., Armauti Lernejo, 72000 Zenica;

Vardo Jasmina, 13-j., Elementa Lernejo "Omer Maslic", 72000 Zenica;

Hasic Bakir, 12-j., Elementa Lernejo "Omer Maslic", JU-72000 Zenica;

Cehovic Elvira, 12-j., EL. Lernejo "Omer Maslic" Armauti, JU-72000 Zenica;

Milamovic Nevenka, 16-j., Pomihovo 23, JU-72000 Zenica;

Mulic Samir, 14-j., EL. Lernejo "Omer Maslic" Armauti, JU-72000 Zenica;

Hasic Jakub, 13-j., EL. Lernejo "Omer Maslic" Armauti, JU-72000 Zenica.





“EKSPOZICIO PRI ĈINAJ FILMOJ EN LA PASINTAJ 50 JAROJ” EN ITALIO

En la 25-a de februaro la “Ekspozicio pri Ĉinaj Filmoj en la Pasintaj 50 Jaroj” inaŭguriĝis en la urbo Torino de Italio, sub la aŭspicioj de pli ol 10 organizadoj, inkluzive de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Italio, la Piemonte-a registaro, la ŝtata Halo por Filmaj Materialoj, la Itala-Ĉina Amikeca Asocio k.a. Ĝin ĉeestis la dek-persona Ĉina Filmista Delegacio gvidata de Chen Huangmei, vicprezidanto de la Asocio de Ĉinaj Filmistoj.

En ĉ. dusemajna eksponado, oni projekciis pli ol 100 ĉinajn filmojn faritajn en la periodo de 1927 ĝis 1980. Inter ili ĉ. 70% estis filmitaj post 1949. La Ĉina Filmista Delegacio kaj diverslandaj filmaj recenzistoj partoprenantaj la ekspozicion kunsidis por esplori la historion kaj estontecon de la ĉina filmo.

FOTOGRAFIA EKSPOZICIO “HODIAŬA ĈINIO” EN NEDERLANDO

La fotografia ekspozicio “Hodiaŭa Ĉinio”, kiun Ĉinio unufoje okazigis en Eŭropo, havis lokon en Nederlando en februaro kurantjare. Estis eksponitaj 250 fotoj, kiuj estis faritaj de ĉinaj fotistoj en la lastaj jaroj, spegulas ĉinajn kulturon, industrion, militajn aferojn, fizikkulturadon, polan vivon k.a.

KUNMING KAJ ZURIKO FARIĜIS AMIKAJ URBOJ

La konvencio pri la amikiĝo de la ĉina urbo Kunming kaj la svisa urbo

Zuriko estis subskribita en Kunming la 17-an de februaro. Por plifortigi la komprenon kaj amikecon inter la du urboj kaj la du popoloj, ambaŭ flankoj per amika kontaktado intensigos la kunlaboron kaj interŝanĝon en ekonomio, scienco kaj tekniko, kulturo kaj arto, edukado, fizikkulturado, medicino kaj higieno, urba konstruado kaj turismo. Post la subskriba ceremonio la gastoj kaj gastigantoj kune plantis antaŭ la magistrata domo kvar kameliojn simbolantajn la amikecon de la du urboj.

PEKINA UNIVERSITATO DONACIS LIBROJN AL LA HUMBOLDT-A UNIVERSITATO

Antaŭ nelonge la Pekina Universitato donacis 500 librojn al la Humboldt-a Universitato de la Germana Demokratia Respubliko. Ili plejparte estas famaj verkoj lastatempe eldonitaj kaj represitaj, inkluzive de la unua volumo de “Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai” (ĉefministro Zhou Enlai estis honora doktoro de la Humboldt-a Universitato), la nove eldonita “Kompleta Verkaro de Lusin” kaj romanoj, prozaraj, poemaroj kaj dramoj eldonitaj post la Movado de la 4-a de Majo. Krome, estas ankaŭ lernolibroj kaj referencaj libroj k.a.

SVEDA-ĈINA AMIKA VESPERO EN STOKHOLMO

La 10-an de februaro, la Klubo de Svedaj Turistoj okazigis sveda-ĉinan amikan vesperon en Stokholmo. En la vespero oni projekciis dokumentan filmon kaj lumbildojn faritajn de ĵurnalisto de la sveda fotografia kompanio en la lasta septembro, kiam la reĝo kaj reĝino de Svedio vizitis Ĉinion. La filmo kaj lumbildoj prezentis la pejzaĝojn vizititajn de ili en Pekino, Xi'an, Chengdu kaj Ŝanhajo. Poste ĉiuj ĉeestantoj kune prenis ĉinan vespermanĝon kaj trinkis la ĉinan brandon Maotai. Ĉiu sinjoro ricevis ĉinstilan ĉapon kaj portis ĝin sur la kapo. La kunve-

nejo estis plena de varma atmosfero, kio montris profundan intereson de la sveda popolo pri Ĉinio.


LA FILHARMONIO DE ZURIKA KONCERTEJO TURNEIS EN ĈINIO

La Filharmonio de Zurika Koncertejo faris turneon en Pekino kaj Ŝanhajo februare de la kuranta jaro. Ĝi estas unu el la plej grandaj filharmoniaj orkestroj de Eŭropo kaj havas historion de 114 jaroj. La svisaj muzikistoj ludis verkojn de famaj muzikistoj Mozarto, R. Shumann kaj Betoveno. Ĉinaj muzikistoj laŭdis ilian ludon.

LA NORVEGA ĤORO EN ĈINIO

En februaro ĉi-jare la Norvega Ĥoro faris turneon en Pekino, Tianjin kaj Kantono. Ĝi estis fondita de la Asocio de Norvegaj Solistoj en 1950 kaj konsistas el muzikaj instruistoj, studentoj, inĝenieroj kaj dommastrinoj, kiuj pli bone konas muzikon. Ĝi vizitis dekkelkajn landojn kaj regionojn de Eŭropo kaj Azio kaj gajnis altan prestiĝon. Ĝia turneo en Ĉinio ricevis subtenon de la norvega reĝo Olav la Kvina.

Dum la turneado en Ĉinio ili senakompane prezentis pli ol dudek eŭropajn klasikajn kaj modernajn programerojn kaj ricevis varman bonvenigon de ĉinaj spektantoj. La membroj de la Ĥoro de la Centra Filharmonio de Ĉinio opinias, ke la vizito de la Norvega Ĥoro al Ĉinio akcelos la ĉefurban ĥoran festivalon, kiu okazos en Pekino maje kurantjare.



KAMPARANOJ EN LA PRINTEMPA FESTO

Fotoj de BAI WEIFENG

kaj QINJUN

La unua tago de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas Printempa Festo. Ĝi estas la plej solena el la tradiciaj festoj de Ĉinio. La ŝtato difinis, ke je ĉiu printempa festo la popoloj ricevas tri-tagan ferion. Antaŭ la festo la familianoj loĝantaj en aliaj lokoj revenas al la hejmo por pasigi la feston kune kun la tuta familio. Ĉie brilas festaj lanternoj kaj flirtas koloraj flagoj kaj rubandoj. La loĝantoj beligas sian domon, preparas abundajn manĝaĵojn kaj surgluas ruĝajn paperojn kun feliĉigaj vortoj ambaŭflanke de la pordo. Dum la feriotagoj infanoj sin amuzas per petardoj. Laŭ la ĉina moro, antaŭvespere de la festo ĉiuj familianoj devas kune preni la jarfinan manĝon. En la festo oni vizitas parencojn aŭ amikojn por gratuli la feston. En la kamparo la festa aktivado ofte daŭras ĝis la 15-a de la koncernata monato. En tiuj tagoj la kamparanaj artistaj trupoj prezentas diversajn festajn amuzaĵojn kun loka gusto en sia aŭ aliaj vilaĝoj.



Montvilaĝo en la festo



Leona Danco



Spektantoj



Kunludo de muzikiloj



Vilaĝa teatraĵo

Legendo kaj Realo pri Sanmenxia

de ZHENG ZHENJIE

FORLASINTE Lingbao, mi veturis en trajno orienten kaj venis al la urbo Sanmenxia en la okcidenta parto de Henan-provinco. En la urbo kvadrata per stratoj kreskas prosperaj firmianoj (*Firmiana simplex*), kio profunde impresis min.

Kun la fondo de la akvoadministrataj centraj konstruaĵoj de Sanmenxia la loko fariĝis nova industria urbo kun 130,000 loĝantoj. Tie oni fondis ĉefe malpezan industrion kaj samtempe pezan industrion de metalurgio, elektro, maŝinoj k.a. Alilokanoj venintaj al la urbo tre volas viziti la konstruaĵojn.

Inter la urboparto kaj la akvoadministrataj konstruaĵoj servas al laboristoj iro-reira trajno. En iu frosta mateno mi ekveturis al la konstruaĵo kune kun kamaradino Zhang de la Akvoadministrata Komitato de Flava Rivero. En la veturado mi ekimagis la imponan aspekton de Sanmenxia, ĉar antaŭe mi legis multajn kortuŝajn legendojn pri ĝi.

Sanmenxia distancas de la pasejo Tongguan je 13 kilometroj. Ĝi estas montgorĝo kun kruta ravino, post trafluo de kiu la Flava Rivero fluas en ebenaĵon. En la rivermezo staris du rokoj. La rivero furioze fluegas kontraŭ la rokoj kaj estis tondita de la rokoj en tri muĝantaj fluojn. Oni nomas la tri fluojn "Homa Pordo", "Dia Pordo" kaj


"Diabla Pordo". Laŭdire, la monton disfendis per granda hakilo la akvojunga heroo Dayu en la antikva Ĉinio. Sur la roko de la "Diabla Pordo" troviĝas paro da rondaj kavoj en grandeco de put-aperturo, nomata "Ĉeval-hufaj Kavoj", kiujn postlasis la ĉevalo de Dayu dum la akvojungado. La legendo diras, ke kiam Dayu rajdis sur la ĉevalo kaj pretis transsalti la montgorĝon, ĝi falis sur la rokon. Ĉe tio li haste streĉis la bridon kaj tiel sin ĵetis sur la nordan bordon per unu salto.

Cirkaŭ tricent metrojn malsupre de Sanmenxia troviĝas malgrandaj rok-insuloj. Oni nomas unu el ili en la mezo de la rivero "Kolono en la Meza Fluo". La

insuleto estas malalta, kaj en la seka periodo ĝi altas je sep metroj super la akvo. Malgraŭ frapado de muĝantaj ondoj al ĝi dum miloj da jaroj ĝi ĉiam staras firme. Laŭdire ĝi estas memoraĵo postlasita pro la monthakado de Dayu por elkonduki akvon.

Nia trajno haltis ĉe la hidroelektrejo de Sanmenxia. Elvagoniĝinte, mi kaj kamaradino Zhang rapide iris al la insuleto "Kolono en la Meza Fluo" proksima al la stacio. Starante sur la bordo, mi klare vidis la ideografiaĵojn signifantajn "Rekte al Mi" ĉizitajn sur la "Kolono", kiun ĉiam atakas ondegoj. Ĝi simbolas nian nacian heroecon. Tie la fluo estas vere potenca kaj danĝera. Hazarde mi renkontis

Generatoroj de la Sanmenxia-a Hidroelektrejo



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (2)

tie la patron de kamaradino Zhang. Siatempe li estis eminenta konstruanto de Sanmenxia. Li, pli-ol-50-jara, diris, ke dum miloj da jaroj la "Kolono" servas kiel signo por rudristoj. Trapasinte la danĝerajn tri "pordojn", spertaj rudristoj nepre lasis la ŝipon kuri rekte al la "Kolono" kun la ideografiaĵoj "Rekte al Mi". Nur tiumaniere la ŝipo povis veturi laŭ la torento, turniĝi en la akvokirlo ĉe la gorĝobuŝo kaj poste ĉirkaŭiri la "Kolono" pelate de la fluo. De tie la ŝipo navigis en milda fluo. Se rudristo ne kuraĝas lasi sian ŝipon rekte flosi kaj iomete deviiĝas ĝin de la direkto, la ŝipo dronos en la akvokirlo aŭ rompiĝos sur la "Kolono".

Hodiaŭ la fizionomio multe ŝanĝiĝis. Sur la tri rokoj jam kuŝas riverbaraĵo longa je 875 mertoj kaj alta je 106 metroj en la ravino. Ĝi ligas Shanxi-provincon kun Henan-provinco. Jen la konataj akvoadministrataj centraj konstruaĵoj de Sanmenxia.

La grandiozaj konstruaĵoj inter la du montoj staras unuj super aliaj kvazaŭ la impona Potala-palaco de Tibeto rigardate de malproksime. Rigardante de sur la baraĵo malsupren oni vidas: Ĉe unu flanko estas kvieta akvo, kaj ĉe la alia flanko firme staras inter ondegoj la "Kolono en la Meza Fluo".

Kamaradino Zhang kaj mi staris tie kelkajn minutojn kaj poste vizitis la hidroelektrejon. Survoje ŝi rakontis al mi pri la konstruado. Ŝi diris, ke la konstruado komenciĝis en aprilo 1957 kaj finiĝis en septembro 1960. Ĝi estas la unua granda konstruaĵo sur la Flava Rivero. Krome ĝi estis ankaŭ la unua provo jungi kaj utiligi la riveregon.

Sanmenxia situas ĉe la meza parto, proksime al la malsupra parto de la rivero. Tial, preskaŭ la tuta kvanto de sablo forportita de la rivero el la Loesa Altbenaĵo trairas tiun lokon. La

mezurado farita de hidrologia stacio montris, ke la kvanto de la sablo portita tra tiu loko atingas meznombro 1.6 miliardojn da tunoj en unu jaro, kaj ĉiu kubmetro da akvo entenas maksimume 746 kilogramojn da sablo. Antaŭe mankis al teknikistoj sperto pri projektado, tial oni ne multe atentis la problemon pri sabla sedimentado. Post la ekfunkcio de la akvokonservejo aperis serioza sedimentado, kaj la plej grave minacata parto estis inter Tongguan kaj Sanmenxia. Tia stato rapide etendiĝis al la malsupra parto de Wei-rivero. Tio ne nur minacis la akvokonservejon, sed ankaŭ la ebenaĵojn ĉe ambaŭ bordoj de Wei-rivero kaj la faman antikvan urbon Xi'an.

Informiĝinte pri serioza sedimentado en la akvokonservejo de Sanmenxia, ĉefministro Zhou Enlai prezidis kunvenon en Pekino en decembro 1964 por kontroli la jungadon de la Flava Rivero, kiu decidis rekonstrui la akvokonservejon.

Oni dufoje faris rekonstruadon. Unue, oni konstruis pliajn du akvodrenajn tunelojn ĉe la maldekstra flanko de la baraĵo kaj reformis kvar el la ok akvokondukaj tuboj de la hidroelektrejo en sabloellasajn tubojn. Dank' al tio la sekunda akvodrena kaj sabloforiga kapablo de la akvokonservejo altiĝis de 3,080 kubmetroj al 6,000 kubmetroj, tiel ke pli ol 80% de la sablo estas ĝustatempe forigita. Tuj poste oni faris la duan rekonstruadon, nome malfermis la ok akvokondukajn kanalojn uzatajn en la konstruado de la baraĵo por ellasi sablon. Ĉar la

Promenejo ĉe vojkruciĝo de la urbo Sanmenxia



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (2)

enirejoj de la kanaloj troviĝas sub la riverujo, ilia efiko estas rimarkinda.

La ĉefa rolo ludata de la konstruaĵoj troviĝas en tio, ke ili povas bari inundakvon de pli ol 22,000 kubmetroj en ĉiu sekundo. Inundakvo de malpli ol 22,000 kubmetroj en ĉiu sekundo libere trapasas la kluzojn de la akvokonservejo. En praktikado ĉinaj sciencistoj trovis la metodon teni la akvon klara en la akvokonservejo: En vintro kaj printempo, kiam la rivero fluas kun malgranda kvanto de sablo, oni akumulas la akvon. Tiu faro malgrandigas la kvanton de ellasita akvo, mildigas glaci-inundan* minacon al la bordoj de la malsupra baseno kaj samtempe pre-

tigas akvofonton por elektroproduktado kaj printempa irigaciado. En somero kaj aŭtuno inundas la rivero kun granda kvanto da sablo. Tiam oni devas malfermi la kluzojn de la akvokonservejo por dreni la akvon kaj forigi la sablon. Nun, la konstruaĵoj ne nur likvidas la minacon de inundado kaj sablo al la ebenaĵoj ĉe ambaŭ bordoj de Wei-rivero kaj la urbo Xi'an, sed ankaŭ irigacias pli ol milionon da hektaroj da kampoj kaj liveras akvon al la urboj Zhengzhou, Kaifeng, Tianjin kaj aliaj nordaj urboj.

La sukcesa kompletigo de la konstruaĵoj kreis favorajn kondiĉojn ankaŭ por produkti elektron. En la hidroelektrajo mi vidis, ke tie estas kvin akvotur-

binaj generatoroj taŭgaj por malalta akvofalo. Laboristoj diris, ke la hidroelektrajo havas la totalan kapaciton de 250,000 kilovattoj kaj ĉiujare produktas elektron de 1,300 milionoj da kilovattohoroj.

Nun, la muĝanta Flava Rivero estas jungita kaj bone servas al la popolo ĉe ambaŭ bordoj de la rivero.

** En Shandong-provinco la Flava Rivero fluas nord-orienten. En la komenca printempo la supra parto de la rivero jam degelis, sed la malsupra parto restis ankoraŭ glaciiginta, tial amasoj da glacipecoj sin puŝis malsupren kaj fine fariĝis glaci-digo, kiu ŝtopis la riverujon kaj kaŭzis inundon. La lokanoj kutime nomas ĝin glaci-inundo.*

HUMURAĜO DE LA ANTIKVA ĈINIO

Avaraj geedzoj

Pentritaj de Li Gui



Paro da avaraj geedzoj volas dungi instruiston por sia filo, sed ne volas liveri al li manĝon.



Iu rekomendas al la edzo: "Estas sinjoro, kiu ne manĝas nek trinkas, iom da suda vento jam sufiĉas por li." Tion aŭdinte, la riĉulo estas tre kontenta.



La riĉulo ĝoje diras tion al sia edzino, sed tiu diras: "Tion mi ne konsentas. Se blovos norda vento, kion vi donos al li por manĝi?"



Jen pavo flugas al sudoriento

La fama epopeo de Ĉinio "Jen Pavo Flugas al Sudoriento" cirkulis kiel popolokanto en la regperiodo Jian'an (196-220 p. K.) de Han-dinastio. Per lingvo simpla kaj lakona ĝi rakontas al ni tragedion de amanta paro viktimiĝinta pro feŭdaj moroj. Ĝi estas multe ŝatata de ĉinaj popolanoj de jarcentoj.

— La Red.

*Jen pavo flugas al sudoriento,
kvin-lie* sin returnas kun ve-sento**.*

*"Mi, dektrijara, blanksilkajojn teksis,
kaj dekkvarjara tajlorarton regis,
en aĝo dekkvinjara konghoŭ-ludis***,
en l' jar' deksepa klasikajojn legis,
en l' jar' deksepa prenis min sinjoro,
kaj ofte mi malĝojas en la koro.
Vi, oficisto en la prefektejo,
laboras ĉiam ja kun devkonscio.
L' edzino restas en soleco,
maloftas inter ni konversacio.
Sen dorm' necesa mi al la teksilo
jam devas iri tuj je kokokrio.
Tritage de mi pretis kvin ŝtofpecoj,
sed panjo min riproĉis pri lanteco.
Ne veras, ke l' teksado lante iras,
sed serv' en via domo malfacilas!
Por tion plenumadi mi debilas,
do mia plua resto ne utilas.
Nun decas peti de la bopatrino
eksedzinigon al mi je la fino."
Kaj sekve l' oficisto de l' prefekto
parolis al patrino kun respekto:
"La sort' al mi ne donis altdestinon.
Feliĉe mi akiris ĉi virinon.
Geedza par' fariĝis ni volonte
kaj restos geamikoj eĉ transmonde†.
Ni nur kunvivis ne pli ol tri-jare,
do tre mallonge, nur komencofare.
Se l' bofilin' kondutas ne maldece,
do kial vi ŝin traktas nepanjece?"*

*Al l' oficisto diras la patrino:
"Jen kia manko de prudento!
Ne scias ĝentilecon ĉi virino,
kaj ŝi kondutas kun liber' sen limo.
Delonge indigniĝis mia koro.
Ĉu povas mi vin lasi al la volo!
Nun vivas en la orienta domo*

*bona knabin' — Ĉin Lofu, ŝia nomo.
Ŝi estas senkompara en beleco,
mi svatos ŝin por via reedzeco.
Do senprokraste ŝin vi jam forsendu,
forigu ŝin—ĉi vortojn ja atentul!"
Kaj diras l' oficisto de l' prefekto
al panjo surgenue kun respekto:
"Se hejmen mi l' edzinon nun resendus,
en solo mi la morton ĝisatendus!"
Aŭdinte tion la patrin' grakadas
de kolerego kaj l' sidilon batas:
"Ha, ci, knabaĉ', nun tute jam sen timo,
aŭdacas eĉ paroli pro l' virino!
Se mi jam tute perdis ŝian koron,
mi nepre malkonsentos vian volon!"
La oficist' nenion plue diris,
post riverenc' en sian ĉambron iris.
Li sentis kvazaŭ ŝtopon en la kolo. . .
Aŭdiĝas al l' edzin' lia alparolo:
"Ne volas mi al patra dom' vin peli,
sed la patrin' devigas min krueli.
Al la patrino iru provizore;
mi iros prefektejon por-labore.
Ne longe poste hejmen mi revenos
kaj certe mi denove vin alprenos.
Pro tio do toleru l' mizer-horon,
kaj metu miajn vortojn en la koron."
L' edzino diras al la oficisto:
"Finigu jam la malfeliĉo-listo!
Antaŭe mi, en tago aŭtunfina,
transvenis al vi, de la dom' patrino.
Mi obeemis al la bopatrino.
Ĉu mi aŭdacus agi laŭ inklino?
Mi tage-nokte ĉiam diligentas,
sed min en solo maldolĉec' turmentas.*

* Lio = 0.5 km. Kvin-lie ĉi tie signifas "po kvin lioj".

** Versaĵoj pri disiĝo de geedzoj en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) ofte estas enkondukitaj per versoj pri forflugo de birdo kiel ĉi tiuj.

*** Konghoŭ: antikva ĉina pluka instrumento.

† T.e. post la morto.

Mi pensis, ke mi estas senerara
 en servo al la bopatrino kara.
 Sed tamen rezultigis la elpelo,
 pro kio do babili pri reveno!
 Mi havas vatjaketon kies belaj
 brodaĵoj ĉarmas kiel floroj veraj,
 litvualeton kun ruĝsilka supro
 kaj aromsakoj ĉe ĉiuj anguloj,
 sesdek aŭ sepdek ornamajajn kestojn
 ligitajn verde-blue per silksnuroj.
 En ili konserviĝas aj-kolektoj —
 diversaspecaj estas la objektoj.
 Modestas ili kiel la mastrino,
 ne indas al l' estonta novedzino.
 Do ilin uzu kiel donaceton,
 de nun ni ne plu spertos ja kuneston.
 Per ili konsoliĝu via koro,
 min ĉiam tenu en via memoro.”


Je kokokri' heliĝas jen ekstere,
 l' edzin' leviĝas, sin ornamas bele.
 Per ĵup' brodita ŝi l' aspekton ŝanĝas
 kaj ĉion kvar-kvin-foje rearanĝas.
 Silkŝuojn surpieden ŝi surmetas,
 surkape testudoŝelaj' briletas.
 Talie ĉarmas zon' el silko blanka,
 orele pendas luno-perl' senmanka.
 La fingroj delikatas versimile
 al ŝenoprazaj tigoj kaj l' lippara
 kolor' cinabre ruĝas. Si gracile
 paŝetas kun beleco senkompara.
 Ŝi l' bopatrinon adiaŭis bene,
 sed tiu ne admonis ŝin detene.
 “En la pasinto estis mi knabino
 vivanta en kampara kruda sino;
 edukon decan mi ne ricevintas,
 kaj kun sinjor' pariĝi mi ne indas.
 Donacojn de vi multe mi akiris,
 sed por mi l' servo al vi malfacilis.
 Hodiaŭ l' patran domon mi reiros,
 kaj timas, ke pro pen' vi peze spiros.”
 Si adiaŭis al la bofratino,
 larmante perle kun korinklino:
 “Je l' tago kiam mi alvenis ĉe vi,
 fratini', vi altis nur pli ol la lito;
 nun estas vi en sama alt' kiel mi,
 sed baldaŭ mi fariĝos forpelito.
 Patrinon atenteme vi prizorgu
 kaj dum irado vi ŝin helpapogu.
 Je l' sepa* aŭ deknaua** amuztago,
 memoru min dum via petolago.”
 Eliras kaj ascendas ŝi la ĉaron,
 viŝante la larmantan okulparon.
 En fronto l' oficisto sur ĉevalo
 veturas, post li la edzin' en ĉaro.
 Grinc-grince kaj knar-knare l' veturilo

alvenas stratobuŝon, kaj la viro
 descendas la ĉevalon, ĉaren li eniras
 kaj kun klinita kap' li flustre diras:
 “Mi ĵuras: Mi ne rompos kun vi kore!
 Reiru hejmen nun nur provizore,
 kaj l' prefektejon iros mi ĉi-hore.
 Mi baldaŭ jam revenos kaj vin vidos.
 Je Dio, mi neniam vin perfidos.”
 Al l' oficisto diras la edzino:
 “Mi dankas pro l' sincera korinklino.
 Se plue en la koro vi min tenos,
 mi ja esperas ke vi baldaŭ venos.
 Rokego firma estu vi, sinjoro,
 kaj mi fragmito mola aŭ akoro
 fleksebla forta kiel silkfadeno;
 kaj l' roko ne ŝanĝiĝos en sinteno.
 Mi havas fraton de la patra gento,
 tondrosimilan en temperamento.
 Li ne permesus agi laŭ la volo,
 sed turmentadus min per malkonsolo.”
 Svingante manon diris adiaŭon
 la geamantoj kun bedaŭra koro.
 En sian patran domon ŝi revenas,
 sed ĉie malhonoro ŝin venenas.
 Manklakas la patrino: “Ho, subite
 revenas vi al hejmo seninvite***!
 Vi dektrijara lernis de mi tekson,
 en l' jar' dekkvara vi ekfaris veston,

* Vespere de la sepa de la sepa monato lunkalendaro, la knabinoj en antikva Ĉinio preĝis al la feino Tekstistino (Vega), ke ŝi helpu ilin lertiĝi en teksado.

** La 19-a de ĉiu monato lunkalendaro estis, en antikva Ĉinio, tago por kunveno de knabinoj por sin amuzi.

*** En antikva Ĉinio la edzinigitaĵaj virinoj ne povis reveni al sia patra domo sen invito de la parencoj. Tial la reveno de Lanĝi montris eksedziniĝon kaj surprizis ŝian patrinon.



en la dekkvina vi konghoŭ-on ludis,
en la deksepa etiketon studis,
en la deksepa vin al vir' mi donis,
pensante ke vi virtovojojn konis.
Se vi ne kulpus, kial sen revoko
revenas nun vi al la hejma loko?"
Honteme Langi diras al patrino:
"Senkulpa estas ja via filino."
Kaj la patrino trafis tristoŝoko.

Dek kelkajn tagojn post la hejmeveno,
sendit' de l' konteestro kun svat-celo
prezentas: "Lia tria fil' je belo
ja estas senkompara sur la tero.
Nur deknau-jara, tamen eminenta
montriĝis li en arto elokventa."
Patrino la filinon alparolas:
"Respondu la svatiston, se vi volas!"
Kun larmoj la filino diras jene:
"Kiam veturis Langi hejmeveno,
l' oficisto diris al mi ripetfoje:
Neniam ni disiĝu vivovoje.
Se mi hodiaŭ agus lin perfide,
ne decus ja konduti moral-spite.
Prefere la senditon nun rifuzu
kaj poste ni senhaste l' saĝon uzu."
Patrin' al la svatist' pretekston levis:
"Mizera mi filinon ĉi ricevis;
post nupto baldaŭ ŝi reveni devis.
Se ŝi ne povis gajni l' oficistan koron,
ĉu povus kontentiĝi ŝi l' sinjoron?
Feliĉe vi ja povas serĉi vaste;
konsenti mi ne povas jam nun haste."

De la tajsoŭ-o*, tagojn post ĉi tio,
alvenas la konte-sekretario:
"Mi diris al Tajsoŭ', ke Langi estas
filin' el altrangula familio...
Kaj nun ankoraŭ lia kvina filo,
supere bela, restas fraŭla viro.
Por peti, ke mi agu kiel svatisto,
la jenon diris al mi la skribisto:
Sen ĉirkaŭfrazo diru, ke sinjoro
tajsoŭ-o havas filon. Kun honoro
nun venas svati mi je lia nomo,
por parenĉiĝ' kun via nobla domo."

Rifuze diras la patrino jene:
"Filino mia juris resti hejme;
devigi ŝin ja estas nekonvene."
Aŭdinte tion la pliaĝa frato
maltrankviliĝas kore tre ĉagrene.
Li ekparolas al fratino sia:
"Decido via — kiel malracia!
Al eksedzino de oficisteto
nun eblas edziniĝ' al sinjorido;

ĉielen vi leviĝos de la tero
kaj ĉiam vivos glore en prospero.
Se vi ne volus edziniĝi al li,
do kion volus vi estonte fari?"

Respondas Langi kun levita kapo:
"Ja pravas ĉiu via vort-silabo.
Foriris mi por servi al la edzo,
sed nun revenis al vi de vojmezo.
Aranĝi fraĉjo povas laŭ la volo,
ĉu povus mi arbitri laŭ la koro?
Kvankam prijuris mi kun la sinjoro,
neniam estos por ni revid-horo.
Do tuj vi povus jam konsenton fari
kaj geedziĝan feston tuj prepari."

Leviĝas la svatisto de l' sidilo
kun ĝojaj jesoĵ, rido kaj ĝentilo.
Li al tajsoŭ' revenas kun ĉi diro:
"La taskon mi plenumis kun honoro
kaj l' svato akceptiĝis kun favoro."
Aŭdinte la raporton la sinjoro
Tajsoŭ-o ĝojas per la tuta koro,
konsultas notojn en la almanako
kaj librojn kaj konstatas, ke l' monato
tre taŭgas por elekt' de edziĝdato.
"Favora tago estas la trideka,
hodiaŭ estas jam la dudeksepa;
aranĝi nuptofeston vi jam povas."
Al tualet'! Tuj homoj sin ekmovas
arope kiel nuboj sin glitŝovas.
Jen ŝipoj nigrabirda, blankacigna —
ĉe l' kvar anguloj pendas drakoflagoj
flirtantaj en la vento, graci-signalaj.
Jen antaŭ ora ĉar' kun jadaj radoj
ĉeval' blu-blanka dignas en marŝado
kun silkofranĝa or-ajura selo.
Tri milionoj da donac-moneroj
ligitaj per silkŝnur' kun nigrobelo.
Tricent rulaĵoj da silkaĵoj buntaj,
frandaĵoj maraj el lontanaj lokoj.
De l' gubernia urbo jen abundaj
sekvantoj kvincent marŝas—ho, homblokoj!

Al la filino la patrino diris:
"Jus de l' tajsoŭ' leteron mi akiris,
ke morgaŭ oni venos vin forpreni.
Kial ankoraŭ vi ne vestojn faru?
Ne per saboto la aferon baru!"
Silentis la filino ĉagrenplene
kaj per naztuko kovris sian buŝon —
torenta larmoplur' similis duŝon.
Ŝi prenis sian glazur-tabureton
kaj l' meblon metis antaŭ la fenestron.

* Altranga ŝtatificisto en antikva Ĉinio administranta regionon pli grandan ol konteo.

En la maldekstra mano, mezuril' kaj
tondilo, en la dekstra mano silko.
Matene ŝi broditan jupon faris,
vespere ŝi jaketon elpreparis.
Per la radioj lastaj l' suno brilis,
kun ĉagren-larmoj l' hejmon ŝi eliris.

Aŭdinte tiun ŝanĝon l' oficisto
tuj forpermeson petis por reveno.
Veninte al du-aŭ-tri-lia disto*
ekhenis la ĉevalo pro ĉagreno.
L' edzino tuj rekonis ĝian henon,
renkonte iris al ĝi sen paŝbruo.
Ŝi ekrigardis foren kun ĉagreno,
konstatis, ke alvenis la karulo.
Ŝi manon levis, frapis ŝi la selon,
dolore ĝemis kaj eldiris jenon:
"Post la foriro de vi, ho, sinjoro,
afero iras ne laŭ idealo,
neatendite, kontraŭ nia volo.
Ne informiĝis vi pri la detalo.
Obei devis mi al la patrino
kaj min devigis mia frat' je l' fino.
Se ili jam promesis min forsendi,
ankoraŭ kion povas vi atendi!"

Respondis l' oficisto per ĉi tio:
"Gratulon al vi pro la promocio!
La roko estas dika, neŝanĝebla,
ne cedas al miljara korodado;
fragmito aŭ akoro estas febla,
ŝanĝiĝas jam en unu sola tago!
Vi paŝos plu en gloro kaj prospero,
sed falos sola mi al la infero."
Al l' oficisto la edzino diris:
"Pro kio tion vi al mi babilis!
Kondutis sub devigo ja ni ambaŭ,
kiel vi estis, same ja mi ankaŭ.
Ni intervidu do en la infero,
observu ni ĉi vortojn kun fidelo!"
Mansvingis ili, adiaŭon diris,
al siaj hejmoj ili fine iris.
Ĉu la ĉagrenon de disiĝ' por morto
esprimi povus iu ajna vorto!
Deziris ambaŭ iri for de l' mondo,
anstataŭ vivi por famili-fondo.

Veninte al la hejmo je la fino,
salutis l' oficist' al la patrino:
"Hodiaŭ furiozas frosta vento,
la arboj ĉiuj estas sub turmento,
kaj l' kortajn orkideojn mordas prujno.
Foriros nun mi, suno de vespero,
kaj panjo restos sola sur ĉi tero.
Decidis mi mem pri la tragedio,
do ne blasfemu kontraŭ iu dio!

Vi longe vivu kiel monto ŝtona
kaj via sano ĉiam estu bona."
Lia patrino je ekaŭd' de tio
ekveis dum fluadis larmostrioj:
"Vi estas fil' de nobla familio,
leviĝos al kortega pozicio.
Ja ne pereu nur pro la virino,
ŝi ne egalas vin — jen la racio!
En l' orienta dom', knabin' tre bona
plej ĉarmas en la tuta urborondo.
Mi sendos peti por vi ŝian manon,
kaj baldaŭ venos al ni jam respondo."
Post riverenc' la oficist' reiris
al sia vaka ĉambro kaj suspiris,
kaj post pripenso fine li decidis.
Internan ĉambron kapon li direktis
kaj sentis ĉiam plian korturmenton.

En tiu tag' ĉevaloj, bovoj blekis —
eniris la virin' la bluan tendon.**
Mallumo post la vesperiĝo regis,
meznokta hor' estigis plensilenton.
"Por mia viv' la fin' ĉi tago estos,
forflugos la anim', la korpo restos."
Ŝi levis l' jupon, lasis la silkŝuojn,
lageten jetis sin, kaŭzante bruojn.
Aŭdinte l' okazajon l' oficisto
konsciis pri la fino de la tristo.
Sub korta arbo paŝojn li prodigis
kaj sudorient-branĉe sin pendigis.

Interkonsentis la du-domaj anoj
ĉe Huaŝan*** enterigi tiun paron.
Kaj verdaj pinoj, tujoj, firmianoj****
en tiu loko formis nov-arbaron.
La branĉoj ŝirmis unuj la aliajn
interplektante l' verdajn frondojn siajn.
Interne nestas amobirda paro
jŭanjang† kun fideleco senkompara.
Kun kap' levita tiu par' en ĥoro
kantadas kune ĝis noktmeza horo.
Preterpasantoj haltas, aŭskultadas,
kaj penso de vidvinoj ĉirkaŭvagas.

Al l' estontuloj donu mi admonon:
Memoru ĉiam tiun lecionon!

Elĉinigis LAŬLUM Ilustrita de Wang Shuhui

* Disto = distanco.

** En antikva Ĉinio geedziĝa ceremonio kutime okazis en tendo el blua ŝtofo.

*** Huaŝan (Huashan) estas fama pitoreska monto en Shaanxi-provinco.

**** Firmiano (Firmiana simplex): speco de rapidkreska arbo kun larĝaj folioj kaj flave-verdaj floretoj en Ĉinio kaj Japanio.

† Jŭanjang-o (Aix galericulata): migra birdo ĉiam vivanta en paro, rigardata de la ĉinoj kiel simbolo de fidela amo.



Okcidenta Qiaoshan-monto

de CHENG YOU

LA nomita monto situas 68 kilometrojn sudokcidente de Kantono. Ĝi staras simetrie kun Orienta Qiaoshan-monto, kiu troviĝas oriente de Kantono. Oni laŭdas: "Inter la vidindaj montoj de suda Guangdong-provinco plej ĉarmas ambaŭ Qiaoshan-montoj."


La monto kun pli ol 20-kilometra cirkonferenco leviĝanta sur ebenaĵo, aspektas majeste pro la abruptaj krutajoj ĉirkaŭe, malgraŭ ke la ĉefa pinto estas nur 346 metrojn alta super la marnivelo. En tiu turisma loko en la subtropika zono de suda Ĉinio abundas diversaj arboj, tondras akvofaloj, ĉarmas la vojaĝantojn groteskaj montpintoj kaj kavernoj. Vintre tie ne frostas kaj somere ne varmegas. La tuta jaro taŭgas por turismo. Ekde Ming-

dinastio (1368-1644 p.K.) ĝin ofte vizitis poetoj kaj literaturistoj, kiuj postlasis multe da historiaj objektoj kaj surroke ĉizitaj manskribaĵoj post sia vojaĝo kaj prelego.

Ĝenerale la turistoj komencas sian viziton al la monto de Baiyundong, kiu kuŝas ĉe la orienta piedo de la monto kaj funkcias kiel enirejo de la monto.

La hufforma valo Baiyundong estas ĉirkaŭita de altaj montoj, kie ombras verdaj arboj, kantas birdoj kaj bonodoras freŝaj floroj. Ĝi estas punktita de kioskoj, pavilonoj, loĝdomoj, hoteloj kaj restoracioj. Inter la pintoj zigzage falas akvofaloj, kiuj formas tri naturajn lagojn kaj du artefaritajn. Ĉio ĉi plibeligas la lokon.

Ĉe la lago Baiyun de Okcidenta Qiaoshan-monto



Ĉe la enirejo de la valo okulfrape staras tri-etaĝa kvadrata brika pagodo kun ligna framo. Ĝin konstruigis feŭdaj instruituloj en la pasinteco por sukcesi en la imperia ekzameno. Malantaŭ la pagodo maldekstre en la valo kuŝas antikvaj temploj kaj dekstre sternaĝas Baiyun-lago kun kiosko en sia centro. Ĉe la bordo sur rokego staras blanka pagodeto. En Baiyundong iam okazigis kunvenon la fama ĉina politikisto Lin Zexu, kiam li estis komisiita plenumi opian malpermeson en Kantono en la 19a jarcento. Ĝisvivis hodiaŭ liaj surskribaĵoj por la "Studejo Tri Lagoj".

Ĉe la fino de la valo estas antikva konstruajaro kun naci-stilaj karakterizoj — Fea Domo Yunquan kaj Somerumejo Handan. Legendo diras, ke la Fea Domo iam estis taoista kultejo por Lü Dongbin, unu el la Ok Feoj. Nun ĝi jam fariĝis ekspoziciejo de antikvaj kaligrafiaĵoj, porcelanaĵoj kaj elterigitaj historiaj objektoj, inter kiuj estas fosilio de supra makzelo de hindia elefanto, tie vivinta antaŭ 5,000-10,000 jaroj, kaj diversaj iloj el ŝtono en la tiea primitiva socio. Dank' al tiuj elterigitaj oni povas imagi al si kiel moviĝis tie la sovaĝaj elefantoj kaj aktivadis la prahomoj. En la Okcidenta Qiaoshan-monto estas malkovritaj 17 neolitikaj prahomaj vivejoj, kie estas pli ol dekmilo da prilaboritaj ŝtonaj iloj. Tio montras, ke jam antaŭ ĉirkaŭ 6,000 jaroj tie formiĝis ŝtonminejo. La Somerumejo Handan kun ŝipforma salono nomiĝas ankaŭ ŝip-halo, kaj nun funkcias kiel hotelo, ĉirkaŭita de verdaj bambuoj ombroriĉaj.


Se oni surgrimpas la monton de oriente de la Fea Domo, trapasas la krutan rokofirston ĉ. du metrojn

OKCIDENTA Qiaoshan-monto DE GUANGDONG

Fotoj de LI CHUNGENG

Akvofalo








Ĉe la montpiedo

Antikva templo

Sur la monto



Pitoreskejo ĉe la monttalo



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Frostiĝa akvofalo en la mon-
taro Jatra de Ĉeĥoslovakio

de SZOMBATI-SZABO
ILDIKO, Hungario



**Fungoj kun
enigita viando**



Ĉinaj pladoj

larĝan kaj kelkdek metrojn longan, oni atingas Akvofalo-rigardan Kioskon, kiu donas al turistoj apartan ĝuon. Supre el verda arbaro flugas akvofalo gracia kaj ĉarma kiel jada drako. Ĝi estas la dua ŝtupo de la fama tri-ŝtupa akvofalo. Ĝia unua ŝtupo estas la Akvofalo de la Salivanta Drako kiu estas nelonga kaj Z-forma, kaŝe fluanta en la densaj verdaĵoj. La tria ŝtupo estas la plej impona. La akvo tondre superŝutiĝas de sur rokego kun surskribaĵo "Falakvo Milfuta" kaj, kvazaŭ bela vino, verŝiĝas malsupren en profundan lageton. La akvo rekte ĵetiĝas kontraŭ la rokegon en la lageto disŝutante sennombrajn brilajn perlojn. Ĝuste en tiu loko la fontakvo eniĝas en zigzagan artefaritan kanalon.

Se oni plue grimpas de la Akvofalo-rigarda Kiosko, kaj trairas koridoron ĉ. 200 metrojn longan kun densaj verdaj bambuoj ambaŭflanke, oni ekvidos spegul-similan Ĉielan Lagon ĉ. 30 metrojn longan, kukurb-forman, kun areo de unu kvadrata kilometro. Ĝi estas kratera lago. En 1951 oni konstruis barajon ĉe la enirejo de la lago, post kio akvo ĉiam abundas tie. En junio de la pasinta jaro la tieaj loĝantoj festis la Feston de Duobla Kvino laŭ la tradicia kutimo kaj okazigis drakoboatan konkurson sur la lago.

La rigardantaro nombris pli ol dek-mil personojn.

En la Okcidenta Qiaoshan-monto estas 36 kavernoj kun diversaj apartaĵoj, kiuj ankaŭ ĉarmas la turistojn. La kavernoj plejparte kuŝas en la sudorienta parto de la monto. Unu el la tieaj ŝtonaj pejzaĝoj estas la Ŝtona Ekranaro unu metron larĝa, kelkdek metrojn longa kaj pli ol dudek metrojn alta. Ĝi estas restaĵo, postlasita de antikvaj ŝtonhakistoj. Sur ĝia supraĵo faŭkas truo, tra kiu oni povas vidi la ĉielon. La lokanoj nomas ĝin "Luko". Estas vere terure trarigardi, sin apogante ĉe la balustrado, kio tamen vekas admiron al la lertaj ŝtonhakistoj. Okcidente de la Ŝtona Ekranaro estas kaverno Shiyanyan, formita pro ŝtonhakado. Ĝi profundas je cent metroj kaj altas je kelkdek metroj. Interne de ĝi brilas lago kun ponto super si. En ĝia pura akvo tremetas bela spegula bildo de la pejzaĝo. Remante sur la lago oni sentas sin kvazaŭ en fea lando. Ĉirkaŭe de la lago kaŝiĝas multe da ŝtonaj grotoj, kiuj funkcias kiel loĝejoj de birdoj.

En la Okcidenta Qiaoshan-monto rigardindaj estas ankaŭ kolor-striaj rokegoj, ekz. Naŭ-draka Rokego, simila al naŭ flugantaj drakoj, Varma kaj Malvarma Rokego, kiu estas varma en vintro kaj malvarma en somero, kaj Fung-simila Rokego kaj

aliaj, kiuj ĉiuj estas groteskaj kaj plaĉaj al la turistoj.

Sur la monto estas dissemitaj naŭ vilaĝoj, inter kiuj la plej granda estas vilaĝo Biyun. Tie troviĝas elegantaj hotelo, restoracio kaj te-salono. Ĉi tie estas ankaŭ la landfamaj Ĝardeno de Oranĝaj Osmantoj kaj Senfolia Fonto. La oranĝa osmanto estas ĉiamverda arbo dekelkajn metrojn alta, kies oranĝaj floroj konkure disfloras en la aŭtuna komenco, forte bonodorante, kio pliĉarmigas la pejzaĝon. Ankaŭ la bongusta kaj rava Osmanta Vino estas speciala produktaĵo de tiu loko.

Alia specialaĵo de la Okcidenta Qiaoshan-monto estas fontakvo. En ĉiu vilaĝo estas kelke da fontoj, inter kiuj la plej fama estas la Senfolia Fonto de la vilaĝo Biyun. La akvo de tiu ŝpruca fonto estas klara kaj dolĉa. La fonto neniam sekiĝis. Malgraŭ ke la fonto estas ombrata de densaj frondoj, en ĝi troviĝas neniu folio pro la konstanta fluado de ĝia akvo. Eĉ se oni intence metas foliojn sur ĝin, ili rapide forportiĝas de la impete ŝprucanta akvo. De tio la fonto ricevis sian nomon. Se oni infuzas por si kruĉon da teo, uzante akvon el tiu fonto, sidiĝas kaj gustumas la delikatan trinkaĵon, oni certe refreŝiĝas kaj profunde ĝojiĝas.

FUNGOJ KUN ENIGITA VIANDO

Materialoj:

porka femuraĵo	200 g.
fungoj	24
pecetoj de ŝinko	25 g.
verdaj faboj	24
ovoblanko	de 2 ovoj
salo	5 g.
vino	5 g.

trapa amelo	10 g.
viandsupo (sen viando)	50 g.

Preparado:

1. Muelu la porkan femuraĵon, miksu ĝin kun la vino, salo kaj ovoblanko, forigu la radikojn de la fungoj, enigu en la fungojn la muelitan femuraĵon kaj metu la pece-

tojn de ŝinko kaj la verdajn fabojn sur la supraĵon de la fungoj.

2. Plene vaporumu tiujn fungojn kaj poste metu ilin en pladon. Enpatigu la supon miksititan kun la amelo, boligu ĝin, ĝis ĝi fariĝas iom glua, kaj verŝu ĝin sur la fungojn. Kaj tiam vi povas ĝui la pladon.



HONG YING:

Inter geedzoj

IUJ legantoj skribis al ni, ili demandis, kiel ĉinoj aranĝas la dommastruman laboron kaj kiel geedzoj kunvivas harmonie? Por kontentigi tiujn legantojn, mi iom parolu pri bagateloj en du familioj.

LA JUNAJ GEEDZOJ NE PLU KVERELOS

Lou Hongxia, mia nova amikino, estas laborantino de la Pekina Bicikl-rulĉena Fabriko. Mi vizitis ŝin en ŝia ripoztago. Tiam ŝi estis faranta novan veston por sia filino, dum ŝia edzo Wang Zhigang, knedante farunon, vivece rakontis al la filino belan historion.

“Ĉu vi preparas pasteĉon?” demandis mi.

“Je ĝojo hodiaŭ li preparas pasteĉon bongustan por vekinian apetiton,” diris la edzino kun rideto.

“Vidu, hodiaŭ mi funkcias samtempe kiel kuiristo kaj vartisto,” fiere diris la edzo. Vidante, ke la juna paro vivas tiel intime, kiu povus imagi al si, ke ili kverelis pro dommastrumado en la du jaroj post la geedziĝo.

Ankaŭ Wang estas laboristo de la sama fabriko. En 1968, kiam Wang kaj Lou diplomitiĝis el mezlernejo, ili eniris la fabrikon kaj laboris en sama grupo.


En la laboro kaj kontakto ili ekhavis komunan amsenton. En 1974 ili geedziĝis.

La patro de Wang estas paralizita kaj la tri fratinoj jam edziniĝis. Antaŭ sia edziĝo Wang devis sola zorgi pri sia patro kaj fari dommastrumadon. Post la edziĝo li opiniis, ke “ĉio ĉi devas esti plenumita de la edzino” kaj li devas sin distri. Tial li ofte foriris, post vespermanĝo, al junuloj de la fabriko por sin distri. Kelkfoje li eĉ ne hejmenvenis post laboro. Pro tio Lou ofte grumblis kaj la geedzoj iam eĉ kverelis.

Foje en malfrua vespero Wang ankoraŭ ne revenis hejmen. En

la fabriko domo por fraŭloj Lou trovis, ke la edzo ludas pokeron kun junuloj. Ŝi kolere kritikis lin kaj postulis, ke li revenu hejmen. Wang opiniis, ke ŝia kritiko antaŭ publiko lin senhonorigis. Apenaŭ li revenis hejmen, li fermis la pordon kaj elbuŝigis kolerajn vortojn unujn post aliaj. Pro eksplodo de kolero li batis sian edzinon. Ŝi ĉagrene foriris al la familio de sia patrino.

Post tio la patro riproĉis sian filon: “Vere maldece! Kiel bona bofilino, kial vi batis ŝin?” Ekrigardante la manon, Wang sentis doloron en la koro kvazaŭ de elektrofrapo. Subite li ekpensis pri la okazaĵo en 1970, kiam li havis amrilaton kun Lou. Iufoje la montrofringro de lia maldekstra mano estis parte fortranĉita de maŝino. Vidinte tion, Lou ekploris ĉagrene. Dum lia ripozado en la hejmo Lou ofte vizitis lin, helpis lin fari dommastrumadon kaj konsilis lin bone ripozi. Kiel impertinente estis ŝin bati! Li pensis ankaŭ, ke antaŭ sia edziĝo li manĝis ofte malkomforte kune kun sia patro. Sed post ilia geedziĝo, lia



Lou Hongxia kaj ŝiaj edzo kaj infano en ripoztago

patro manĝis komforte kaj surportis vestojn faritajn de ŝi. Li sentis fortan bedaŭron pro la malbona konduto al la edzino.

La sekvan tagon Wang venis al la familio de la bopatrino, la edzino ne salutis lin. Ankaŭ la bopatrino estis malkontenta pro lia kruda konduto kaj kritikis lin: "Pensu, vi ambaŭ laboras kaj devas kune fari dommastrumadon. Vi ne rajtas taski tion nur al via edzino. Ne kondu laŭ via plaĉo!" Wang aŭskultis la diron prava, ruĝiĝis kaj diris kun klinita kapo: "Panjo, mi eraris, mi ne rajtis ne zorgi pri dommastrumado, des malpli bati ŝin." La patrino rimarkis, ke la bofilo estas sincera en konfeso de sia eraro, kaj konsilis sian filinon paciĝi kun li.

Lou estas junulino bonkora kaj serena. Ŝi klare sciis, ke kvankam Wang estas eksplodema, tamen li estas bonkora. Delonge lia patrino forpasis, tial li traktis la patrinon de Lou kiel la sian. Ĉiufoje, kiam li vizitis sian patrinon, li aĉetis por ŝi bongustaĵojn. Kiam ŝi malsaniĝis, li veturigis ŝin al hospitalo. Wang bone prizorgis Lou kaj ofte aĉetis por ŝi dolĉajn manĝaĵojn, kiujn ŝi ŝatas. Post lia konfeso de la eraro ŝi pardonis lin.

En 1977 ili naskis filinon, kiu ilin ĝojigis. Fariĝinte patro Wang pli multe zorgis pri dommastrumado. Ekde tiam Wang ĉiutage akompanas la infanon iri al la infanvartejo kaj reveni al la hejmo post laboro, dum Lou aĉetas legomojn kaj preparas vespermanĝon.

Lastatempe Wang Zhigang ekfunkciis kiel vicestro de la laborejo. Tage li pene laboras kaj vespere li lernas maŝin-de-segnadon. Ĉio ĉi ekĝojigis la

edzinon. Ili vivas harmonie kaj ŝpare. Per akumulita mono ili aĉetis sofojn, kudromaŝinon, televizion k.a.

"Eble nun ne troviĝas ĉe vi malakordoj, ĉu?" demandis mi. Aŭdinte tion, Wang ekridetis embarasite kaj diris: "Malakordoj aperas ofte, tamen ni pardonis kaj prizorgis unu la alian. Ĉar ni havas komunan volon kaj intereson, tial ni cedas unu al la alia en bagateloj. Nun mi havas profundan komprenon pri tio, ke la geedzoj devas vivi pace kaj prizorgi unu la alian."

Babilante, ni preparis pasteĉon. La kvarjara infano iris tien kaj ĉi tien. Mi vidis, ke ŝi havas diketan korpon kaj plaĉan aspekton, kaj petis: "Xiaoxia, vi kantu por mi kanton, ĉu bone?" Kun nenia timo ŝi ekkantis: "Bonan paĉjon mi havas, kaj bonan panjon mi..." Je tio ni ĉiuj ekridis.

MALJUNAJ GEEDZOJ BONE ZORGANTAJ UNU PRI LA ALIA

La dua familio, kiun mi volas tuŝi, estas tiu de veterana inĝeniero Jiang Huishan. Li havas aĝon de 62 jaroj kaj laboras kiel estro de la Projekta Instituto de Ŝosea Planado sub la Trafika Ministerio. Li havas kvar gefilojn, inter kiuj du filoj havas profesion, edziĝis kaj vivas aparte de siaj gepatroj, unu filino laboras kaj la alia lernas en altlernejo. Mao Xiaohua, edzino de Jiang Huishan, jam emeritiĝis.

Ŝi estas bonkora kaj lerte laboras. Ĉion en la hejmo ŝi aranĝas bonorde, ekz. aĉeti legomojn, lavi vestojn, prepari manĝon kaj zorgi pri la gefiloj. Ŝi volonte faras pli da dommastru-


maj laboroj, por ke ŝiaj edzo kaj gefiloj vivu komforte.

Antaŭ dek jaroj, inter iliaj gefiloj iuj laboris kaj aliaj vizitis lernejon. Antaŭ ol ŝiaj edzo kaj infanoj revenis hejmen, ŝi purigis la ĉambron, aĉetis legomojn kaj preparis manĝon. Tiam ŝi sentis fortan solecon. Vespere, kiam ŝiaj edzo kaj infanoj parolis varme pri sia laboro kaj lernado, ŝi enviis kaj ofte pensis: "Estus tre bone, se mi povus labori por fari kontribuon al la socialisma konstruado!"

En 1971 fabriko estis starigita ĉe la strato. Mao Xiaohua konsiliĝis kun sia edzo: "Lao Jiang, mi ĉiam sentas solecon en la hejmo, kaj tial mi volas labori en la fabriko. Ĉu vi konsentas?" Jiang Huishan bone komprenis sian edzinon kaj kontentigis al ŝi la peton. Li pensis: Ŝi devenas de kamparana familio kaj alkiutimiĝis al fizika laboro. Kaj plie, la geedzoj de multaj familioj loĝantaj en la sama etaĝdomo havas laboron. Pro tio li konsentis sian peton, por ke ŝi ricevu ĝojon el socia laboro.

Post kiam Mao Xiaohua fariĝis laboristino de la fabriko, Jiang Huishan memvole helpis sian edzinon fari dommastrumadon, konsiderante, ke la du filinoj laboras kaj lernas malproksime de la hejmo kaj havas multan tempon dommastrumi. Li trovis, ke fari konvenan fizikan laboron post streĉa menslaboro estas bona rimedo por forigi lacon kaj refreŝigi la menson. Jiang ĉiumatene ellitiĝis pli frue por promeni. Revenante de la promenado li ofte aĉetis legomojn, viandon k.a. Tagmeze Mao revenis hejmen pli frue ol Jiang, kaj ŝi preparis tagmanĝon. Kaj vespere Jiang revenis hej-

Jiang Huishan kaj liaj edzino kaj nepo



men iom pli frue ol la edzino, kaj li siavice preparis vespermanĝon. Sed lia edzino ofte preparis vespermanĝon en la tagmezo kaj li bezonis nur varmigi ĝin vespere.

Dimanĉe la filinoj anstataŭ la gepatroj purigas la ĉambron, aĉetas legomojn kaj preparas manĝon. Se Jiang ne havas

urĝan aferon, li do akompanas la edzinon iri al la parkoj Jing-shan kaj Beihai en la proksimo.

En la antaŭlasta jaro Mao Xiaohua emeritiĝis, ĉar la infanvartejo zorganta ŝian du-kaj duonjaran nepon Nan Nan estas malproksima de la hejmo kaj maloportuna al la gepatroj. Ŝia filo lernas en televida universi-


tato, dum ŝia bofilino studas en vespera universitato. Mao Xiaohua ne volis, ke la nepo ĝenu siajn gepatrojn, kaj pro tio memvole emeritiĝis por prizorgi la nepon en la hejmo.

En ferio aŭ festo la filoj kaj bofiloj senescepte vizitas la maljunajn gepatrojn. Tiam la tuta familio plenas de ĝojo.

KARIKATURO

Fumanta Kato

Pentrita de Lu Yan



Magia pafistino

Wu Lanying



Wu Lanying

BATALO POR ĈAMPIONECO

Estis la somero de 1981. En la pafejo de Tucuman en Argentino oranĝaj argildiskoj flugis ĉielen unu post alia, kaj pafoj sonis sinsekve. La trafitaj diskoj disfalis en pecetoj. Tie iris la 42-a Mondĉampionado de Diskopafado. Post dutaga intensa konkuro, la 52-jara usona Hill kaj la juna ĉina pafistino Wu Lanying komencis konkuron inter si por la ĉampioneco, venkinde respektive ĉiujn siajn rivalojn per samaj akumulitaj poentaroj.

La rezulto de la 25 pafoj en la lasta rondo decidis kiu estos la ĉampiono. La fortika Hill plena de memfido iris al la pafejo, frapetinte ŝultron de Wu Lanying. Wu Lanying kapsalutis lin ridetante. En la konkursejoj ekregis streĉa atmosfero. Hill ja estis veterana pafisto kun 30-jara sperto. Li paftrafis 23 el la 25 celoj, kaj manklakado tondris inter la rigardantoj.

Estis vico de Wu Lanying. Ŝi prenis taŭgan pozon kaj kriis:

“Mi estas preta!” La argildiskoj tuj flugis el la subtera ĵetstacio unu post alia. “Paf!” unu disko disfalis. Wu trafis 24 el la 25 celoj, superante la rivalon per 184 poentoj, kaj per tio gajnis la konkursan ĉampionecon. La rigardantoj hurais kaj kriis “Ĉinio, Ĉinio!” por gratuli la ĉinan knabinon, ke ŝi unuafoje gajnis la plej altan gloron en la sporto.

KNABINO SUPERAS KNABEGOJN

Wu Lanying estas 27-jara kaj 1.65 metrojn alta. Ŝi, kun rondaj vangoj kaj grandaj okuloj, estas bela kaj kvietita. Ŝi antaŭe estis lernantino de la Mezlernejo por Fervojistaj Gefiloj en Zhengzhou. Ŝia patro estas fervojisto kaj la patrino kuiristino. Ŝia familio ne estis bonhava. Ĉiutage, reveninte de la lernejo, ŝi devis helpi la gepatrojn kuiradi kaj vestolavi. Influate de la gepatroj, ŝi fariĝis laborema, modesta, diskreta kaj lernema.

En la lernejo Wu ricevis bonajn notojn kaj tre ŝatis sporton. Post lecionoj ŝi ofte faris longdistancon kuradon kaj eĉ ludis tablotenison kun knaboj.

En la someraj ferioj de 1973, ŝia lernejo okazigis pafotrejnadon. Ŝi unuafoje venis al la pafejo, kie la siblantaj pafoj vekis ĉe ŝi grandan intereson. Ŝi tre ĝojis kaj decidis fariĝi pafistino.

Komence ŝi sin ekzercis en plurdirekta diskopafado. Post du jaroj la trejnisto elektis ŝin por dudirekta diskopafado. Dank’ al sia modesta kaj diligenta lernado ŝi progresis rapide. En la ĉina tutlanda pafkonkurso de 1978 ŝi sin anoncis por partopreni la viran diskopafadon, ĉar tiam estis neniu alia pafistino krom ŝi. Ŝi superis ĉiujn pafistojn kaj akiris la ĉampionecon. En manklakado de la rigardantoj Wu Lanying iris antaŭe al la premia podio kaj ŝin sekvis la knabegoj. Tio multe embarasis la lastajn. Ili honte mallevis la kapon kaj diris kaŝe: “Se ni venontfoje lasos ŝin refoje gajni

la ĉampionecon, ni do iros sur la manoj.”

La afero kvazaŭ intence mokis la knabegojn: En la tutlanda sportkunveno de la sekvinta jaro Wu Lanying rompis la mondan rekordon per 194 poentoj kaj refoje gajnis la tutlandan ĉampionecon. La knabegoj vole-nevole devis gratuli ŝin per manpremo, nomante ŝin “magia pafistino”.

RIGORA TREJNADO

En la lastaj jaroj la progreso de Wu Lanying estis ĝojiga. En 1981 ŝi gajnis orajn medalojn de la monda virina dudirekta diskopafado kaj de la Azia Konkurso de Diskopafado okazigita en Japanio. En la ĉina pafkonkurso ŝi refoje gajnis 194 poentojn.

La progreso de Wu Lanying devenis de diligenta ekzercado. Ŝi ofte diris: Se oni volas superi la aliajn en konkursoj, oni de-

vas ricevi en trejnado tian hardadon kian aliaj ne ricevas. La konkurso de diskopafado estas maratono sur pafejo, kiu ĉiufoje daŭras tri tagojn. Ĉiu pafisto devas trapasi ok rondojn, tiel ke sen persistemo oni ne povas finplenumi tion. Tial longdistanca kurado fariĝis por ŝi unu el la ĉefaj trejnoj. Ŝia kurado longiĝis de ĉirkaŭ dumil metroj en la komenco ĝis dekmil metroj. Por sin ekzerci, iam ŝi kuris 8 kilometrojn al la urbo pro afero, anstataŭ veturi per buso aŭ biciklo. Krome ŝi sin ekzercis ankaŭ per rekado, paralelado, halterado, ŝnursaltado kaj aliaj.

En la teknika trejnado Wu montris ankoraŭ pli fortan persistemon. Ŝi tuttage sin ekzercis per kvar-kilogramo ĉaspafilo subĉiele ĉu en varmega somero aŭ frosta vintro, ĉu en ventado aŭ en pluvado. Ĉiufoje ŝi levadis la pafilon dumil-foje, kaj aldone 1,500-foje post vesper-

manĝo. Ŝi opiniis, ke en kvieta nokto oni povas pli bone koncentri sian energion kaj trovi leĝon por manipuli pafilon sub prilumado de jod-tungstenaj lampoj. En iu neĝnokto ŝi foje-refoje korektis sian pozon, kaj nerimarkite ŝia korpo jam estis kovrita per dika tavolo da neĝo. Nur kiam la kuroj perdis sian senton, ŝi konsciis, ke jam estas profunda nokto. Post okjara trejnado ŝi fine fariĝis unu el la eminentaj pafistoj en la mondo.

POST FAMIGO

Post kiam Wu Lanying gajnis la mondan ĉampionecon, ŝia nomo rapide disvastiĝis. Ŝia sukceso fariĝis paroltemo de multaj homoj. Sed Wu Lanying ne ebriiĝis de la laŭdoj nek fanfaronis pri sia sukceso. Ŝi diris: “Mi klopodos krei novan rekordon en la ĉi-jara azia sportkunveno kaj en la Olimpikoj de 1984. Mi strebas rompi la mondajn rekordojn en internaciaj konkursoj.”

Ĉar Wu Lanying akiris grandan sukceson en sia afero, ŝi havas multajn adorantojn kaj ankaŭ iuj el ŝiaj kolegoj esprimis al ŝi sian amanton. Ili tamen ne tuŝis la koron de Wu Lanying, ĉar ŝi jam havis amanton, kiu estas fervojisto kaj amikiĝis kun ŝi jam de infaneco. Ŝi ne ekmalŝatis lin pro tio, ke ŝi estas monda ĉampiono. Ili geedziĝis antaŭ la Novjara Tago de 1982. Tiutage la novedzo biciklis al la hejmo de la novedzino por bonvenigi ŝin. Ili riverencis al la duflankaj gepatroj kaj tiel finis la geedziĝan ceremonion. Anstataŭ abundaj bankedoj, ili regalis la gastojn per teo, kukoj kaj bombonoj. Multaj homoj laŭdis la simplan sed viglan geedziĝan ceremonion.

Wu Lanying kaj ŝia trejnisto Liu Jisheng



Xiao Mu estas belarta projektisto de la Ŝanhaja Impresfilma Fabriko kaj havas 49 jarojn. Kvinjara, li grave malsaniĝis kaj fariĝis surd-mutulo. Ankaŭ lia edzino Jin Xixiang estas surd-mutulo kaj laboras kiel asist-inĝeniero de la Desegna Sekcio sub la Unua Tinktura Fabriko de Ŝanhajo.

— La Red.

En 1980 la Ŝanhaja Malpez-industria Buroo nomumis min belarta projektisto. En la nomum-anonca kunveno mi trovis, ke ĉiuj aliaj sep novaj projektistoj estas diplomitoj de la belarta fako de instituto, dum mi nur lernis ses jarojn en surd-mutula lernejo. Mi tre maltrankviliĝis kaj suspektis, ke oni eble faris eraron. Mi neniel atendis, ke iuj el la kleraj kolegoj tiel laŭdis min, kaj aliaj eĉ skribis: “Vi estas nia bona ekzemplo, kamarado Xiao Mu.” Por forigi mian dubon iuj kamaradoj diris al mi, ke oni promocias ne nur laŭ longeco de tempo de edukado, sed ankaŭ laŭ efektiva kapablo en laboro, kaj kuraĝigis min sentime fari belartan projektadon. Tiam nature venis al mi en la kapon la vortoj de mia instruisto en la surd-mutula lernejo: “Venku la fizikan mankon kaj mastru vian propran vivon.” Mi ja tiel travivis la pasintajn pli ol dudek jarojn.

En 1952, kiam mi diplomitiĝis el la surd-mutula lernejo, mi lernis pentri afiŝojn en kinejo, lernis pakdesegnon en inka fabriko kaj poste estis postenigita al la Impresfilma Fabriko. La nombro de laboristoj de la fabriko kreskis de tricent ĝis pli ol mil, kaj en 1978 oni starigis filion. Nun la fabriko produktas ne nur rulfilmon, X-radian filmon por medicino kaj fotogra-

fian paperon, sed ankaŭ koloran filmon. La belarta projektado en tiu fabriko estas peza laboro por mi. Tamen mi ĉiam pli amas la variantan mondon, en kiu troviĝas sennombraj belaĵoj. Ĉion en la ĉielo, sur la tero kaj en la akvo mi pririgardas por fari skizon. Por konsulto mi kolektis diversajn fabrikmarkojn, bombonpapirojn, katunpecojn kaj markojn sur boteloj. Por bone fari la pakdesegnon por eksportaj varoj, mi lernis diferencigi unu de alia la skribtipojn de 15 lingvoj, kiel la latinan, japanan, araban, grekan, cirilan kaj aliajn. Ĉiufoje, kiam novspeca filmo estas produktita, mi zorgeme faras por ĝi pakdesegnon. Por facile interŝanĝi sperton kun miaj kolegoj, mi aranĝas montrofenestron por iu magazeno de fotografaj instru-

mentoj en Ŝanhajo kaj projektas la dispozicion de la halo por malpez-industriaj produktadoj en la Ŝanhaja Industria Ekspoziciejo.

Krome, mi ofte faris belartajn projektojn ekster mia labor-sfero. Jam antaŭ pli ol dudek jaroj, kiam la fotoaparato produktita en Ŝanhajo komencis esti uzata, iuj malestimis ĝin, sed mi estis fiera pro tio ke la fotoaparato estis produktita de la patrolando kaj deziregis projekti por ĝi markon. Mi bone memoras, ke iufoje mi promenis laŭborde de Huangpu-rivero kaj vidis, ke kelkaj mevoj flugas tien kaj tien apud ŝipo sur la bela rivero. Subite venis al mi la ideo, ke la ĉinaj fotiloj ĝuu famon en la mondo, kiel mevo. Tuj mi faris skizon pri ili kaj reveninte hejmen mi projektis la

Xiao Mu kaj lia edzino Jin Xixiang en esplorado pri pentrarto



markon "Mevo", kiu estis akceptita de la Ŝanhaja Fotoaparata Fabriko.

En 1972 la ĉina ĉefministro Zhou Enlai kaj la usona prezidanto Nixon subskribis la Ŝanhajan Komunikaĵon inter Ĉinio kaj Usono. Tiutage estis solena festeno, por kiu mi projektis la invitilon kun bildo: imponaj kaj firmaj vintraj umefloroj.

En 1978 nia lando okazigis la Tutlandan Sciencan Konferencon. Antaŭ la konferenco ĝia prepara servo kolektis el la tuta lando desegno-projektojn pri la konferenca emblemo, kaj mi sendis al ĝi unu el la kvin aŭ ses desegnaĵoj projektitaj de mi. Sur mia desegnaĵo estis pentritaj flirtanta ruĝa flago, kiu simbolis la prosperantan patrolandon, distingiĝa atomnukleo, kiu simbolis la Komunistan Partion de Ĉinio gvidantan nian landon en konstruado, kaj ankaŭ ruĝa raketo, kiu simbolis la marŝon al la kvar modernigoj kaj grimpon al la pinto de la monda scienco. Nelonge poste, mia desegnaĵo estis elektita de la Tutlanda Sciencna Konferenco el centoj da desegnaĵoj kaj laŭ sciigo mi iris al Pekino partopreni en la aranĝo por la ekspozicio pri la fruktoj de la scienco. Ĉiuj miris ĉe la informiĝo, ke la projektinto de la emblemo estas surdmutulo. Mi sentis min koregoja kaj fiera, kiam mi vidis, ke sciencistoj portas sur sia brusto la insignon fabrikitan laŭ mia desegno. Oni ankaŭ emisiis poŝtmarkon kun mia desegnaĵo kaj vidigis ĝin per kinoflmo kaj televid-programo.

Nun mi fariĝis membro de la Ĉina Belarta Asocio de Industrio kaj tiu de la Ŝanhaja Asocio pri Paka Tekniko. Mia edzino ĉiam helpas min en mia lernado

kaj laboro. Ni konatiĝis en aranĝo de la belarta ekspozicio de surdmutuloj. Ŝi estas tre okupita kaj ofte vizitas aliajn lokojn por plitalentigi sin en katun-desegno. Ni vivas kun ĝojo de post kiam ni geedziĝis en 1961. Ni havas du filojn kaj la unua ŝatas belarton. Vespere ni ofte diskutas pri belarto, kio multe helpas mian edzinon en ŝia laboro. Foje katuno kun la desegnaĵo "Pavoj kaj Floroj", projektita de ŝi, gajnis la unuan premion de la produktokvanto-fiksa kunveno de katuno por enlanda merkato. Iuj nomis ŝin ĉampiono en desegno de grandaj floroj.

Mia edzino estas popola reprezentanto tiel en Ŝanhajo kiel en la distrikto Hongkou de Ŝanhajo kaj mi mem estas membro de la Distrikta Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Mi havas multe da surdmutaj amikoj kaj ili ofte esprimas al ni siajn malfacilojn, kaj tion ni konigas al la popola registaro. Ekz., nombro da fabrikoj senescepte faris al junaj laboristoj ekzamenon pri matematiko, fiziko, kemio kaj fremda lingvo, kio estas granda malfacilo por la junaj surdmutuloj. Iuj el ili fariĝis malbonhumoraj pro malsukceso en la ekzameno, kio malbone influis ilian laboron. Tial mia edzino faris proponon, kiu estis akceptita post diskuto de la distrikta popola kongreso. Ekde tiam oni ne faras tian ekzamenon al junaj surdmutuloj. La surdmutuloj volis partopreni en sportado, sed mankis al ili sportejoj kaj trejnistoj. Sekve, mi prezentis ilian deziron al la distrikta registaro. La sporta komitato de la distrikta registaro alte taksis mian prezenton, postenigis trejnistojn kaj donis sportejoj. En la Ŝanhaja

tablotenisa konkurso por surdmutuloj la Hongkou-distrikta teamo sub mia gvido gajnis la viran teaman ĉampionecon kaj la individuan ĉampionecon por 1980; kaj en la Ŝanhaja korbo-pilka konkurso por surdmutuloj por 1981, nia distrikto gajnis la viran teaman ĉampionecon.

Ni kvin homoj loĝas en unu etaĝdomo. Ĉiumonate mi kaj mia edzino kune ricevas salajron de pli ol 200 juanoj, tiel ke ni havas kompare facilan vivon. Mia patrino havas 78 jarojn. Por ke ŝi ne sentu solecon, mi dungis kamparan virinon por ŝin prizorgi. Krom doni vivrimedojn al la maljunulino, ni aĉetis por ŝi radioricevilon kaj televidilon. De tempo al tempo mi aĉetas por ŝi kukon aŭ aliajn bongustaĵojn, kaj preparas por ŝi bongustajn pladojn. La maljunulino ofte laŭdas, ke mi estas lojala al miaj gepatroj kaj ke mia edzino estas bonkora bofilino.

Pro manko de sufiĉa energio mi petis, ke la fabriko varbu por mi metilernanton. Mi elektis junan laboriston Xiao Xu, kiu havas bonan fundamenton de belarto. Post kiam li venis al la fabriko, mi ofte gvidas lin fari skizon kaj aranĝi ekspozicion. En la pasinta jaro la pakdesegnaĵo por kolora fotografia papero projektita de mi gajnis la unuan premion en la tuta urbo. La fabrikmarko projektita de Xiao Xu gajnis la duan premion.

La kaŭzo, ke mi kiel surdmutulo kun malalta edukiteco fariĝis belarta projektisto, ne kuŝas en tio, ke mi havas grandan kapablon, sed en tio, ke mi vivas en feliĉa epoko, en kiu mi povas plene disvolvi mian talenton. Mi dediĉos mian tutan vivon al nia epoko.

Teatra reĝisoro Wu Jian

Fotoj de LAO BO



Wu Jian

La fama reĝisoro Wu Jian estas konsilanto de la Pekina Esperanto-Asocio. Li sin okupas pri teatra prezentado kaj reĝisorado jam 45 jarojn. Dum tiu tempo li reĝisoris pli ol 30 klasikajn, modernajn, ĉinajn kaj eksterlandajn teatrojn kaj ricevis laŭdojn de la spektantoj. En 1936, kiam Wu Jian vizitis mezlernejon, li jam kontaktiĝis kun Esperanto. Post du jaroj li eklernis ĝin. En 1949 li kiel membro de la Ĉina Junula Delegacio partoprenis en la Monda Junula Festivalo okazigita en Hungario kaj renkontis hungarajn esperantistojn. Tie li interparolis kun ili en Esperanto kaj starigis kun ili amikecon. Nun tiu pli-ol-60-jara artisto ankoraŭ aktive laboras por disvastigi Esperanton.



En 1956 Wu Jian ludis la rolon de Florindo en la itala komedio "Lakeo de Du Mastroj".



En reĝisorado




Parto de la teatraĵoj reĝisoritaj de Wu Jian



Juna laboristino

La Liaoyang-a Kemifibra Urbo


Fotoj de LIU CHEN




Wu Jian (maldekstre) en la kunsido de la konsilantaro de la Pekina Esperanto-Asocio





Wu Jian kaj liaj familianoj



Direktejo de la fabriko



Angulo de la urbo



La laborejo de poliestera fibro



Bonorda kaj pura laborista loĝkvartalo



Forcejo de la fabriko



LA PERIODO DE PRINTEMPO KAJ AŬTUNO

de BA HONG

POST kiam la reĝo You de Zhou-dinastio estis mortigita de ĉuanĵong-nacieco, lia unua filo Yijiu surtroniĝis. Li estis la reĝo Ping. Tiam la ĉefurbo Gaojing jam fariĝis kaduka. En la jaro 770 a.K. la reĝo Ping prenis Luoyi kiel novan ĉefurbon (la nuna urbo Luoyang de Henan-provinco). Ekde tiam komenciĝis la periodo de Orienta Zhou-dinastio kaj la antaŭan oni nomas Okcidenta Zhou-dinastio. La Orienta Zhou-dinastio inkluzivas la Periodon de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a. K.) kaj la Periodon de Militantaj Regnoj (475-221 a. K.).

La Periodo de Printempo kaj Aŭtuno estis la etapo de disfalo de la sklava sistemo. La Periodo de Militantaj Regnoj estis la etapo, en kiu fondiĝis la feŭda socio. La du periodoj estis epoko de socia transformiĝo.

Dum la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno la reĝo de Zhou-dinastio plimalfortiĝis kaj la kortego ne plu povis efike regi la landon. Preskaŭ ĉiuj princolandoj sendependiĝis kaj ne plu obeis la ordonon de la reĝo nek plu tributis al li. Zhou-dinastio havis nur pozicion de malgranda feŭdula regno kaj konservis nur nominalan reĝon. En tiu tempo iuj potencaj feŭduloj superregis la aliajn tenante la reĝon en sia mano por grandigisian forton.

En la komenco de tiu periodo troviĝis pli ol 170 feŭdulaj regnoj, el kiuj restis, post multjaraj

aneksaj militoj, nur Qi, Jin, Chu, Wu, Qin kaj Yue. Ili longe kaj ofte militis por akiri pli da tero, pli da loĝantaro kaj hegemonion.

QI-REGNO SUPERREGIS CENTRAN ĈINION

Qi-regno troviĝis en la nuna Shandong-duoninsulo ĉe la orienta marbordo de Ĉinio, ĝia produktado estis kompare progresita. En la jaro 686 a.K. okazis interna batalo en Qi-regno, kies regnestro Xianggong estis mortigita. Li havis du fratojn: Jiu tiam estis en Lu-regno (la sudokcidenta parto de la nuna Shandong-provinco kun Qufu kiel ĝia ĉefurbo); Xiaobai tiam estis en Ju-regno (la sudorienta parto de la nuna Shandong-provinco). La du fratoj havis respektive kun si mentoron: tiu de Jiu estis Guan Zhong kaj tiu de Xiaobai estis Bao Shuya. Informiĝinte pri la morto de Xianggong, la du fratoj hastis revene al Qi por heredi la regnon.

La regnestro Zhuanggong de Lu decidis persone eskorti Jiu al la patrolando. Guan Zhong diris al Zhuanggong: "Xiaobai estas en Ju-regno, kiu estas pli proksima al Qi-regno. Se li pli frue enirus Qi-regnon, la afero fariĝus pli komplika. Mi iru bari lin per trupo survoje."

Xiaobai kun eskorto el Ju-regno hastis reveni al Qi-regno. Li renkontis survoje la baron de

Guan Zhong. Guan levis la arkon kaj celpafis sagon al Xiaobai, kiu falis en sia ĉaro kun kriego.

Opiniante, ke Xiaobai jam mortis, Guan Zhong aplombe eskortis Jiu al Qi-regno. Fakte, la sago de Guan Zhong trafis nur vestohokon de Xiaobai, kiu ruze falis kun kriego. Kiam Jiu kaj Guan Zhong eniris Qi-regnon, Xiaobai jam estis en la ĉefurbo Linzi (en la nordorienta parto de la urbo Zibo en Shandong). Xiaobai surtroniĝis kiel Huangong de Qi-regno.

La regnestro Huangong tuj sendis armeon por ataki Lu-regnon. Venkite, Lu-regno devis mortigi Jiu kaj sendi Guan Zhong al Qi-regno por puno.

Guan Zhong estis sendita al Qi-regno en krimula ĉaro. Bao Shuya tuj rekomendis lin al Huangong. Huangong diris kole-re: "Guan Zhong arkpafis por min mortigi. Ĉu mi povas enoficigi lin?" Bao Shuya diris: "Antaŭe li estis mentoro de Jiu. Tio, ke li arkpafis vin, montris lian lojalecon al Jiu. Lia kapablo multe superas la mian." Huangong estis grandanima, li ne nur ne punis Guan Zhong, sed nomis lin altrangulo por administri la ŝtaton.

Guan Zhong helpis Huangong en ordigo de la ŝtataj aferoj, ekspluatado de riĉrezervoj kaj fermado de agrikulturaj instrumentoj, plibonigo de agrokultura tekniko, preparado de

salo el marakvo por vendi ĝin al aliaj feŭdulaj regnoj. Tiamaniere Qi-regno riĉiĝis kaj potenciĝis.

Guan Zhong proponis al Huangong: “Via moŝto petu aŭdiencon de la reĝo de Zhou-dinastio por proponi al li kunvoki la feŭdulojn per la reĝa ordono por kontrakti pakton, tiel via moŝto certe estos elektita kiel superreganto de la aliaj feŭduloj.”

La afero iris vere laŭ la imago de Guan Zhong. La reĝo de Zhou-dinastio informis, laŭ la propono de Huangong, la feŭdulojn, ke ili iru al Beixing (en la norda parto de Dong’a-gubernio, Shandong-provinco) por kunveno. Huangong estis elektita kiel superreganto kaj la feŭduloj en centra Ĉinio obeis lin kaj tributis al li.

Post la morto de Guan Zhong kaj Huangong, okazis interna tumulto en Qi-regno. Tial finiĝis la hegemonio de Qi-regno. Poste Wengong de Jin-regno kaj Zhuangwang de Chu-regno fariĝis superregantoj sinsekve. En la lasta stadio de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno ankaŭ la regnoj Wu kaj Yue ĉe la malsupra baseno de Jangzi-rivero partoprenis la militon por hegemonio.

SUN WU TREJNIS PALACAJN KNABINOJN

En la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno estis granda komandanto Sun Wu, kiu estis naskita en Qi-regno kaj poste fuĝis al Wu-regno (plejparto de la nunaj Jiangsu-provinco kaj Ŝanhajo kaj parto de la provincoj Anhui kaj Zhejiang, ĝia ĉefurbo estis ĉe la nuna Suzhou). Kunportante sian verkon pri milita arto, li petis aŭdiencon de la



Sun Wu trejnas palacajn knabinojn.

reĝo Helŭ de Wu-regno. Traleginte la verkon Helŭ aŭdiencis Sun Wu kaj diris al li: “Vian verkon en dek tri ĉapitroj mi jam tralegis. Ĉu oni povus fari eksperimenton laŭ via verko?” Sun Wu respondis: “Jes.” Helŭ donis 180 palacajn knabinojn al Sun Wu por la eksperimento kaj mem sidis sur teraso por rigardi.

Sun Wu dividis la knabinojn en du taĉmentojn kaj nomumis du kromedzinojn de Helŭ taĉmentestroj. Li ordonis la knabinojn preni halebardojn por trejnado. Klariginte al la knabinoj la ordonojn kiel sin turni dekstren kaj maldekstren, iri antaŭen kaj returniĝi, Sun Wu demandis ilin, ĉu tion ili povas fari. Ili respondis: “Jes!” Sun Wu ripetis plurfoje: “Se vi ne obeos la ordonon, vi ricevos militan punon.” Poste oni signalis lian ordonon per tamburado. La palacaj knabinoj kutimis kanti kaj danci kaj neniam ricevis tian trejnadon. Aŭdinte la ordonon, ili fariĝis pli senordaj kaj ridis senĉese. Sun Wu diris: “La ordonoj kaj movoj estis ne

klare diritaj, tial vi manovris malbone. Do kulpis ne vi, sed mi la komandanto.” Poste li klarigis la ordonojn plurfoje kaj oni denove donis lian ordonon per tamburado. La knabinoj estis ankoraŭ senordaj kaj senĉese ridis. Sun Wu diris: “Antaŭe mi ordonis ne klare, tial vi manovris malbone. Nun la ordono jam estis bone klarigita, sed vi ne agis laŭ ĝi, do kulpis vi ĉi-foje. Laŭ la milita leĝo viaj taĉmentestroj estos punitaj!” Tion dirinte, li ordonis senkapigi la du taĉmentestrojn. Aŭdinte tion, la reĝo surpriziĝis kaj haste ordonis: “Mi jam sciis, ke via generala moŝto lerte komandas. La du belulinoj nepre ne estu senkapigitaj. Sen ilia akompano mi eĉ ne povas manĝi.” Sun Wu diris: “Mi jam estis nomumita komandanto, la komandanto en armeo ne akceptas la kontraŭordonon de la reĝo.” Tiamaniere laŭ la ordono, la du taĉmentestroj estis senkapigitaj. Poste aliaj du knabinoj estis nomumitaj taĉmentestroj. Denove komenci-

ĝis la trejnado laŭ tamburaj ordonoj. Ĉi-foje la knabinoj sin movis tute konforme al la ordonoj. Post tio la reĝo oficiale nomumis Sun Wu generala komandanto.

“Milita Arto de Sun Wu” estas la plej antikva verko tiu-tema de Ĉinio kaj ankaŭ de la mondo, kaj nun jam tradukita en multajn lingvojn.

GALO-GUSTUMO DE GOUJIAN SUR PAJLO

La trupoj de la reĝo Helŭ komandataj de Sun Wu venkis la potencan Chu-regnon en la sudo (en la meza baseno de Jangzi-rivero) kaj konkeris ĝian ĉefurbon Yingdu (la nuna Jiangling, Hubei-provinco). La Wu-regnaj trupoj gajnis kvin venkojn en kvin bataloj kaj disbatis la trupojn de Chu-regno el 200,000 soldatoj. La reĝo Zhao de Chu-regno eskapis panike kaj la regno estis en perea



La reĝo de Yue-regno Goujian dormas sur pajlo kaj gustumas galon por ne forgesi sin venĝi.

danĝero. Chu-regna kortegano Shen Baoxu iris al Qin-regno por peti helpon. La reĝo de Qin-regno rifuzis la peton. Shen tre ĉagreniĝis pro la patrolando kaj ploris en la kortego de Qin sep tagnoktojn, tiel ke la reĝo de Qin estis kortuŝita kaj fine konsentis helpi Chu-regnon per trupoj.

Yue-regno (en limregiono de la provincoj Jiangsu, Zhejiang, Anhui kaj Jiangxi) estis sude de Wu-regno kaj helpata de Chu-regno, tiam surprize atakis Wu-regnon. La reĝo de Wu informiĝis, ke la trupoj de Qin iris helpi Chu-regnon, Yue-regno atakis lian regnon kaj okazis malpacigo en lia lando, li rapide retiris siajn trupojn. Ekde tiam malamikiĝis la regnoj Wu kaj Yue. En la jaro 496 a. K. la reĝo Helŭ persone gvidis siajn trupojn por ataki Yue-regnon sed mortis pro vundo. Lia filo Fuchai surtroniĝis kaj decidis venĝi la patron. Li ordonis, ke oni ĉiutage demandu lin: “Fuchai, ĉu vi forgesis, ke la reĝo de Yue mortigis vian patron?” Fuchai respondis: “Ne, mi ne kuraĝas forgesi!” Li intense trejnis siajn militistojn por venĝa milito.

En 494 a. K. la trupoj de Wu sub komando de la reĝo Fuchai atakis Yue-regnon. La reĝo de Yue, Goujian, petis pacon pro malvenko. Wu-regna kortegano, Wu Zixu, insistis pri pereigo de Yue-regno por malebligi revenĝon, sed Fuchai ne aŭskultis lin kaj konsentis, ke Yue-regno fariĝu lia dependa regno.

La reĝo de Yue, Goujian, decidis venĝi. Li dormis sur pajlo sub galo pendanta de trabo kaj gustumis ĝin antaŭ manĝo, riproĉante sin: “Goujian, ĉu vi forgesis la honton pro la malvenko?” Li persone plugis kam-

pojn kaj kreskigis plantojn dum lia edzino teksis. Ili vivis kiel ordinaraj popoloj. Krome, li renovigis la administradon kaj kolektadis por si talentulojn. La reĝo kaj la popoloj de Yue tuforte strebis por potencigi la patrolandon dum pli ol 20 jaroj, kaj efektive Yue-regno iom post iom potenciĝis.

Goujian elektis kaj donacis belulinon Xishi al la reĝo Fuchai, ofte persone petis aŭdieron de la reĝo Fuchai kaj tributis, aŭ faris tion per sendito, kaj la tributoj ĉiam pliigis. Fuchai estis tre kontenta pro tio kaj ne plu estis tiel singarda kiel antaŭe.

En 482 a. K. Fuchai, kun siaj elitaj trupoj sub sia gvido, intervidiĝis kun la feŭduloj en Huangchi (en la sudokcidenta parto de Fengqiu en Henan-provinco) kaj konkuris kun Dinggong de Jin-regno por hegemonio. Tiam Goujian kaptis la ŝancon por venĝo kaj gvidis 50,000-militistan armeon por ataki Wu-regnon, kaj konkeris ĝian ĉefurbon. Fuchai haste retiris siajn trupojn por rezistado, sed estis venkita kaj devis peti pacon de la reĝo de Yue. Poste la Yue-trupoj plurfoje atakis kaj venkis la Wu-trupojn. Fuchai estis devigita sin mortigi kaj Wu-regno pereis en la jaro 473.

Post pereigo de Wu-regno Goujian, intervidiĝis kun la feŭduloj ĉe Xuzhou kaj fariĝis la lasta superreganto en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno. Tiam iom post iom kadukiĝis la fortoj de la feŭduloj kaj leviĝis iom post iom nova forto de la familioj de iuj korteganoj, kiuj reprezentis la novan bienularon.

(Ilustris Ren MENGXIONG)

NAN WEN:

Nadmu-foiro sur stepo

EN la fino de la pasinta somero mi vojaĝis en Interna Mongolio de Ĉinio. Sur senlima stepo mi pasigis sep neforgeseblajn tagojn, kaj feliĉe, tie okazis dume Nadmu-foiro de Siziwang-ĥoŝo* sur Kaligar-stepo. Tio vere estis ekspozicio de mongolaj moroj.

La mongola vorto "nadmu" signifas amuzan kunvenon. Ĝi estas tradicia foiro de la mongoloj. Ĉiusomere, kiam prosperas herboj kaj grasas brutoj, paŝtistoj okazigas nadmu-foiron por celebri riĉan rikolton, en kiu oni sin amuzas per tradiciaj arkpafado, rajdado kaj luktado, per filmoj,

dancoj kaj kantoj, kaj per aliaj aktivadoj. Ĝi estas ankaŭ bona ŝanco por paŝtistoj interŝanĝi komercaĵojn.

Kiam ni atingis la foirejon per aŭto, jam inaŭguriĝis la foiro. La antaŭe silenta stepo pleniĝis de ĝojo kaj viveco. Tiun tagon svarmadis al la foirejo dekmiloj da feste vestitaj paŝtistoj kaj infanoj el kvar ĥoŝoj de Ulanqab-ajmago*, portante jurtojn kaj diversajn manĝaĵojn. Iuj alveturis en aŭtoj, traktoroj aŭ ĉevalĉaroj, dum aliaj alrajdis sur ĉevaloj. Sur la verda stepo estis dense starigitaj koloraj jurtoj kaj ĉie flirtis buntaj flagoj. La

komercistoj instalas jurtojn kaj varstandojn vicon post vico por vendi diversspecajn varojn kaj variajn mongolajn etmanĝaĵojn. La tuta foiro dronis en festa ĝojo.

La mongoloj estas bravaj kaj batalemaj. Ili ŝatas arkpafadon kaj luktadon. En tiu ĉi foiro la unua programero estis luktado, en kiu partoprenis 256 plej bonaj luktistoj elektitaj de la ĥoŝoj. Iris konkursoj en la grupoj de infanoj, knaboj kaj plenaĝuloj.

Antaŭ la komenco de konkurso mongolaj kantistoj kantis jenan pecon: "Rapidu! Elektu vian plej bonan luktiston, ke ni provu la forton! Poste la luktistoj eniris de ambaŭ flankoj kaj dancante rondiris en la luktejo. Ili portis pluratavolan kanvasan veŝton borderitan per mola felo kaj ornamitan per rondaj latunaj butonoj, vastan blankan pantalonon kun brodita krurumo kaj botojn. Sur ilia brusto pendis ruĝaj kaj verdaj strioj da ŝtofo. En la konkursejo samtempe luktis tri aŭ kvar paroj da luktistoj. Ili intense konkuris. Iuj rapide subigis siajn rivalojn, dum aliaj luktadis dekojn da ron-

* Ĥoŝo kaj ajmago estas administraj unuoj respektive de gubernia kaj supergubernia nivelo en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

En Nadmu-foiro



Gejunuloj dancas



doj sen decido pri venko. Miloj da spektantoj rigardis kaj akklamis la venkintojn.

La mongola lukto diferencas tiel de la klasika lukto kiel de la ĉina tradicia lukto. La partoprenantoj ne estas grupigitaj laŭ korpopezo kaj la tempo-daŭro de luktado ne estas limigita. La gajno aŭ malgajno estas decidita per unufoja faligo. La regulo difinas nur jenon: Malpermesite al la luktistoj ĉirkaŭpreni kruron aŭ fari danĝerajn movojn; kaj kiu unue tuŝas la teron per iu ajn parto de sia korpo escepte de la plandoj, tiu estas venkita. La plej bona luktisto estas honore titolita per "brava luktisto". Tiu, kiu venkas ĉiujn siajn rivalojn, gajnas la ĉampionecon. Je la fino li ricevas grandan premion — belan ĉevalon, kompletan selon, botojn, mongolan robon kaj aliajn kvin objektojn.

Rajdkonkurso estas unu el la interesaj aktivadoj de Nadmufoiro. Ĉe la starta linio vice staris 68 blekantaj ĉevaloj ruĝaj, blankaj, nigraj kaj grizaj.

Estis mirinde, ke preskaŭ ĉiuj rajdantoj estis geknaboj 15-16-jaraj, inter kiuj troviĝis du sveltaj knabinoj kaj unu 9-jara infano.

La junaj rajdantoj estis en mongola robo, botoj, bunta kap-

tuko kaj brilkolora zono je la talio. Ili sidis bravaspekte sur la ĉevalo kaj rigardis unu alian por vidi kiel kuraĝaj kaj spertaj estas la rivaloj. La gepatroj, apude starantaj, ne perdis tempon por doni al ili siajn lastajn konsilojn.

"Kial la plenaĝuloj ne partoprenas en la konkurso? Ĉu sen selo la geknaboj povas bridi tiujn altajn kaj sovaĝajn ĉevalojn?" mi demandis la mongolan maljunulon, kiu staris apud mi.

La maljunulo ridante diris: "Ho! ne maltrankviliĝu pro tio. Ili vivas denaske sur la dorso de ĉevalo. Rajdado por ili estas facila afero." Li daŭrigis: "La mongola rajdkonkurso estas longdistanca. Se la plenaĝuloj rajdus kun selo, tio multe suferigus la ĉevalojn. Ili partoprenas nur en konkurso de ĉevala marŝado, kiu postulas altan rajdarton. Kiel homoj en atletiko, la ĉevaloj povas nur paŝi rapide sed ne galopi. En tiu ĉi foiro estas ankaŭ tiu programero. Bonvolu ĝin spekti."

Kiam la rigardantoj entuziasme diskutadis, kiu gajnos la ĉampionecon, la juĝisto jam signalis starton per svingo de ruĝa flageto kaj la dekoj da ĉevaloj jam sin pafis kiel sago trans la verdan stepon. La rajdantoj konkure strebis antaŭen kaj baldaŭ perdiĝis en la horizonto. . .

Paŝtistoj iras al konkursoj de arko-pafado, ĉevalraĵo, luktado kaj aliaj.



Luktisto



Luktado

Edgar Snow kaj la Movado de la 9-a de Decembro

de LU CUI*

Fama usona ĵurnalisto Edgar Snow (1905-1972) estis amiko de la ĉina popolo. Li venis al Ĉinio en 1928 kaj vivis kaj laboris tie 13 jarojn. En julio 1936 li vizitis la revolucion bazlokon de norda Shaanxi, la tiaman sidejon de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, vojaĝinte 1,500 kilometrojn dum pli ol cent tagoj. La sekvan jaron li finis sian mondfaman verkon "Ruĝa Stelo super Ĉinio". Liaj detalaj kaj veraj raportoj kuraĝigis ne nur la ĉinan popolon en ĝia rezistado kontraŭ la japana agreso, sed ankaŭ la popolojn alilandajn en ilia batalo kontraŭ faŝismo. En 1960, 1964 kaj 1970 li trifoje vizitis Ĉinion kaj verkis multe da artikoloj kaj libroj, konigante la novan Ĉinion al alilandaj popoloj. La 15-a de februaro ĉi-jare estis la deka datreveno de lia forpaso. Memore al Edgar Snow, la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kunvokis kunvenon en la Pekina Universitato, kiun ĉeestis mil homoj. Samcele ni speciale publikigas rememoron de Lu Cui pri fervora subteno de Edgar Snow al la ĉina studenta patriota Movado de la 9-a de Decembro.

La Red.

En mia memoro Edgar Snow strikte ligiĝis kun la Movado de la 9-a de Decembro. Li estis fervora subtenanto de la movado, kaj ĝuste en tiu movado mi konatiĝis kun li.

Hodiaŭ kiam ni rememoras lin je la deka datreveno de lia forpaso, en mia memoro reviviĝis la pasinta okazaĵo:

Ĝi okazis en decembro 1935, kiam furiozis frosta vintro. Beiping (la nuna Pekino) estis en kriza momento kaj tie regis blanka teroro. Post kiam la japanaj agresantoj okupis nordorientan Ĉinion, ili tuj etendis siajn ungojn al la tuta norda Ĉinio por ĝin aneksi, antaŭ kio la reakcia kuomintanga registaro genuiĝis kaj daŭre cedadis, dum interne de Ĉinio ĝi intensigis la ĉirkaŭekstermadon kontraŭ la

Komunista Partio de Ĉinio. En tiu kriza momento por la ĉina nacio, ekbolis de indigno la patriotaj studentoj de Beiping. Ili, post la grandioza manifestacio je la 9-a de decembro, faris pli grandskalan manifestacion je la 16-a de decembro, muĝante per la sloganoj "Ĉesigu la enlandan militon kaj kune batalu kontraŭ Japanio!" kaj "For la japanajn imperiistojn!" La reakcia registaro sendis grandnombrajn armitajn policistojn por subpremi ilin, kaj krome fermis ĉiujn urbopordegojn por malhelpi la studentojn ekster la urbo kuniĝi kun tiuj en la urbo.

Posttagmeze de tiu tago la studentoj de Qinghua-universitato, Yanjing-universitato kaj aliaj superaj lernejoj sukcesis enrompi Xibianmen-pordegon

kaj partoprenis la civitanan kunvenon en Tianqiao-kvartalo, tamen ili estis obstrukcitaj ekster Xuanwu-pordego. Indignaj kaj malpaciencaj, ni hazarde trovis, ke sube de la pordego estas fendo. Mi rampis tra la pordfendo en la urbon. Mi forprenis la feran riglilegon kaj, kiam mi apenaŭ malfermis la pordegon, aro da policistoj kuregis al mi. Hajloj da frapoj faligis min. . . Mi estis kondukita en iun policejon nemalproksime de la urbomuro.

En tiu malgranda policejo regis bruo kaj malordo. Profitante malatenton de la policistoj, mi ŝtele forviŝis glacipecon de sur la fenestro kaj rigardis tra ĝi. Ĝuste en tiu momento mi vidis afablan vizaĝon. Kaj mi aŭdis sinsekve tri frapojn sur la fenest-

tro kaj aŭdiĝis ties afabla voĉo en la angla lingvo: “Ĉu mi povus eniri?”

Mi estis surprizita. Eble mi povus kontakti kun eksteraj kamaradoj helpe de li. Tiel pensante, mi respondis mallaŭte en la angla lingvo: “Kompreneble, bonvolu eniri!”

La pordo malrapide malfermiĝis kaj eniris altkreska kaj maldika okcidentano en modesta surtuto. Sur la ridetanta kaj kvieta vizaĝo de tiu modere kondutanta junulo legeblis sincereco, familiareco kaj simpatio. De tio mi perceptis, ke li estas nur amiko, ne io alia.

Li etendis sian manon kaj kunpremis kun mi. Poste li sin prezentis:

“Mi nomiĝas Edgar Snow. Mi estas usona ĵurnalisto. Mi propraokule vidis la ĵusan okazaĵon kaj sekvis vin ĉi tien. Ĉu vi bonvolus sciigi al mi vian nomon? Kaj en kiu lernejo vi studas?”

Rimarkinte, ke mi parolas kun eksterlandano en la angla lingvo, la policistoj embarasiĝis kaj kolektiĝis por konsiliĝi pri kontraŭrimedo. Profitante la okazon, mi diris la veron al Edgar Snow. Li ekĝojis, dirante: “En Qinghua-universitato, tre bone!”

Edgar Snow en norda Shaanxi, en 1936



Lois Wheeler Snow (La tria de maldekstre) en la kunveno memore al la deka datreveno de la forpaso de E. Snow okazigita en la Pekina Universitato

Li notis tion en sia kajero kaj plue demandis: “Pro kio vi manifestaciis? Ĉu vi volus diri al mi la kialon?”

“Ni ne volas esti sklavo de aliaj nacioj! Ni postulas, ke ĉinoj ne batu ĉinojn sed ili unuiĝu por rezisti kontraŭ la japana agreso. . .” mi respondis ekscitiĝe.

Li daŭrigis sian skribadon en la kajero kaj poste kun rideto demandis: “Tamen vi estas studentoj kun malplenaj manoj kaj estas subpremitaj. Ĉu vi povos atingi vian celon laŭ via opinio?”

“Ni kredas al la popolamasoj,” respondis mi, “nia nacio ne pereos, se nur la popolamasoj vekigos.”

“Nu, iru!” ekkriis kelkaj armitaj policistoj kaj perforte forpuŝis min el la pordo. Mi min turnis, ĵetis rigardojn al Edgar Snow kaj vidis ke li sekvas min per pezaj paŝoj, ne sciante kion fari. Sur lia vizaĝo legeblis bedaŭro.

La policistoj puŝis min sur ŝarĝaŭton. Mi estis eskortita de du armitaj policistoj ĉe ambaŭ flankoj. Kontraŭ mi staris aliaj du soldatoj kun pafilo en la mano. Edgar Snow staris apud la kamiono, direktante al mi la okulojn plenajn de simpatio kaj maltrankvilo. Ekmoviĝis la kamiono. Edgar Snow kun ŝajnigita rideto svingis la manon al mi. Mi laŭte kriis al li: “Adiaŭ! Mi certe elliberiĝos!” Ankaŭ li kriis al mi per sufokita voĉo: “Ĉion bonan al vi! Adiaŭ!”

Jen mia unua renkontiĝo kun Edgar Snow. Ĝi restas freŝa en mia memoro eĉ hodiaŭ.

Dank’ al la malcedema batalo de niaj kamaradoj — kaj eble

ankaŭ pro la apero de Edgar Snow mi estis liberigita en tiu vespero.

La saman tagon Edgar Snow sendis eksterlanden specialan telegramon pri ĉio, kion li vidis dum la studenta manifestacio. Lia raporto estis tuj publikigita sub okulfrapaj rubrikoj en usonaj, britaj kaj alilandaj ĵurnaloj. Lia raporto rompis la ĵurnalisman blokadon de la reacia kuomintanga registaro kaj koniĝis al la tuta mondo la heroan batalon de la junaj ĉinaj studentoj, kiuj gajnis simpatian de la progresemaj studentoj kaj junularo de la tuta mondo. Tiam la Monda Studenta Federacio, kies centra oficejo estis en Parizo, iniciatis kaj organizis "Mondan Semajnon por Subteni la Ĉinajn

La foto pri manifestacio de studentoj dum la Movado de la 9-a de Decembro farita de E. Snow en 1935



Studentojn". Ĝi invitis la ĉinajn studentojn ĉeesti la Mondan Gejunulan Kongreson en Ĝenevo, tiel ke la kontraŭagresa batalo de la ĉinaj studentoj kuniĝis kun la kontraŭfaŝisma batalo de la monda junularo.

Edgar Snow kaj kelkaj aliaj okcidentaj ĵurnalistoj per siaj raportoj ankaŭ rompis la ĵurnalisman blokadon de Kuomintang interne de Ĉinio, tiel ke aperis raportoj de la studenta movado en iuj ĉinlingvaj kaj anglalingvaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Kelke da tagoj poste la manifestacio de la patriotaj junaj studentoj envolvis la tutan landon kaj fariĝis grandioza uverturo por la sekvanta tutpopola rezistmilito.

La rapida disvolviĝo de la nacisava studenta movado teruris la reaciajn aŭtoritatojn, kiuj decidis fari pli severan subpremadon. Tiam la superaj lernejoj de Beiping dronis en blanka teroro. La 29-an de februaro 1936 miloj da policistoj kun maŝinpaŝiloj dufoje sieĝis Qinghua-universitaton kaj faris grandskalan traserĉadon kaj arestadon. La sekvan tagon la partia organizaĵo decidis, ke mi min kaŝu portempe en la hejmo de Edgar Snow, Kuijiachang-strato 13.

Lia loĝejo tiel fariĝis kunsidejo kaj rifuĝejo de la subteraj partianoj kaj patriotaj studentoj de Yanjing-, Qinghua- kaj Pekin-universitatoj.

Edgar Snow, kiu venis al Ĉinio kiel ĵurnalisto en 1928, vizitis multajn lokojn en nordorienta kaj norda Ĉinio. Li propraokule vidis la profundajn suferojn de la ĉina popolo, precipe la teruran plagon, kiu pereigis milionojn da homoj, en nordokcidenta Ĉinio. Ĉio ĉi ege


skuis lin. Li mem diris, ke tio estis "La vekiga punkto en lia vivo". Li propraokule vidis la koruptecon de la kuomintanga registaro kaj pli kaj pli profundan agreson de la japanaj imperiistoj. Kiel firma kontraŭfaŝisma batalanto li ekstreme malamis la japanajn agresantojn, abomenis la tiranecon de Kuomintang kaj profunde simpatiis kun la ĉina popolo baraktanta en la mizero kaj kun ties batalo por nacisavo kaj demokratio.

De la aŭtuno de 1933 ĝis la somero de 1935, kiam Edgar Snow laboris kiel instruisto en la ĵurnalisa fakultato de Yanjing-universitato, li konatiĝis kun multaj progresemaj studentoj de tiu kaj aliaj superaj lernejoj kaj havis multan kaj profundan kontakton kun ili. En tiu juna generacio li vidis la esperon de Ĉinio. Tiutempe la progresemaj studentoj ofte vizitis lin en la hejmo. Kaj kun akriĝo de la krizo en norda Ĉinio ili ofte venis al Edgar Snow por informiĝi pri la disvolviĝo de la situacio kaj kune kun li kaj lia edzino Nym Wales** analizi la situacion kaj diskuti diversajn problemojn. La geedzoj laŭeble helpis ilin kiel siajn familianojn. Ĝuste kiel Nym Wales diris: "Edgar kaj mi ambaŭ opiniis, ke ni estas el la sama kategorio kun la ĉinaj gejunuloj. Ni staras ĉe la flanko de la patriotaj gejunuloj de Ĉinio."

Tiam la subteraj partiaj filioj kaj partianoj gvidataj de la partia komitato de la urbo Beiping plenenergie klopodis unuigi la progresemajn studentajn organizaĵojn pere de iuj leĝaj kaj duonleĝaj grupoj, kaj fine ili sekrete fondis la Studentan Federacion de Beiping. Ĝuste pere de tiuj organizaĵoj kaj aliaj studentaj grupoj la Komunista Partio de

Ĉinio iniciatis, organizis kaj gvidis la Movadon de la 9-a de Decembro. Tiam la progresemaĵ studentoj ĉiam akurate sendis al Edgar Snow kaj lia edzino la deklarojn kaj telegramojn de studentaj grupoj en Beiping kaj Tianjin pri batalo kontraŭ la japana agreso kaj por demokratio. Ili helpis traduki la materialojn en la anglan lingvon kaj mimeografi ilin por livero al eksterlandaj raportistoj kaj ĵurnaloj. Oni ankaŭ antaŭinformis Snow kaj lian edzinon pri la manifestacioj de la 9-a kaj 16-a de decembro, kaj pere de ili persvadis aliajn eksterlandajn ĵurnalistojn iri al la loko por raportitio. Krome Snow ankaŭ faris multajn fotojn kaj filmojn, kiuj nun estas valoraj historiaj materialoj de la Movado de la 9-a de Decembro. Ĝuste per tiuj praktikaj agadoj Edgar Snow kaj Nym Wales aktive subtenis kaj helpis la kontraŭjapanan kaj nacisavan batalon de la ĉinaj studentoj. Poste rememorante la movadon, li diris: "Tio estis la unua fojo, je kiu mi vidis, kiel la junaj ĉinaj intelektuloj montris sian ekstreme grandan politikan kuraĝon. La sceno estis vere ekscita." La movado plifirmigis lian fidon al la ĉina estonteco. Li "eksciis el la politika kuraĝo de la ĉinaj gejunuloj, ke la historio vere povas esti ŝanĝita." (El "La Ĉinio de Edgar Snow" verkita de Lois Wheeler Snow, edzino de Edgar Snow.)

La tombo de Edgar Snow ĉe la lago Weiming en la Pekina Universitato



nitajn en julio 1936 kiel "La Vivanta Ĉinio". Ĉe li mi legis ankaŭ lian jam eldonitan "La Ekstremaorienta Fronto". Sur mi profundan impreson faris lia antaŭvido pri la disvolviĝo de la ekstremaorientaj cirkonstancoj, lia elkora simpatio kaj sincera espero por la ĉina popolo, lia strebado al la vero, persistado pri justeco kaj kuraĝo en esplorado.

Semajnon poste la Studenta Federacio de Beiping sendis min al Ŝanhajo por prepari la fondadon de la Tutlanda Nacisava Studenta Federacio. Por eviti la atenton de la policistoj kaj spionoj Edgar Snow, kondukante sian personaŭton, mem veturigis min al la fervoja stacio kaj poste kune kun sia edzino akompanis min ĝis la trajno. Ili adiaŭis min nur tiam, kiam la trajno ekmoviĝis.

Helpe de nia Partio post tri monatoj Edgar Snow kiel la unua eksterlanda ĵurnalisto vizitis nian revolucion bazlokon de norda Shaanxi kaj tie plenumis sian senmortan verkon "Ruĝa Stelo super Ĉinio". La libro pligrandigis la politikan influon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Laborist-Kampana

Ruĝa Armeo en la internacia sfero.

Nun la nomo de Edgar Snow jam fariĝis simbolo de la amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj.

Lia amikeco kun la ĉina junularo komenciĝis en Beiping, ĝuste ĉe la pitoreska Weiminglago en la korto de la nuna Pekina Universitato. Laŭ la deziro de Edgar Snow kaj la peto de lia edzino Lois Wheeler Snow duono de lia cindro estis enterigita tie "por ke li povu resti inter la ĉinaj junuloj" kaj la alia duono estis enterigita ĉe la bordo de Hudson-rivero en la ŝtato Nov-jorko.

Edgar Snow apartenas kaj al Usono kaj al Ĉinio.

Li eterne vivos en la koroj kaj de la ĉinaj gejunuloj kaj de la tuta ĉina popolo!

Mi min kaŝis ĉe li pli ol unu semajnon, kie mi propraokule vidis, ke ili vivas modeste kaj laboras diligente. Edgar Snow estis preskaŭ ĉiam okupita en sia studejo, kie estis multaj libroj, precipe pri Ĉinio. Tiam li estis kompilanta kaj tradukanta elektitajn ĉinajn novelojn poste eldo-

* La aŭtoro estas konstanta komitatano de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj membro de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

** Nym Wales estis la tiama edzino de Edgar Snow, usona verkistino. Ŝi vizitis la revolucion bazlokon de norda Shaanxi post Edgar Snow kaj verkis "Interna Ruĝa Ĉinio" kaj aliajn. Ŝi ekседziniĝis kun Edgar Snow en 1949.

ESTIS somera kaj iom malse-
rena posttagmezo en 1981.
Kompleta kvieto regis super la
Granda Muro en la proksimeco
de Pekino. Sub majestaj fajro-
alarmaj turoj aperis kurioza
antikva sceno: Post la segilfor-
ma parapeto sur la Granda Muro
gardostaras soldatoj en militista
kostumo kaj kun pinta kasko sur
la kapo, tenantaj diverskolorajn
flagojn kun longaj rubandoj.
Baldaŭ Zhenjin, filo de la mon-
gola imperiestro Kublaj-Ĥano
de Yuan-dinastio (1271-1368 p.
K.), venas tien en akompanado
de siaj itala adjutanto Marko
Polo kaj gvardio. Bridinte sian
ĉevalon, la princo prezentas al
Marko Polo la historion de la
Granda Muro. Marko Polo en
malhele verda mongola robo
rigardas malproksimen kaj diras:
“Se mi ne vidus tion propraokule,
mi vere ne povus kredi ĝin.”

Jes, Marko Polo venis denove
al Ĉinio. Post pli ol 700 jaroj, li
aspektas ankoraŭ tiel juna, fa-
cilmova kaj vigla. Komprenoble
li ne estas la vera Marko Polo,
sed la heroo en la nove farita
filmoserio “Marko Polo” por
kinejoj kaj televido.

Marko Polo estis fame kona-
ta itala vojaĝisto de la 13-a jar-
cento. En 1271 li kaj lia patro,
spite al vivdanĝero kaj post
longa vojaĝo, venis al Ĉinio por
komercado. Li siatempe akiris
fidon de la imperiestro Kublaj-
Ĥano de Yuan-dinastio, kiu ko-
misiis al li gravan oficon kaj
sendis lin al Birmo, Vjetnamio,
Hindio kaj aliaj landoj, kiel re-
presentanto de la tiama ĉina
kortego. Marko Polo pasigis en
Ĉinio 17 jarojn kaj trairis plej-
parton de la lando. En 1295 li
revenis al Italio pro sopirado al
sia hejmlando. En iu milito li
estis kaptita. En karcero li dik-
tis sian travivaĵon en la Oriento,
dum alia kaptito skribis anstataŭ
li la libron “La Vojaĝoj de Mar-
ko Polo”, kiu trovis grandan de-
biton tra la mondo. Ĝi estas la
unua libro, kiu prezentas Ĉinion
al la Okcidento. La filmo
“Marko Polo” reaperigas la mi-
rindan travivaĵon de Marko
Polo laŭ la historia fakto kaj
spegulas la tiaman kulturan
intersanĝon inter la Oriento kaj
Okcidento kaj la amikan kontak-
ton inter la ĉina kaj itala popo-
loj. La filmoserio estis iniciatita

WANG XUEMING:

MARKO DENOVE

de la Itala Radia kaj Televida
Kompanio, finance subtenita de
Usono, Japanio kaj Italio kaj
farita de la Itala Perspektiva
Studio sub helpo de la Pekina
Studio. Ĝis nun preskaŭ 80 lan-
doj aĉetis ĝian projekcian rajton.
En majo kaj junio ĉi-jare NBC
de Usono kaj NHK-Radio de
Japanio la unuaj dissendos la
filmserion. La filmo estas la plej
grandskala kaj plej multe
monelspeza tiuj faritaj en Ĉinio.

“Marko Polo” estas historia
filmo, tial ĝi devas fidele spe-
guli la historion. Pro tio la kon-
cernaj personoj de Ĉinio kaj Ita-
lio faris ripetitan esploron por
la scenaro, intrigoj, personoj,
rekvizitoj kaj kostumoj. La
Ĉina Filmo-kunfara Kompanio
kaj la specialistoj pri la mongola
historio kaj Yuan-dinastia his-
torio de la Historia Instituto kaj
la Nacimalplimulta Instituto sub
la Ĉina Sociologia Akademio kaj
la nacimalplimulta fako sub la
Centra Nacimalplimulta Institu-
to atente tralegis la scenaron, ri-
pete konsultis koncernajn histo-
riajn materialojn kaj prezentis
siajn proponojn pri revizioj. La
scenaristo plurfoje reviziis sian
verkon laŭ la opinioj de la ĉinaj
kolegoj kaj specialistoj, kio ga-
rantiis, ke la filmo havas kom-
pare altan nivelon de arto kaj
samtempe konformas al la histo-
riaj faktoj.

La scenaristo kaj filmproduk-

Filmado en la Imperiestra Palaco en Pekino




POLO VENIS AL ĈINIO

tisto Vencerzo Labella kaj la reĝisoro Giuliano Montaldo estas fame konataj personoj en la itala filma rondo. V. Labella antaŭe estis ĵurnalisto kaj historia instruisto, kaj nun estas scenaristo kaj fame konata filmproduktisto. La 53-jara G. Montaldo antaŭe estis filmaktoro kaj fariĝis reĝisoro en 1961. Li reĝisoris 15 filmojn, inter kiuj "Sacco kaj Vanzetti" de 1971 ricevis premion en la Filma Festivalo de Cannes kaj "Giordano Bruno" de 1973 ricevis premion en la Moskva Filma Festivalo. Li havas seriozan sintenon pri arta kreado kaj liaj verkoj ĉiam portas densan socian koloron. En prezentado li heredis la eminentan tradicion de la itala nova realismo.

La kinematografisto de la filmo estis Pasquale De Santis, kiu filmis pli ol cent filmojn kaj dufoje ricevis Oscar-premion. Alveninte al Ĉinio, De Santis decidis apliki mildan lumon kiel la ĉeftonon de la filmo, por ke ĝiaj bildoj estu okulplaĉaj kaj klaraj kaj donu harmonian nuancon por ĝuste prezenti Markon Polon en la antikva ĉina civilizacio. La arta ĉefprojektisto Luciano Ricceri, kiu pasinte laboris kiel arkitekto, estas spertoriĉa kaj faris projektojn por 50 filmoj.

Ken Marshall, kiu ludas la rolon de Marko Polo en la filmo,

Ken Marshall, rolulo de Marko Polo



estas 29-jara usonano. Li antaŭe studis anglan literaturon en la Miĉigana Universitato kaj poste studis en teatra lernejo en Novjorko. En 1980 li estis elektita de itala reĝisoro por ludi rolon en la filmo "Haŭto" kaj montris sian talenton en ĝi. Li estas diligenta junulo. Dum la ĉi-foja filmado li ĉiam portis kun si poŝlibron "La Vojaĝoj de Marko Polo" kaj legis multajn verkojn pri ĉinaj historio, pikturo kaj muziko. Li diris: "Jam eĉ la lernejo mi sciis pri Marko Polo, sed mi neniam pensis, ke mi ludos la rolon de li. Dum filmado en Italio kaj Maroko, mi sentis min kvazaŭ en la socio de la 13-a jarcento, kio vere estis neimagebla. Veninte al Ĉinio, mi sentas ĉion freŝa, kiel Marko siatempe sentis, kiam li ĵus venis al Ĉinio. La ĉina popolo estas entuziasma, modesta kaj amika; mi tre ŝatas ĝin."

Ying Ruocheng, fame konata aktoro de la Popola Arta Teatro de Pekino, ludas la rolon de imperiestro Kublaj-Hano. En la dramo "Tetrinkejo", verkita de Lao She, li ludis la rolojn de la variolulo Liu kaj lia filo. En 1980 li kune kun la teatro veturis al FR Germanio, Francio kaj Svislando por prezenti la dramon "Tetrinkejo", kie li samtempe servis kiel interpretisto. En 1981 li fariĝis vicreĝisoro de la Ŝekspira dramo "Denton pro Dento" tradukita de li mem. Samjare li ludis gravan rolon en la rakonta filmo "Geamikoj".

La fame konata 80-jara angla sceneja aktoro John Gielgud ludas la rolon de la granda duko de Venecio, kaj la Holivuda filmaktoro Burt Lancaster ludas la rolon de papo. La patro kaj onklo de Marko estas ludataj respektive de la fame konataj anglaj aktoroj Denholm Elliot

kaj Tony Vogel, kaj la plej aĝa filo de Kublaj-Ĥano ludata de japana aktoro Junichi Ishida. Ankaŭ aliaj geaktoroj el Usono, Japanio, Italio kaj Ĉinio partoprenis en la filmado.

La filmado komenciĝis en Venecio la 14-an de septembro 1980 kaj poste estis daŭrigita en Maroko, Nepalo k.a. Aprile de 1981 la filmistoj kaj geaktoroj revenis al Italio kaj junie venis al Ĉinio, kie ili ĉefe filmis en Interna Mongolio kaj Chengde, Hebei-provinco. La eksterdomaj scenoj en la Interna Mongolio troviĝas sur la stepo Xilin Gol, kie oni prenis pli ol 40 jurtojn ĉe ambaŭ bordoj de rivereto kiel garnizonejon de la perfida generalo Nayan. Kublaj-Ĥano persone gvidis armeon por ataki Nayan, kaptis lin viva kaj mortpulis lin. Oni konstruis

someruman palacon de Kublaj-Ĥano en la "Somera Vilao" de Chengde. Kublaj-Ĥano tie akceptis Markon Polon kaj lian patron.

Por reaperigi la arkitekturajn stilon kaj karakterizaĵojn de Yuan-dinastio, la ĉinaj kaj italaj artaj projektistoj faris ĉelokan esploron pri la historiaj restaĵoj kaj foliumis multajn koncernajn verkojn, kaj tiel faris internajn kaj eksterajn scenojn versimilaj.


La konstruado de la porfilma someruma palaco de Kublaj-Ĥano komenciĝis en septembro 1980 kaj daŭris unu jaron. Ĝi kun granda jurto, bankeda halo, dormopalaco, drakoŝipo, gvatturoj, centra portalo kaj pli ol 30 jurtoj por la ranguloj kaj gardistoj okupas areon de 13,500 kvadrataj

metroj. La ĉinaj kaj italaj artistoj intime kunlaboris en la konstruado kaj tiel faris ilin artaĵoj kun la naciaj koloroj de la mongoloj kaj hanoj.

Iun aŭtunan vesperon de la lasta jaro, la filmistoj tie fotografis jenan scenon: La hela luno leviĝas en la ĉielo, la palaco estas ĉie iluminita, ankaŭ la drakoŝipo en la lago estas ornamita per diverskoloraj lampoj. En la du bankedaj haloj la ranguloj drinkas gaje kaj akrobatoj faras brilan prezentadon. Jen Kublaj-Ĥano estas regalanta Markon Polon kaj lian patron per bankedoj. La majestaj kaj graciaj konstruaĵoj faris la filmon pli alloga.

Post nelonge la filmaj laborantoj venis al la vilaĝo Longmen apud la urbo Guilin en

Reĝisoro Giuliano Montaldo (la unua de dekstre) kaj vicreĝisoro kune kun la rolulo de Kublaj-Ĥano Ying Ruocheng (meze)



suda Ĉinio. La vilaĝo situas ĉe bordo de la bela Lijiang-rivero, sur kiu konserviĝas antikvaj temploj. La reĝisoro projektis, ke la filmo reaperigu tiean tradician drakoŝipan feston. Maljunaj kamparanoj de la vilaĝo varme prezentis al ili drakoŝipajn konkursojn spertitajn de ili mem en la pasintaj jaroj. Tia navigacia kompanio disponigis al ili turismajn ŝipojn, kaj la vilaĝanoj faris por ili bambuajn flosojn. Kiam veteranaj artistoj instalis la drakajn kapojn kaj vostojn al la bambuaj flosoj, la vilaĝanoj ĉu junaj ĉu maljunaj aliris por rigardi.

La serioza laborstilo de la artistoj de Italio kaj aliaj landoj profunde impresis la ĉinajn kolegojn. Kiam la preskaŭ 60-jara ĉefŝminkisto Giuliano Laurenti ŝminkis la vizaĝon de Ying

Ruocheng, li ne uzis artefaritan barbon sed alĝuis la barbharojn unu post alia, tiel ke eĉ proksima fotado ne povas malkovri la falsecon. La kostuma projektisto E. Sabbadini projektis kaj farigis pli ol dumil kostumojn de Yuan-dinastio; eĉ la kiraso kaj seloj estas faritaj el veraj materialoj.

Fininte sian filmadon en Ĉinio V. Labella diris, ke Marko Polo ne estis monavida komercisto, nek koloniisto. Li faris longan vojaĝon nur por esplori la homan socion. Li laboris en Ĉinio 17 jarojn, portis al Ĉinio la civilizacion de la Okcidento kaj tiun de Ĉinio al la Okcidento. Tio estis la kontribuo de Marko Polo kaj ankaŭ lia spirito de paco, amikeco kaj interkompreno. La filmo "Marko Polo" pri-kantas ĝuste tiun spiriton.

Unu el la scenoj de la filmo Marko Polo



GEJUNULOJ AKTIVE PLANTIS ARBIDOJN

Milionoj da ĉinaj gejunuloj aktive plantas arbidojn, kontribuante al verdigo de la patrolando kaj beligo de la medio. Laŭ la statistiko de Shanxi, Jiangsu, Shandong, Hunan kaj aliaj 23 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, en la pasinta jaro pli ol 125 milionoj da gejunuloj partoprenis en arbidoplantado. Ili plantis sume 1,600 milionojn da arbidoj, arbarigis pli ol 320,000 hektarojn kaj konstruis arbidejon kun areo de 50,000 hektaroj.

LA ĈINA MAR-PETROLA KORPORACIO FONDITA

En februaro estis fondita en Pekino la Ĉina Mar-petrola Korporacio, kiu estas ŝtata korporacio jure rajtigita kaj respondeca pri kunlaboro kun aliaj landoj en ekspluatado de ĉina mar-petrola. Ĝi havas monopolon pri esplorado, ekspluatado, produktado kaj vendado de petrolo en la kadro de la difinita mar-zono por kunlaboro.

Ĝiaj taskoj estas: Laŭ la porkunlabora mar-zono sankciita de la ĉina registaro kaj dividitaj marsektoroj ĝi organizas la laboron akcepti kontrakt-proponojn, intertraktas kun eksterlandaj entreprenoj kaj subskribas interkonsentojn pri petrolo; partoprenas en projektado de ekspluatado kaj konstruo de petrolkampoj fare de eksterlandaj kunlaborantoj; helpas koncernatajn unuojn, regionojn kaj entreprenojn subskribi interkonsentojn kun eksterlandaj kunlaborantoj pri la ekipaĵa starigo kaj laŭkontraktaj servoj kaj plenumas la esploron kaj ekspluatadon de mar-petrolaj riĉfontoj kaj ilian produktadon laŭ la ŝtata plano.

La korporacio sendis avizleterojn pri unuafoja kontrakt-propono pri kunlaboro kun eksterlandoj en ekspluatado de marpetrolaj riĉfontoj.

PERSPEKTIVO POR ENERGIO DE LA MONDO EN LA OKDEKAJ JAROJ

POST liverstreĉo kaj prezaltiĝo de petrolo en 1973-74 kaj 1979-80, en multaj landoj de la mondo malrapidiĝis la ekonomia disvolviĝo, grandiĝis la malfavora saldo en spezado kaj altiĝis la prezoj de varoj.

Ĉe la sojlo de la okdekaj jaroj, la Organizaĵo de Petrol-eksportaj Landoj refoje unuigis la prezon de nafto, nome 34 usonajn dolarojn por unu barelo da mark-oleo. Frontante la abruptan altiĝon de la prezo de petrolo, la landoj, kiuj multe konsumas petrolon, alprenis diversajn rimedojn por ŝpari energion, plirapidigis siajn paŝojn malkovri novajn naftokampojn kaj disvolvi surogatan energion. Nun la mondo ĉiutage superproduktas du milionojn da bareloj da petrolo. Tial finiĝis la nesufiĉeco de petrolo, kaj en la estonteco estos portempa ekvilibro inter ofertado kaj mendado.

Tamen vidiĝas evidenta malkvilibro inter la konservokvanto, produkto kaj konsumo de petrolo pro la limigo de la naturo, ekonomio kaj tekniko. Pro tio estas malfacile forigi la kontraŭstarecon inter la petroleksportaj landoj kaj la multnaciaj petrolkompanioj. Pli kaj pli streĉiĝis la sinkroĉo de la evoluintaj industrilandoj al la petroleksportaj landoj. La nuna stabileco de la prezo de petrolo akcelos la ekonomian disvolviĝon kaj pli-

grandigos la petrolan konsumon, tiel ke poste refoje aperos malfacilo en livero de petrolo, kaj pro tio oni ne devas aserti, ke ne aperos plu malfacilo rilate al energi-problemoj.

Preni petrolon kiel la solan energifonton estas damaĝplena afero, pri kiu konscias la tuta mondo. Pro tio oni okazigis en aŭgusto 1981 UNO-Konferencon pri Nova kaj Regenera Enerĝio en Najrobo, Kenjo. La konferenco atentigis la mondon, ke ĝi elturniĝu el la stato dependi de ununura energispeco en la staton utiligi la 14 novajn specojn de energio, t.e. tiuj de la suno, akvo, tervarmo, vento, tajdo, ondo, maro, ligno, lignokarbo, vegetaĵo, brutaro, oleskisto, karbogudra sablo kaj terkarbo, inter kiuj nur la lastaj tri specoj estas minajoj, kaj la ceteraj 11 specoj estas regenera energio. Giganta estas la povo de regeneraj energioj. Ekzemple, ĉiusekunde la sunradiado al la terglobo egalas al la povo de 8 miliardoj da kilovattoj da elektra energio, kaj la kerno de la terglobo ĉiujare sendas al sia surfaco la varmon egalan al cent miliardoj da bareloj da petrolo. La akvo sur la terglobo ampleksas 1.5 miliardojn da kubkilometroj, el kiuj 97 procentoj estas en la oceanoj. Pere de teknikaj rimedoj oni povos turni la akvon en movoforton. Jam forpasis la tempo, kiam la

homoj prenis lignon kiel ĉefan hejtajon, kaj nun, pere de malkomponiĝo oni povas akiri el vegetaĵoj hidrogenon, metanon kaj metilalkoholon.

Sed la ekspluatado kaj utiligo de regenera energio estas limigitaj de la niveloj de tekniko kaj ekonomia forto kaj de geografia pozicio. Ni prenu kiel ekzemplon utiligon de sunenerĝio, kies apliko disvolviĝas pli rapide. Pli ol sepdek landoj nun esploras ĝian utiligon, kio tamen postulas grandan monsumon kaj cetere estas limigita de geografiaj kondiĉoj. Tial estas malfacile popularigi tian instalon escepte malgrandan hejme uzeblan sunenerĝian aparaton kies instalado bezonas malpli da monsumo. Pli ol tridek landoj nun esploras la tervarmon, sed nur malmultaj vaporkampoj, varmakvaj kampoj kaj malalttemperaturaj akvokampoj estas utiligataj. Iuj asertis, ke en la fino de la nuna jarcento grandaj ventoturbinoj povos fariĝi same gravaj kiel elektrejoj uzantaj minajn hejtajojn. Sed en la okdekaj jaroj venta elektrejo povos aperi nur en tiaj lokoj, kie la vento havas rapidecon de pli ol 5.5 metroj sekunde, kaj la direkto kaj la forto de la vento ne devas esti tre ŝanĝiĝemaj. La plej multe utiligata regenera energio estas akvo, per kiu oni produktas 24% de la elektro de la mondo. Sed por disvolvi la

hidroelektran aferon, oni bezonas gigantan sumon da investaĵoj kaj longan tempon por konstruado. En la fino de la okdekaj jaroj la jara kresko de la disvolviĝo de la hidroelektra industrio estos 3-3.5%.

La ĉefaj rimedoj por solvi la problemon de energio estas klasifikeblaj en kvar kategoriojn:

1. ELLABORI KAJ DISKONIGI REGULON PRI ŜPARO DE ENERGIO. Multaj landoj devige alprenis energiŝparajn rimedojn en industrio, trafiko, komerco, servometioj kaj ĉe individuoj, kaj la rezulto estis kontentiga. Iuj evoluintaj landoj reduktis la konsumon de petrolo en 1980. En komparo kun 1979, Usono reduktis 7 procentojn, Japanio 10 procentojn, FR Germanio 11 procentojn, Britio 15 procentojn, Francio 7 procentojn, Hispanio 4 procentojn.

2. RAPIDIGI LA SERĈADON KAJ EKSPLUATADON DE NOVAJ OLEKAMPAROJ. En la fino de 1980 la konstatita olea rezervokvanto de la mondo estis ĉirkaŭ 88.9 miliardoj da tunoj, dum la jara produktokvanto estis ĉ. 3 miliardoj da tunoj. La proksimuma proporcio inter la du ciferoj estis 30:1, kio alarmis la mondon pri la streĉiteco de la olea rezervokvanto de la mondo. Por tiel granda kvanto da oleo, estas tro malekonomie ŝanĝi la instalaĵojn por kolektado, transportado kaj rafinado, kaj tial ne troviĝas la ebleco anstataŭigi petrolon per aliaj specoj de energio. La urĝaj aferoj nun estas progresigi teknikon, grandigi investaĵojn kaj rapidigi serĉadon kaj ekspluatadon de novaj olekampoj. Freŝaj in-

ternaciaj geologiaj materialoj taksis, ke eble la terglobo konservas en si 212 miliardojn da tunoj da nafto, t.e. 2.3-oblo de la konstatita rezervokvanto. Kvantam fariĝis pli kaj pli malfacila la ekspluatado de multaj olekampoj, tamen pli da novaj olekampoj estos lanĉitaj.

La terglobo havas en si ĉ. 2 duiliardojn da kubmetroj da tergaso, kiuj egalas al 48.9 miliardoj da tunoj da petrolo, sed en 1980 la mondo ekspluatis nur 1.49 duilionojn da kubmetroj, kio pruvas, ke la perspektivo de tergaso estas vasta.

3. RACIIGI LA UTILIGON DE KARBO. La rezervo de karbo de la mondo estas 660 miliardoj da tunoj kaj la jara produktokvanto estas 3.5 miliardoj da tunoj. Proporcio de la produktokvanto al la konservo estas 1:190, tial karbo estas la plej grava energifonto, kiu povas anstataŭi petrolon. Sed rekta bruligo de karbo ne nur estas malekonomia sed ankaŭ estigas grandan polucion, kaj cetere la transportado kaj tenado de kar-

bo estas tre komplikaj aferoj. En la okdekaj jaroj oni rapidigos la likvigon kaj gasigon de karbo.

4. RAPIDIGI LA KONSTRUADON DE NUKLEAJ ELEKTREJOJ. Nun en la mondo pli ol 20 landoj havas pli ol 500 nukleajn elektrejojn. Oni antaŭvidas, ke en la fino de la okdekaj jaroj la nombro de nukleaj elektrejoj kreskos po 10 procentoj ĉiujare. Escepte de Usono kaj Sovetunio, la landoj, kiuj ne havas sufiĉajn fontojn de energio, ekzemple Japanio, Francio k.a., konstruos pli da nukleaj elektrejoj.

Kompetentuloj pri la monda energio prognozis, ke verŝajne okazos ŝanĝiĝo en la konsisto de rekta energio de la mondo: Reduktiĝos petrolo, leviĝos karbo, senŝanĝe restos tergaso, nuklea energio leviĝos de 3% ĝis 7% kaj akvoforto k.s. altiĝos de 7% ĝis 8%. La supre menciitaj ciferoj estis akiritaj de takso, sed el tio oni povas scii la ĝeneralan tendencan kaj ŝanĝiĝon de la perspektivo de monda energi-provizio en la okdekaj jaroj.

Proverboj de tibetanoj

Iru laŭ rivero kaj vi certe vidos maron.

La idealo de kokino estas nenio pli, ol havi plenmanon da brano.


Tro pezas por mallaborema ŝafo eĉ la propra lano.

La valoro de la ĉapo ne prezentas tiun de la kapo.

Kiu ne volas eĉ rivereton travadi, certe ne trans oceanon veturi.

Ĉiela muziko el kolombofajfiloj

de U. REBER



Elegantaj fajfiletoj

La ŝejko Abul Fazl, ministro kaj amiko de la Mogul-imperiestro Akbaro la Granda, skribis en la jaro 1590 p. K. ege interesan raporton pri flugkolomboj ĉe la korto de la imperiestro.

La imperiestro okupis sin pri miloj da flugkolomboj je sia amuziĝo. Centojn da metroj alte en la aero ili prezentis strangajn lertaĵojn kun saltoj malalten, aksaj turniĝoj kaj kun nekredebla fluglerteco, kiujn oni normalkaze nur atribuas al rabobirdoj.

Forvojaĝante la imperiestro kunprenis tiujn flugkolombojn en kaĝoj fiksitaj sur ŝarĝkameleoj. Survoje ripozante, oni ellasis el la kaĝoj la kolombojn por ĝojigi la princon. Flugantaj plej alte en la

aero ili montris siajn flugartojn kaj poste reflugis al la transporteblaj kolombejoj.

Tiaj kolomboj ekzistas ankoraŭ nuntempe. Oni nomas ilin artflugaj aŭ rulkolomboj. Oni supozas, ke ili devenas el Centra Azio.

Elstaraj flugkolomboj havis valoron de nobla rajdĉevalo kaj estis uzataj kiel princaj donacoj.

Alia varianto estis la fajfil-kolomba sporto. Necesaj por tio estis kolomborasoj povantaj trankvile kaj alte flugi. Ofte oni ankaŭ uzas plonĝflugajn kolombojn, kiuj kun provizita kolombofajfilo, plonĝante centojn da metroj, lasas sin fali, farante kuriozajn turniĝojn kaj saltojn.

La sporto per kolombaj fajfiloj havas longan tradicion kaj estas ankoraŭ hodiaŭ praktikata multvarie en Ĉinio, Hindio, Indonezio, Irano, Tajlando kaj en Proksima Oriento.

Oni provizas kolombojn per tre malgrandaj fajfiloj el ligno, ginkonukso, bambuo, metalo aŭ ornama kukurbo en la stirplumoj de la vosto aŭ oni fiksas ilin sur la dorson.

La instrumentoj estas malgrandaj artaĵoj kaj pezas ĝenerale nur kvin gramojn, tial ili neniel ĝenas la flugantajn kolombojn. La diversajn ton-nivelejn oni agordas plej precize, tiel ke ĉe la ekflugigo de pluraj kolomboj muzike dorlotiĝas la oreloj. Per ŝanĝiĝanta flugrapideco de la kolomboj ŝanĝiĝas ankaŭ la tonalteco.

En la antikva Pekino entute nur kvin familioj posedis la imperiestran privilegion fari kolombofajfilojn. El ornamaĵoj kukurboj tie estis faritaj artoplenaj orgenetoj, kiujn oni fiksas sur la dorson de kolomboj.

Trankvile flugantaj "Orientaj Nokto-Flugantoj" estis ellasitaj dum la sunsubiro. Ili flugis pli kaj pli alten al la vespersuno kaj ĝojigis la posedantojn sidantajn antaŭ siaj dompordoj per kurioza sfera muziko.

Ankoraŭ hodiaŭ sur Javo oni lasas altenflugi "Madura-rulkolombojn", grandajn kaj pezajn plonĝflug-kolombojn ekipitajn per kolombofajfiletoj. Rapide ili malaperas en la klara tropika ĉielo. Diversaj kolomb-amantoj lasas siajn rulkolombojn samtempe ekflugi. Post certa signalo flugfalas la kolomboj — altirinte la flugilojn — malalten kiel meteoro el la vasta ĉielo, farante ŝraŭbformajn turniĝojn. Tiam la kolombofajfilo sonas per akra sono.

La posedanto, kies kolombo sidiĝas la unua sur la etenditan brakon, estas la venkinto.

La javanoj ekipas siajn kolombojn per unutraaj, dutraaj aŭ tritruaj fajfiletoj, kiuj estas arte faritaj kaj multkoloraj lakitaj. Kelkfoje oni trovas ankaŭ tiajn kolombofajfiletojn priskribitajn en la antikva hinda mitologio.

Ŝajnas, ke la fajfil-kolomba sporto venis el Ĉinio.

En FR Germanio ekzistas — eble ankaŭ en aliaj landoj — ligoj de flugkolomb-amikoj, kiuj eĉ kunportas siajn kolombojn en konvenaj kestoj per aŭto. Post kiam oni ellasis la kolombojn sur vasta kampo, ili tuj artisme montras siajn akrobataĵojn. Ĝuinte iom da tempo la spektaklon, oni relogas la kolombojn en la transporteblan kolombejon.

Elgermanigis **JOZEF FISCHER**

Svatisto-arbo en FR Germanio

Cirkulas la antikva ĉina legendo "Dong Yong kaj la Sepa Feino", kiu rakontas, ke la Sepa Feino en la ĉielo kaj kamparano Dong Yong sur la tero geedziĝis dank' al la svatado de arbo. Sed tio okazis nur en la rakonto. Tamen hodiaŭ ja ekzistas en FR Germanio kverko, kiu laboras kiel svatisto jam de 90 jaroj.

La kverko kun aĝo de ĉ. 600 jaroj kreskas en arbaro proksime al la urbo Eutin en la norda parto de FR Germanio. Estas interesa rakonto pri la kverko: En antikveco iu ŝnurita reĝido estis kondukita al tiu senhoma loko kaj baldaŭ mortonta pro malsato. Feliĉe iu bonko'a knabino rimarkis kaj savis lin. La reĝido estis tiel danko al ŝi, ke li edziĝis al ŝi kaj plantis la kverkon kiel simbolon de ilia sincera amo.

En 1891 venis iu viro por prizorgi la arbaron. Tiam lia filino enamiĝis

al iu junulo, sed tion malhelpis ŝia patro. Por daŭrigi la amrilaton, la gejunuloj reciprokis siajn amleterojn utiligante truon en la kverko. Poste la viro tion rimarkis kaj tiel forte kortuŝiĝis, ke li fine donis permeson. La 2-an de junio tiujare la feliĉa paro okazigis nupton sub la kverko (vd. la foton sube). Baldaŭ disportigis la novaĵo pri la svatisto-arbo. Multaj gejunuloj imitis ilin, metante leteron aŭ slipon en la truon por trovi deziratan amaton. Ĉiu ajn rajtas legi la skribaĵojn. Se ambaŭ gejunuloj estas kontentaj unu pri la alia, ili do interkonsentas pri sia rendevuo. Vere, multaj paroj tiel enamiĝas dank' al la svatado de la arbo.

Poste la aŭtoritatoj registris la truon kiel adreslokon. Leterportisto regule biciklas al la arbo, surgrimpas ĝin per ŝtupareto el arbobranĉoj kaj metas en la truon la leterojn el plej diversaj lokoj. Tiel la kverkon atingas pli ol 800 leteroj ĉiujare. Gejunuloj en la mondo fariĝu feliĉaj paroj! La antikva kverko jam fariĝis taŭga svatisto.



Kolombo kun fajfileto fiksita sur la vosto

Geedziĝa ceremonio sub la giganta kverko



LA NACIA MONATO POR SOCIALISMA ETIKO

En marto ĉi-jare Ĉinio kondukis la kampanjon de la Nacia Monato por Socialisma Etiko por mobilizi la tutan popolon ŝanĝi la urban aspekton.

Ĉefministro Zhao Ziyang faris paroladon pri tio en la televido kaj radio, alvokante la popolanojn ekagi por elimini malpuran medion, malbonan sociordon kaj malĝentilecon, kaj konstrui Ĉinion en modernan socialisman landon kun alta civilizacio kaj alta demokratio.

Je la unua de marto — la unua tago de la Nacia Monato por Socialisma Etiko — en ĉiu urbo de la tuta lando centmiloj ĝis pli ol du milionoj da homoj surstrate propagandis pri civilizacio kaj ĝentileco, purigis la medion kaj helpis teni bonordan trafikon. Multe da gvidantoj de la centra ĝis la bazaj unuoj partoprenis la movadon.

En la pasinta jaro en Ĉinio komenciĝis la aktivado por kuraĝigoj al civilizacio, ĝentileco, higieno, bonordo kaj moralo kaj beloj en animo, lingvaĵo, konduto kaj medio. Ekde nun oni faros tian aktivadon unufoje ĉiujare.

24 HISTORIAJ KAJ KULTURAJ URBOJ DE ĈINIO BONE PROTEKTATAJ

La ĉinaj urboj kun grava historia valoro kaj revolucia signifo estis difinitaj, en la komenco de la nuna jaro, kiel la unuaj historiaj urboj de Ĉinio kaj estos pli bone protektataj.

Ili estas Pekino, Chengde, Datong, Nankino, Suzhou, Yangzhou, Hangzhou, Shaoxing, Quanzhou, Jingdezhen, Qufu, Luoyang, Kaifeng, Jiangling, Changsha, Kantono, Guilin, Chengdu, Zunyi, Kunming, Dali, Lhasa, Xi'an kaj Yan'an.

En multaj ĉinaj historiaj kaj kulturaj urboj konserviĝas granda nom-

bro da historiaj kaj revoluciaj objektoj, kiuj montras la longan historion, gloran revolucionan tradicion kaj brilan kulturon de la ĉina nacio. Koncerne al la estonta konstruado de la urboj, oni devas konsideri ne nur ilian modernigon, sed ankaŭ konservon kaj disvolvon de iliaj propraj historiaj trajtoj, t.e., konservi malnovajn kvartalojn, ruinojn de antikvaj urboj, historiajn restaĵojn, malnovajn loĝejojn de eminentuloj, antikvajn konstruaĵojn, vizitindajn lokojn, antikvajn arbojn k.a.

LA DUA ORKOKA PREMIADO DE LA ĈINA FILMISTA RONDO

La Dua Orkoka Premio estis okazigita de la Ĉina Filmista Asocio en februaro ĉi-jare. La bonakceptita rakonta filmo "Familio Plena de Ĝojo" gajnis honoran premion. (Pri tiu filmo legu nian revuon 1981, n-ro 11 "Incidento de Kampara Familio") La filmo "Najbaroj" gajnis premion por la plej bona rakonta filmo, la dokumentaj filmoj "Kanto pri Antaŭirantoj" kaj "Juneco Pli Kara ol Oro" premion por la plej bona dokumenta filmo, kaj la filmo "Reĝlando de Abeloj" premion por la plej bona scienc-eduka filmo.

Krome, estis donitaj ankaŭ premio por la plej bona scenaristo, premio por reĝisoro, geĉefroluloj, negravaj geroluloj, fotado, belarto kaj muziko.

La Juĝkomitato de la Orkoka Premio konsistis el 26 famaj filmistoj, filmkritikistoj kaj scenaristoj. Ĉiuj filmoj partoprenantaj en la elektado estas produktitaj en 1981.

NOVA METODO KONTRAŬ KORIO-KANCERO

La Ĉefurba Hospitalo sub la Ĉina Akademio de Medicino trovis efikan metodon kontraŭ korio-kancero, grave maligna tumorino ĉe virino. De 1958 ĝis 1975 la hospitalo kuracis 392 suferantojn de korio-kancero. La mortokvanto de la kuracitaj dum kvin jaroj malpliĝis. En 1958 la

mortokvanto estis 89.2%, sed de 1972 ĝis 1975 reduktiĝis ĝis 21.4%.

Korio-kancero terure minacas la vivon de virinoj. Antaŭe la apliko de operacio kun radioterapio por ĝin kuraci ne havis kontentigan efikon. La esplora grupo pri korio-kancero de la ginekologia kaj obstetrika fakso sub la Ĉefurba Hospitalo sukcese aplikis kuracilon por leŭkemio al kuracado kontraŭ korio-kancero, kreis metodon preni la medikamenton granddoze kaj akiris bonan efikon. Poste ĝi sukcese provis aliajn kvin medikamentojn por kuraci kontraŭ korio-kancero, tial la mortokvanto de suferantoj de la malsano grandnombre reduktiĝis.

Samtempe per la samaj medikamentoj ĝi kuracis malignan hidatidoforman moleon similan al korio-kancero kaj akiris la saman efikon.

La grupo elpensis la normon pri klinikaj periodoj surbaze de la disvolviĝo de patologia ŝanĝo. Ĝi estas akceptita en kaj eksterlande. Krome, ili faris ankaŭ esploron pri la transiĝo de la du kanceraj al pulmo kaj cerbo kaj akiris certagradan sukceson.

NOVA ATINGO EN ŜPARO DE ENERGIO


En 1981 la entreprenoj de ĉinaj industrio kaj trafiko ŝparis energion egalan al 24 milionoj da tunoj da norma karbo, kiuj egalas al la jara produktokvanto de pli ol dudek grandaj karbominejoj.

Sed estas menciinde, ke nun troviĝas ankoraŭ multaj entreprenoj, kiuj kaŭzas grandan malŝparon de energio. La Ŝtata Konsilantaro postulis, ke en 1982 la tutlandaj entreprenoj de industrio kaj trafiko bone laboru por ŝpari energion kaj gajnu plian disvolviĝon en produktado kondiĉe, ke la liverita energio ne plimultiĝu aŭ certagrade reduktiĝu. La ŝtato decidis, ke la redukto de energikonsumo estu prenita kiel gravitpunkto kaj estu ŝparita la energio, egala al dudek milionoj da tunoj da norma karbo.

La Pekinopero “Ĉe Vojkruciĝo”


Fotoj de QU LAO

“Ĉe Vojkruciĝo” estas mimika lukta teatraĵo. Temas pri okazaĵo en la Norda Song-dinastio (960-1127 p. K.). Pro protektado de generalo Jiao Zan persekutata de insidema kortegano la justama hotela mastro Liu Lihua renkontas oficiron Ren Tanghui, kiu kaŝe protektas Jiao Zan, en hotelo. Ili suspektas unu la alian pri atenco de Jiao Zan kaj faras luktadon en malluma nokto. En la intensa luktado alrapidis Jiao Zan, nuligis la miskomprenon kaj ilin pacigis gaje.




Luktado inter Liu Lihua kaj Ren Tanghui en obskuro

Jiao Zan venis kaj ilin pacigis.






La urbo Sanmenxia



La Pagodo Baolunshi, 26.5 metrojn alta, ĉe la Flava Rivero, konstruita en 1177 p.K.



Pramejo ĉe la Flava Rivero




La barajo de la Flava Rivero ĉe Sanmenxia

Vojaĝo tra la meza baseno de la Flava Rivevo (2)

Sanmenxia

Fotoj de ZHOU QINJUN



Ellasado de superflua akvo

